


El

人民中國報道

POPOLA  
CINIO

4  
1962





Jnu el la 10 partoj de la "Bildo de Bovpaŝtado" sur Dafovan-a okmuro.



"Flutantino".

## La Ŝtonaj Skulptaĵoj de Dazu-gubernio

*La dazu-aj ŝton-skulptaĵoj estas ĉizitaj sur rokaj muroj. Ili konsistas el pli ol 500 niĉoj kaj kavernoj kun centoj da statuoj faritaj en la periodo de la 9-a ĝis 19-a jarcento p. K., situas ĉefe sur la Norda Monto kaj Baŭding-monto en Dazu-gubernio, Siĉuan-provinco. El ili la plejparto estas verkoj de Song-dinastio (960-1279 p. K.) kaj kun forta spiro de la vivo. Tie ĉi, limigite de la spaco, ni povas prezenti nur kelkajn el ili.*

Fotoj de Hinhua

"Bredantino de Kokoj".



"Ebriiĝinto Ne Plu Konas Sian Fraton".



# Du Fu, la Nacia Poeto de Ĉinio



**E**N LA KURANTA JARO, ni celebras la memoron de du el niaj plej grandaj poetoj: la 1200-an datrevenon de la morto de Li Baj kaj la 1250-an de la naskiĝo de Du Fu. La ĉina poezio havas historion de pli ol 3000 jaroj kaj multege da tre bonaj poetoj, sed tiuj du estas la plej amataj kaj alte honorataj de ni. Du Fu ne estas tiel vaste konata trans la landlimo kiel Li Baj, tamen ni, laŭ la ĝenerala opinio de kompetentuloj, metas lin eĉ super Li Baj. Arturo Waley, la talenta angla tradukinto de ĉinaj poemoj, tre bone konsciis pri tiu ĉi fakto, kiam li asertis: “Anglaj verkistoj pri ĉina literaturo ŝatas deklari, ke Li Tai-po (Li Baj) estas la plej granda poeto de Ĉinio, tamen ĉinoj mem donas tiun ĉi lokon al Tu Fu (Du Fu).” Sed eraris lia konkludo, ke “Li Tai-po estis la poeto de la popolanoj kaj Tu Fu, la poeto de la inteligentuloj.” Ni diru preferinde, ke Du Fu estas nia nacia poeto, poeto de la tuta popolo, kies verkoj plej bone esprimis la penson, deziron de la popolamaso kaj respegulis ĝian vivon, dum Li Baj estis genia poeto, poeto de la poetoj. En sia verkaro, Du Fu resumigis la esencon de la klasika tradicio kaj transdonis al la posteuloj, sed samtempe lia kreanta genio enkondukis tute novan epokon en la ĉinan poezion kaj influis dum pli ol mil jaroj preskaŭ ĉiujn pli aŭ malpli elstarajn poetojn. Ni povas diri kun certeco, ke li estas la plej ĉina el la ĉinaj klasikaj poetoj kaj kiu volas bone koni la ĉinan poezion, tiu nepre devas atente studi la verkaron de Du Fu.

Du Fu naskiĝis en 712. Lia delonge eminenta familio donis ekde la tria jarcento multe da famuloj en la politika kaj literatura sferoj. Lia avo, Du Ŝenjan (ĉ. 646-706) estis unu el la plej elstaraj poetoj ĉe la komenco de Tang-dinastio. Malmulte ni konas pri la infaneco de la poeto. Post sia dudeka jaro li multe vojaĝis. Li vizitis la famajn restaĵojn el antikveco, belajn pejzaĝojn, amikiĝis kun konataj literaturistoj de diversaj lokoj. Li ŝatis trinki, rajdi kaj ĉasi, li vivis kun siaj amikoj senbridan kavalirecan kaj iom bohemianisman vivon. El liaj postaj verkoj, ni scias, ke lia verkista vivo komenciĝis tre frue, en la sepa jaro li verkis poemon pri fenikso kaj en la naŭa, liaj verkaĵoj jam plenigis saketon; lia poezia talento tuj altiris la atenton de la plenaĝuloj. Sed liaj fruaj verkoj jam tute perdiĝis. Ni konservis nur malmulte el la verkaĵoj antaŭ lia trideka jaro.

Lia vizito al Ĉang-an, la tiam ĉefurbo, en 746, kiam li estis en sia 35a jaro, kondukis lin al tute nova etapo de lia vivo. Ĉar tiu tempo estis la turnopunkto de la sorto de Tang-dinastio kaj ankaŭ de lia verkista vivo. La unuaj cent jaroj de la dinastio pasis ĝenerale en trankvilo kaj prospero, escepte de kelkaj ŝtatrenversoj en la kortego, kiuj ne havis gravan konsekvencon en la vivo de la popolo. Kiam la imperiestro Minghuang surtroniĝis 713, la sekvintan jaron de la naskiĝo de Du Fu, la imperio estis en sia plena florado ĉiuflanke. Tang Minghuang estis ambicia, sed energia kaj kapabla reganto. Li regis entute kvardek du jarojn. En la unuaj tri jardekoj, la ŝtataj aferoj estis gvidataj de fidelaj kaj saĝaj ministroj. Tiam la ŝtata prestiĝo atingis sian zeniton, la ekonomia kaj kultura vivo prosperis senprecedence. Grupo da geniuloj kiel Li Baj, Vang Vej ktp. ekaperis sur la poezia firmamento kaj ĥore kantis la prosperon de la imperio. Sed dum la lasta jardeko de la regado la maljuna imperiestro dronis en lukso kaj volupto kaj estis gvidata de sia favoratino Jang Gujfej kaj koruptitaj korteganoj. Pro la malŝparego de la kortego kaj sinsekvaj fiaskaj militekspedicioj elĉerpiĝis la ŝtata kaso. Popolanoj ĝemadis senkonsile sub la peza ŝarĝo de impostoj kaj senĉesaj militservoj. Fine eksplodis la ribelo de An Luŝan kaj Ŝi Siming en la jaro 755, kiu daŭris pli ol sep jarojn kaj ŝancelis ĝisfunde la fundamenton de la imperio. La uragano trakuris preskaŭ duonon de la tuta teritorio. La landanaro malpliigis je du trionoj pro morto kaj formigrado. Post tiu katastrofo Tang-dinastio neniam reakiris sian antaŭan prosperon ĝis la fina falo en 907.

La poeto alvenis Ĉang-an ĝuste en tiu turnopunkto kaj tie vivis dum dek jaroj en ekstrema mizereco. Li ekkontaktiĝis kun la malbela realeco, flaris ĉie la minacantan tempeston. La vivo devigis lin forjeti la antaŭajn revaĵojn kaj ekpreni la realisman vojon de verkado. Jen komenciĝis la plej brilanta kaj fekunda epoko de lia krea povo. Li akre kaj malkaŝe kritikis la koruptitan vivon en la kortego (*La Balado pri Belulinoj* ktp.), la teritorian avidon de la imperiestro kaj pledis por la mizeruloj sub la peza premo (*Balado pri Militĉaroj*, la du cikloj de *Trans la Landlimon* ktp.). Li ankaŭ klare perceptis la akran antagonismon inter-klan, en unu el siaj plej gravaj poemoj, *Meditado sur la Vojo al Fenghian*, la poeto flamiĝis hurlante:

*En nobelaj loĝejoj putriĝas viando kaj vino,*

*Dum kadavroj troviĝas survoje de frostomortintoj!*

En Ĉang-an la poeto ne plu povis vivteni sin pro la malabundeco en la ĉirkaŭaĵo kaj devis sendi sian familion al Fenghian kaj li sola restis en la ĉefurbo. Nur en 754 li ricevis fine malaltrangan ŝtatoficon. Anstataŭ komenci labori por la ofico, li veturis al Fenghian por viziti la edzinon kaj la infanojn. Kiam la ribelo eksplodis en la vintro de 755 kaj la imperiestro Minghuang migris al Ĉengdu (la ĉefurbo de la nuna Siĉuan-provinco), ankaŭ la poeto kun sia familio rifuĝis al Kiang-vilaĝo en Fuĝoŭ (ĉirkaŭ ducent km. norde de Ĉang-an). La sekvantan aŭtunon, li aŭdis ke la kronprinco jam surtroniĝis en Lingvu (en la nuna Ninghia Aŭtonoma Regiono de Huj-nacio, ĉe la orienta bordo de la Flava Fivero), li tuj rapidis sola tien, sed survoje estis arestita de la ribeluloj kaj de-



*Sur la bazo de la Kabano kaj Templo de Du Fu en Ĉengdu, Siĉuan-provinco, aldone konstruiĝis Memoriga Halo de Du Fu. Sur la foto vidiĝis la Templo de Du Fu.*  
Foto de Huabaŭ

tenita en Ĉang-an pli ol duonjaron. Ĉe la komenco de la sekvanta somero li sukcesis savi sin el la kaptiteco kaj atingis Fenghian, la tiaman sidejon de la imperiestra kortego. Dum tiu tempo li verkis dekojn de siaj plej belaj poemoj (*Printempa Vidaĵo*, *Luna Nokto*, ktp.). En aŭtuno, li ricevis forpermeson por viziti siajn familianojn, tiu vojaĝo donis al ni la bone konatajn poemojn (*Vojaĝo al la Nordo*, *Kiang-vilaĝo*). Vintre de 757, Ĉang-an kaj Luoĵang estis rekonkeritaj, Du Fu akompanis la novan imperiestron al la malnova ĉefurbo. Sed lia ŝtatoficula vivo ne prosperis kaj li baldaŭ forlasis Ĉang-an por ĉiam. En tiuj jaroj la batalo ĉiam plu furiozis kaj li vidis ĉie la suferegon de la popolo. Ĉion tion li respegulis en siaj verkoj (*Pedelo de Ŝihaŭ-vilaĝo*, *la Disigo de Nov-geedzigitaj*, kaj multaj aliaj.).

En 759, okazis sekego en Guanĝong (la nuna Ŝenhi-provinco) kaj la poeto migris kun sia familio unue al Kingoŭ (en la nuna Gansu-provinco) kaj fine al Ĉengdu en 760, kie li ekloĝis di-



*Ponteto, bambuoj kaj antikvaj cipresoj—bela pejzaĝo apud la Kabano de Du Fu.*

Foto de Huabaŭ

finite dank' al la helpo de kelkaj amikoj. Post longa kaj neimagebla sufero dum la migrado, nun li havis finfine iom da ripozo kaj povis pasigi la tagojn trankvile inter la vilaĝanoj kaj kiel la vilaĝanoj. Li rilatis tre amike kun ili. Li kantis pri la bela naturo kaj sia vilaĝa vivo. Kvankam li vivis tie tre modeste, tamen li neniam perdis siajn kuraĝon kaj bonhumoron, kaj trovis en tiu vivo feliĉon. Sed eĉ tie ne estis tute pace, la lokaj militistestroj kverelis inter si kaj kaŭzis al la loĝantaro suferon. Ĉetere, famoj pri invado de nordokcidentaj nacioj rondiras ofte post la subpremiĝo de la granda ribelo. En liaj verkoj en tiu periodo ankaŭ abundas la memoro pri la pasinteco kaj maltrankviliĝo pri la estanteco.

Kiam lia amiko Jan Vu, la prefekto de Giannan (la nuna Siĉuan-provinco) mortis en 765, li perdis sian ĉefan patronon, li ne povis plu restadi en Ĉengdu, migradis iom post iom orienten kaj fine forlasis Siĉuan en 768. Li vivis tie naŭ jarojn, ĉar li ne povis akomodiĝi al la tiea klimato, li konstante malsaniĝis je malario, ftizo kaj reŭmatismo. Li volis returniĝi al la nordo, sed la tieaj de tempo al tempo eksplodantaj bataloj minacadis la pacan vivon kaj malhelpis lin efektiviĝi sian planon. Post du aliaj jaroj en migrado, li mortis ĉe Lejjang en la nuna Hunan-provinco en 770, havante 59 jarojn.

La enhavo de la verkaro de Du Fu estas riĉega, li kantis pri ĉiuj temoj kaj en ĉiuj stiloj, sublima aŭ intima. Li estas ankaŭ unu el niaj plej grandaj majstroj de la lingvo; per malmultaj vortoj li povis elvoki grandiozan aŭ animskuan scenon de tiu neordinara epoko aŭ ĉarman bildon de iu besto aŭ insekto. Lia elvokpovo nin mirigas. Sed li estis principe nia unua granda realisma poeto, ankaŭ la plej granda. Li ne havis sisteman teorion pri sia verkista ideo kiel Baj Gjuji, sed lia verkista praktiko plene pruvis tion. El liaj pli ol 1400 poemoj, la plej valoraj restas tiuj, kiujn li verkis en la antaŭvespero kaj dum la unuaj jaroj de la ribelo, en kiuj li elstaris kiel la vera parolanto de la popolamaso. Eĉ tra liaj pli intimaj kaj personaj poemoj ĉiam vibradas la korpulsado de la amaso. Lia poemaro restos la fidela bildo de tiu epoko. Oni ne malĝuste nomis lin "la historiisto en poezio". Kiel kuraĝa kaj honesta homo, li ofte severe



*Koridoro de la Memoriga Halo de Du Fu.*

*Foto de Huabaŭ*

kaj malkaŝe kritikis la regantan klason kaj kelkfoje eĉ celis rekte al la imperiestro kun sentimeco. Tamen li estis fidela regnanto kaj patrioto. De tempo al tempo lia patriotismo tuj superis lian indignon kontraŭ la koruptita reganta klaso kaj ĉiam instigis la popolon al sindonemo por la lando. Ekzemple, kiel heroe la maljunulino en *Pedelo de Ŝihaŭ-vilaĝo* kaj la juna edzino en *Disiĝo de Nove Gedzigitoj* elportis sian malfeliĉon!

La humaneco de la poeto estas same frapanta. Li amis siajn proksimulojn, sed li amis ne malpli ĉiujn malfeliĉulojn. Kiam lia plej juna fileto mortis je malsato, li diris al si: "Mi ĉesu jam malĝoji, ankaŭ la najbaroj ploras pro siaj suferoj. Se mi, kiu ne estas devigata pagi imposton kaj servi en la armeo, trovas min malfeliĉa, do kiom suferus la popolanoj: la senlaboruloj kaj la garnizonanoj ĉe fora landimo?" Kiam lia kabano estis detruita de aŭtuna ventego kaj li ne povis endormiĝi dum la tuta nokto sub la pluvo, li kantis:

*Kiel fariĝu milĉambra domego  
Kaj monte ĝi staru en ventopluvegoj,  
Ke ene ĝojvivu tutmondaj mizeraj kolegoj?  
Ho! se iam aperos antaŭ mi altega ĉi domo,  
Eĉ en la kaban' detruita mi mortos de frosto feliĉa  
homo!*

(Tr. Laŭlum, E.P.Ĉ. Nro 1, 1958)

Lia kunsento kun la mizeruloj estis tre sincera, li neniam staris supre kaj aparte de la popolamaso sed vivis inter ili, sentis kaj pensis kiel ili. Tiurilate li vere meritis la grandan amon kaj estimon, kiujn la hodiaŭaj ĉinoj montras al lia kara memoro.

**Verkita de Xu.**

# Elektitaj Poemoj de Du Fu

## La Ok Genioj-Vinamantoj



En tiu ĉi poemo, la poeto kantis pri kelkaj samtempaj tre famaj geniuloj dum la plej prospera periodo de Tang-dinastio. Ili ĉiuj estis inteligentaj nobeloj kaj famaj literaturistoj, inter kiuj troviĝas Li Baj (Li Tai Po), unu el la plej grandaj poetoj de Ĉinio, kaj Ĝang Hju, eminenta belskribisto kaj poeto. Princo Ĵujang, nomata Li Ĝin, estis nevo de la imperiestro Tang Ming-huang. La ĉefministro estis Li Ŝiĝi. La poemo per malmultaj strekoj pentris vivece certan flankon de la tiama inteligentulara vivo.

Ĝiĝang\*, rajdante sur ĉevalo kvazaŭ enboate,  
Falas en puton nebulvide, tie dormas plate.

Tri doŭojn\*\* eltrinkinte, Ĵujang al kortego iras.  
Ĉe l' vido de vinĉaro liaj okuloj ekbrilas  
Kaj havi Ĝiukjuan† por feŭdlando sia li sopiras.

La ĉefministr' elspezas dekmil tage por festeno  
Kaj drinkas kvazaŭ cent riverojn englutus baleno.  
Pokal' en mano, li parolas pri ced' de l' posteno.

Cuj Zongĝi estas eleganta kaj bela junulo.  
Pokalon levas li, okulojn al ĉiellazuro  
Turnas, gracia kiel jadoarbo en ventlulo.

Su Ĝin, Budaon kultas antaŭ brodita ikono  
Ebria, li forgesas ofte pri l' eterna bono.

Ekfluas cent poemoj el la dia plum' de Li Baj  
Ĉe la pokal'. Li, en drinkejo en Ĉang-an‡ dormanta,

Rifuzis enŝipiĝi malgraŭ la alvok' monarĥa:  
"Via servant'," li diris, "estas feo vinamanta!"

Post tri pokaloj Ĝang Hju sian belan skribon pravas,  
Antaŭ magnatoj grandaj sian kapon li malkovras  
Kaj kiel flugan nubon la penikon jen manovras.

Nur post kvin doŭoj montras Gjaŭ Suj sian tutan  
brilon  
Kaj per elokventeco vekas en ĉiu admiron.

\* He Ĝiĝang, fama poeto kaj amiko de Li Baj.

\*\* Ĉina mezurunuo. 1 doŭo=ĉ. dek litroj.

† Gubernio en la nuna Gangsu-provinco. En ĉina lingvo ĝi signifas "la fonto de vino".

‡ La ĉefurbo de Tang-dinastio.

## Balado pri Militaroj

Rulknaras veturiloj,  
Ĉevaloj brue henas,  
Rekrutoj sagojn kaj pafarkon ĉe la lumboj tenas.  
Ilin postkuras tiom da gepatroj kaj edzinoj,  
Ke Hjanjang-pont' en polvonubo dense densa  
dronas.

Vojbare oni vestokroĉe kaj kun piedbatoj  
Lamentas, ke la ĉielvolbo de vead' resonas.  
Pri l' kaŭzo informiĝas iu hazarda pasanto.  
"Konskripciite!" diras ripetfoje foriranto.

"Iu riveron\* gardis norde de l' dekkvina jaro,  
Ĝis kvardek en uesto\*\* garnizone terkulturist'.  
Ĉe la forir' pedel' aranĝis por li la kaptukon,  
Revene, jam grizulo, li denove forveturis.  
Ĉe la landlimo sang' verŝiĝas kiel mara akvo,  
Sed ne satiĝas, ve! Lia Majesto teravida.  
Ĉu vi ne aŭdas:

En la ducent kantonoj de Ŝandong‡ en nia lando.  
Vilaĝoj ĉie dezertiĝas pro bankrot' rapida.  
Eĉ se virinoj fortaj prenas sur sin la laboron,  
La grenokampojn sieĝadas herbatar' senbrida.  
Cetere, la soldatojn el Kin†† oni ĉien pelas  
Kiel ŝarĝbestojn pro ilia braveco pen-spita.  
Kvankam vi min demandas kun scivolo,  
Ĉu mi kuraĝas plendi, ho sinjoro!  
Ekzemple, en ĉi tiu jaro vintre,  
Dum nin katenas la militorgio,  
La ŝtat' imposton ekpostulas urĝe,  
Per kio povus ni pagi, per kio?

Jen klara vero: estas preferinde  
 Naski filinon ol infanon viran:  
 Filinon oni povus edzinigi al najbaro,  
 Dum pereco sensenca stampis jam la sorton filan.  
 Ĉu vi ne vidas:  
 Ĉe l' Blua Maro,‡‡  
 Ekde pratempo blankas disjetite la ostaro.  
 Novaj animoj ĉagreniĝas kaj malnovaj ploras,  
 En pluva tago ĉiuj ĝemas sub nebulvualo?"

\* T.e. la Flava Rivero.

\*\* Okcidento (neologismo)

† Por ŝpari la ŝtatan elspezon kaj garantii la ĉiutagan provianton al la armeo, en antikva Ĉinio oni aranĝis tiel, ke la gardstaranta armeo ĉe malproksima landlimo kulturu per si mem grandan pecon da tero, ke la rikolto donu al ĝi la provizon necesan. La armeanoj terlaboris dum la paca tempo kaj prenis armilon por batali kiam eksplodis milito.

‡ En ĉina lingvo, la nomo signifas "oriente de la montaro", en Tang-dinastio, Ŝandong ampleksis la tutan regionon oriente de Hua-montaro, la nunajn Ŝanhi, Hebej provincojn.

†† La nuna Ŝenhi-provinco.

‡‡ Ku-ku-nor.

### *Luna Nokto \**

En Fuĝoŭ la hodiaŭnoktan lunon  
 Rigardus la edzino unusola,  
 Ĉar la infanoj etaj ne scipovas  
 Ankoraŭ pensi pri l' patro fora.  
 Ŝia harar' humidus de nebulo,  
 Kaj en purbrilo fridus la brakĉarmo.  
 Ho, kiam ĉe fenestro, prilumite,  
 Duopos ni kun sekigita larmo?

### *Printempa Vilaĝo \**

Restas nur montoj kaj riveroj el ruina regno;  
 Printempe la ĉefurbo plenas de herbaro densa.  
 La floroj verŝas larmojn pro l' malordo de la tempo  
 Kaj birdoj maltrankvilas por la foresto parenca.  
 La militfajro, ho ve! brulas daŭre tri monatojn,  
 Buŝelon da ormon' egalas ja leter' el hejm'.  
 Ĉiam pli kaj pli mallongiĝas miaj blankaj haroj,  
 Ke kune fiksi ne plu povas la harpinglo mem.

\* Tiun ĉi poemeton la poeto verkis, dum li estis retenita de la ribeluloj en Ĉang-an, kiam li forlasis sian familion en Fuĝoŭ kaj estis survoje al Feng-hiang, kie la nova imperiestro starigis provizore sian kortegon post la falo de la ĉefa urbo.

## *Kiang-vilaĝo*

### I

En okcident', sub flame ruĝa nuboj,  
 La sun' kliniĝas jam ĝis la eben',  
 Antaŭ l' kaban' kverelas birda trupo:  
 Jen, de l' vagant' millia, la alven'.  
 Mireg' tutdoma pri ĉeesto mia:  
 Trankviliĝinte ni salutas larme.  
 Migrante en malorda tempo tia,  
 Dank' al bonŝanc' nur mi revenas karne.  
 De najbaroj scivolaj korto plenas,  
 Kunsenta larmo ĉiujn premas gorĝe.  
 Ĝis tarda nokto ni kandelon tenas,  
 Sendormas, vidalvide — kvazaŭ sonĝe!

### II

En maljuneco, mankas vivrimedo,  
 Ĝojon ne trovas mi en hejmvreveno.  
 Infano kroĉiĝanta algenue  
 Ekretiriĝas de mi kun timĝeno.  
 Antaŭe ni, serĉante ombron, ĉiam  
 la arbojn ĉirkaŭiris ĉe l' lageto,  
 Nun fajfas norda vent', en mia koro  
 Cent premaj zorgoj bolas en sekreto.  
 Feliĉe greno estas rikoltita  
 Kaj, de l' premil' jam gutas vin' adage.  
 Nun mi sufiĉe havas por trinketi:  
 Min konsoletas tio maljunaĝe.

### III

La kokoj krias kaj kverelas brue,  
 Granda ĥaoso regas en la korto.  
 Oni dispelas ilin sur la arbojn,  
 Tiam aŭdiĝas frapoj sur la pordo.  
 Kvar-kvin najbaraj maljunuloj faras  
 Al mi viziton pro la longforesto.  
 Ĉiu alportas ion, kaj jen vinon  
 Flavan aŭ blankan verŝas el rondkesto\*.  
 "Tian malfortan vinon ne rifuzu!  
 La milikampon ja neniu flegas:  
 Infanoj ĉiuj iris al la fronto,  
 Ĉar la milit' ĉiam furiozegas."  
 "Jen mia kanto, oĉjoj: en penego  
 Min ege tuŝas via kora varmo!"  
 Post kanto, mi ĝemspiras al ĉielo  
 Kaj disfandiĝas ĉies kor' en larmo.

\* En antikveco en Ĉinio oni tenis trinkajon en sitelforma ligna ujo kun kovrilo kaj tenilo, ke oni povas porti ĝin kien ajn.

### *La Pedelo de Sibau-vilaĝo*

En la vintro de 759, naŭ taĉmentoj de la ŝtata armeo sieĝis An Kinghju, la filon de An Luŝan, la

ĉefribelulo asasinita de sia propra filo, en Jiĉeng ĝis la printempo de la sekvanta jaro, kiam Ŝi Siming, alia gvidanto de la ribela armeo, sendis helpon al An kaj donis grandan embarason al la ŝtata armeo. En la tria monato, la du kontraŭaj armeoj renkontiĝis en Anjang. Dum la batalo, ekblovis uragano kaj malheliĝis la ĉielo tiel, ke oni eĉ ne povis sin orienti. Ambaŭ armeoj diskuris en konfuzo. Sole Guo Ziji, unu el la naŭ generaloj de la ŝtata armeo retiris sian taĉmenton al Hejang-ponto por defendi Lojang kontraŭ la atako de la ribela armeo. La ŝtata armeo, por kovri la grandegan perdon, klopodis sin refortigi per grandskala rekrutigo perforta kaj kaŭzis ĝeneralan malkvieton inter la popolamaso. La poeto verkis serion de siaj plej tamaj poemoj (ses entute) pri tiu evento. Tiu ĉi kaj la sekvanta estas du el ili.



**Pedelo de Ŝihaŭ-vilaĝo.**

**de Ĝu Mejcun**

*Dum mi tranoktis en Ŝihaŭ-vilaĝo,  
Okazis tie rekrutig' per forto:  
Trans muron savis sin la maljunulo,  
Maljunulino paŝis al la pordo.  
Kiel kolere la pedelo bojas!  
Kiel petege la virin' malĝojas!  
Jen de l' virino kortuŝa rakonto:  
"Tri filojn oni ekspedis al fronto.  
Leter' de unu venis lastatempe:  
La du aliaj estas ĵus falintaj.  
En malcerteco vivas la vivanto,  
Por ĉiam jam finiĝis la mortintaj!  
Restas neniu plu nun en la domo,  
Escepte de nepeto, suĉinfano,  
Kun la patrino vidva, kiun kovras  
Nur ĉifonaj' de kapo ĝis kalkano.  
Kvankam mi estas febla kaj maljuna,  
Tamen mi volus jam nun kun vi iri  
Por servi la armeon apud Hejang  
Kaj matenmanĝon ĝusttempe kuiri."  
Silent' reregis en malfrua nokto,  
Iu singultis, ŝajne, en angulo.  
Kiam mi survojiĝis la matenon,  
Min adiaŭis nur la maljunulo.*

### *La Disiĝo de Nove-geedziĝitoj*

*Kroĉiĝe al kanabo aŭ eriko  
Ne povas alten grimpi la kuskuto;  
Kvazaŭ survoje estus forĵetita  
Virin' edziniginta al rekruto.  
Dum mi fariĝas via novedzino,  
Eĉ ne varmiĝas mat' en via lito.  
Vespere — nupta festo, sed matene —  
Jam adiaŭo! Ho, kia rapido!  
Ne longas kvankam la vojaĝ', en Hejang  
Sur fronto vi servados garnizone,  
Sed kiel mi salutu l' bogepatrojn  
Ne plenuminte ritojn laŭbezzone?  
En patra domo oni min edukis  
Ĉiam al enfermiĝo kaj modesto;  
Ili esperis, ke foje ligitaj  
La geedzoj vivados en kunesto.  
Nun malgraŭvole kuras vi al morto,  
Doloro la intestojn al mi tordas.  
Mi, ho ve! volus iri kune kun vi,  
Sed pli da implikaĵo tio portus.  
Jam ne memoru pri via edzino,  
Penu prizorgi vian militservon!  
Virino en armeo, oni diras,  
Faros ĝin perdi sian vervon.  
Mi, malriĉa knabino, perlaboris  
Longe kaj malfacile silkan veston:  
Mi ne plu ĝin bezonas kaj forlavas  
Ankaŭ la ŝminkon en via ĉeesto.  
Supre la birdoj, grandaj aŭ malgrandaj,*



Flugadas ĉiuj pare en konkordo,  
Sed devas ni disvivi por eterne,  
Kiel perfidas, ve, la homa sorto!

### *Batpurigo de Lavataj Vestoj \**

Mi scias ankaŭ, ke li ne revenos hejmen,  
Sed polvon mi forviŝas de la lavo-ŝtono  
Ekde l' aŭtuno. Min korpremas longdisiĝo  
Krom proksimiĝo de la vintra frostsezono.  
La penon mi ne timas, por ke la vestaĵoj  
Atingu l' foran urbon de la garnizono.  
Jam elĉerpiĝas mia forto virinbraka,  
Aŭdiĝas tamen nur la en aer' resonado.

\* En antikva tempo, ĉiujare ĉe la proksimiĝo de la vintro, la edzinoj kaj la patrinoj de la armeanoj, kiuj gardstaris ĉe la malproksima landlimo, devis lavi kaj ripari aŭ nove kudri vatitajn vestojn por sendi ilin al la forrestantoj. Oni kutime metis la malsekan vestaĵon aŭ ŝtofon sur ŝtonon kaj purigis aŭ glatigis ĝin per longdaŭre ripetata bastonbatado. Tiun ĉi metodon de vestlavado ankoraŭ nun vaste uzas la popolanoj.

### *Malzorgemulo \**

Post la granda civila milito, okazis granda malsato ĉirkaŭ Ĉang-an. La poeto forlasis sian oficon kaj migradis kune kun sia familio al Siĉuan-provinco. Li atingis Ĉengdu, la ĉefurbon de Siĉuan en la fino de 759. Tie li konstruigis por si kabanon kaj vivis tre modere je la financa helpo de iu amiko. La sekvantan poemon li verkis en 760.

\* Persono, kiu ignoras rutinajn ideojn de la socio kaj malŝatas ĉion vulgaran.

Mia kaban' okcidente de l' Pont' Vanli',  
Kun la klarakva Lago de Centfloroj antaŭ ĝi.  
Senpolvajn verdajn bambuetojn lulas milda vento  
Kaj post pluvet' odoras la lotusoj en silento.  
Amikoj ĉesis skribi al mi alte salajrataj  
Kaj aspektas malgaje la infanoj oftmalsataj.  
Devenis ja de malzorgemo la mizero nuna,  
Sed mi, ridinde ja, des pli malzorgas, pli maljuna.

### *Verstaroj*

#### I

Sen posedant' ne estas la de mi plantitaj arboj,  
Kaj la kabano malaltmura — mia hejm' ankoraŭ,  
Sed la printempa vento kvazaŭ rajtus min ofendi,  
Dumnokte ĝi blovrumpis kelkajn branĉojn de la floro.

#### II

Bone sciante, ke l' kabano estas tre malgranda,  
Hirundoj sur rivero, tamen, ofte ĝin vizitas,  
Per tero malpurigas jen la sepkordon aŭ librojn,  
Jen dum insektokapto nin flugile frapincitas.

### *Nokta Penso dum Ŝipvojaĝo \**

Ĉe l' bordo kun teneraj herboj en venteto,  
Soleca nokto, ŝipo kun altstara masto.  
Lunlumo fluas onde en la grandrivero  
Kaj steloj pendas super la ebena vasto.  
Ĉu pro la verkoj mi akiris mian famon?  
Dank' al malsano venis fine la libero.\*\*  
Al kio mi similas ĉie migradanta?  
Vaganta mevo inter tero kaj ĉielo!

\* En junio de 765, la poeto forlasis sian loĝejon en Ĉengdu kaj ŝipveturis orienten. En oktobro li haltis provizore ĉe Jun-an kaj prenis tie loĝejon. La poemeton li verkis dum tiu vojaĝo.

\*\* Aludis al la ekziĝo de la ŝtata servo.

### *Sunrebrilo*

Eĉ en Ĉengdu ne regis paco kaj la poeto devis migradi kelkfoje aliloken. Tie li vivis ĝis 765, kiam li forlasis la urbon por ĉiam kaj ekloĝis en Kuj-ĝoŭ, kie li verkis la poemon en *Sunrebrilo*.



La Disiĝo de Nove-geedzigitoj.

De Ĝeng Mukang


La norda flanko de Ĉuvanggong\* jam sin lasis  
 Al la krepusk-uzurpo,  
 Sed lasta spuro de la pluvo ĵus forpasis  
 Nun apud Bajdi-urbo.  
 Sunbrilo resendita de l' river' zigzagas  
 Sur la rokaj krutaĵoj;  
 En nubalfluo, kiu la arbojn ĉirkaŭbrakas,  
 Dronas la montvilaĝoj.  
 Maljuna kaj malsana je la pulm', enlita  
 Mi altkusene restas.  
 En forprovinco kun la pord' frue-fermita,  
 Dum malordego kreskas.  
 Ne povas longe resti, kie ĉiam plagas  
 La ŝakal-tigra bando,\*\*  
 Sed la anim' nerevokita erarvagas  
 Ankoraŭ en sudlando!

\* La palaco de la reĝo de Ĉu-regno en la antikveco.

\*\* La tiamaj interbatalantaj militistoj.

### *Sur Atlano*

Ho! altas la ĉielo. Vento blovas forte.  
 Eĥas simikriad' korsira.  
 Blankas la sabla strando. Klaras akv' ĉeborde.  
 Birda rondflugo ŝvebfacila.  
 Jen pluvos, pluvos kirliĝanta folimaro  
 Susure sur la fon-senlimo  
 Kaj ĉiam alruliĝas senfina ondaro  
 De l' rivereg' el malproksimo.  
 Min migradantan dekmil lojn for de hejmo  
 Premas aŭtuna trist' nebula.  
 De alte, sklavo de tutviva malsanemo  
 Rigardpromenas senkunula.  
 En peza temp' la prujne kovritan hararon  
 Elkore volas mi malbeni  
 Kaj pro deprimiteco ankaŭ l' vinpokalon  
 Ŝatatan nun mi ĉesas teni.



Sunrebrilo.

De Vu Hufan

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KUR

### Kunsido de Poetoj

En aprilo nunjara, tuj post kiam la ĉina ĉefurbo festis la 1250-jaran jubileon de la naskiĝo de la granda ĉina poeto Du Fu, okazis kunsido de pekinaj poetoj, kiun partoprenis pli ol 50 personoj, inkluzive Emi Siao, Zang Kegia, Juan Ŝujpo k.a., por dis-

kuti la problemon: kiel prosperigi la verkadon de moderna poeziaĵo. Ili multe parolis pri la enhavo, formo kaj metriko de la ĉina moderna poemo, pri hereditado de la bonaj tradicioj de la ĉina klasika poezio kaj pri la rilatoj inter la versaĵo kaj vivo k.c. La kunsidon ĉeestis ankaŭ

Ĝu De, prezidanto de la Ĉina Kongreso de Popolaj Rezentantoj, Ĉen Ji, vicĉefministro de la Ŝtata Konsilo kaj Ministro de Fremdaj Aferoj, Guo Mojuo, direktoro de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj Ĝoŭ Jang, beletristika kritikisto kiel poeto kaj amanto de poeziaj verkoj.

# La Kemia Industrio de Ŝanhajo

**L**A HISTORIO de kemia industrio en Ĉinio estas tre mallonga, kaj kompare kun aliaj industrioj, ĝi havas ankaŭ tre malfortan fundamenton. Antaŭ la Liberiĝo, de la fundamentaj kemiaj krudmaterialoj, escepte de malmultaj specoj kiujn oni produktis etkvante en unuopaj regionoj, oni devis importi el fremdlandoj multajn specojn kiaj, ekzemple, fenolo, metila alkoholo, acetacido, ktp. Al la malmultnombraj kemi-industriaj entreprenoj mankis ankaŭ modernaj ekipaĵoj. Post la Liberiĝo, dank al la laŭplana ekonomia konstruado fare de la registaro, la kemia industrio same kiel la aliaj rapide progresis; kiel ekzemple, la produktado de multaj ĉefaj kemiaj krudmaterialoj en Ŝanhajo leviĝis tre multe en kvanto dum la periodo de 1949 ĝis 1957, la lasta jaro de la unua kvinjara plano; samtempe ankaŭ plimultiĝis la specoj de produktaĵoj je ĉ. 50%. De post la granda antaŭensalto de 1958, la produkta nivelo leviĝis ankoraŭ duoble pli alte ol en 1957; ekŝanĝiĝis la situacio de dependo al importado de plejparto de kemiaj krudmaterialoj.

En 1961, la kemia industrio de Ŝanhajo daŭre akiris serion da novaj sukcesoj:

Antaŭ ĉio, pliklariĝis la direkto de kemia industrio "servi al agrikulturo", grandskala fabriko de kemiaj sterkoj estos baldaŭ finkonstruita, el la totala investo al la fundamenta konstruo la parto por tiuj, kiuj estas destinitaj por subteno al agrikulturo okupas ĉirkaŭ 40%.

Due, la produktado de krudmaterialoj plue disvolviĝis. Ekz-e, la fabrikado de sinteza graso acido de la Ŝanhaja Olerafina Fabriko povas ŝpari por la

ŝtato grandan kvanton da animala kaj vegetaja oleo, kaj plimultiĝi la produkton de sapo.

Trie, plialtiĝis la grado de sinteza utiligado de materialoj. Eĉ senutilaĵoj aŭ malutilaĵoj estas utiligataj. Ĉiuj entreprenoj komencis la sintezan utiligadon de uzitaj akvo, materialo kaj vaporo, el kiuj oni reakiras multe da altvalora kemia krudmaterialo, por subteni la evoluon de produktado kaj plibonigi la publikajn higienajn kondiĉojn.

Kvare, oni ankaŭ multe atingis en plibonigo de kvalito, variigo de var-specoj, levado de teknika nivelo, en eksperimentaj kaj esploraj laboroj, ktp. En 1961 plimultiĝis la specaro de produktaĵoj je ĉirkaŭ mil novaj specoj kompare kun tiu en 1960. La produkto de tinkturoj, plasto, farmaciaĵoj kaj kaŭĉukaj produktaĵoj kontentigis la postulon de varieco kaj bonkvalito. Krom tio, oni nove fondis studesplorajn institutojn pri petrolkemio, koaksigado, rezino, prilaborado de plasto, ktp., plifortigis la kunlaboradon de altgradaj lernejoj kaj studesploraj organizoj kun la produktaĵaj entreprenoj, kaj solvis multe da gravaj teknikaj problemoj.

En estonteco, la kemia industrio de Ŝanhajo plifortigos la produktadon de materialoj de organika sintezo kaj novaj krudmaterialoj. Ĝi donos riĉan materian bazon por produkti varojn por vestado kaj ĉiutaga uzado en la sama tempo, dum kiu estos solvata la problemo de kemia sterko. Ĝi ankaŭ liveros pli multe da krudmaterialoj, malkaraj kaj bonkvalitaj, al aliaj industrioj por helpi ilin plialtigi la kvaliton kaj variigi la specojn de siaj produktaĵoj.

## La Sovaĝa Ansero Jam Estas For!

De Vu Jun



# Vang Huajju kaj Lia Fruktĝardeno

— Korespondaĵo el Guangdong —

**E**N LA HIADONG-A Popola Komunumo, Guangdong-provinco, oni povas trovi grandan fruktĝardenon okupantan areon de pli ol 1100 muoj\*, kie kreskas pli ol 24,000 fruktarboj en pli ol 150 specoj — oranĝo, mandarino, ananaso, kvineĝfrukto (*averrhura carambola*), cidonio k.a. Tiu ĉi bela fruktĝardeno estas tre juna. Antaŭ kvar jaroj, kiam iu ordinara komunumano Vang Huajju gvidis pli ol dudek junulojn komenci malfacilan konstruadon de la fruktĝardeno sur la sterila flavtera monteto, ĉi tie estis nur sovaĝejo plena de herbaĉoj kaj arbetaroj.

Vang Huajju naskiĝis en fame konata fruktricia regiono Hiadong. Li pasigis sian infanecon en fruktĝardeno, kaj estas tre interesita de kulturado de fruktarboj. Sed antaŭe en lia naskiĝloko, kreskis nur liĉioj (*Nephelium litchi*), longanoj (*Nephelium longana*), vampioj (*clausena wampi*) kaj bananoj, sed ne oranĝoj kaj aliaj fruktoj. Kiam li estis deksejara, li forlasis la naskiĝlokon kaj eklaboris sur vaporŝipo. Ĉiufoje, kiam la ŝipo preterpasis Giangmen, lokon abunde produktantan oranĝojn, kaj vidis vastajn fruktarbarojn plenajn de orflavaj oranĝoj, li ĉiam estis forte impresita de ili. Li esperis, ke ili kresku ĉie ankaŭ en lia naskiĝloko; sekve, li ofte surbordiĝis por viziti fruktarbajn kulturistojn kaj lerni de ili teknikon de kulturado de tiuj fruktarboj.

Post la Liberiĝo, li laboris kiel librotenisto en Lintoŭ-a Proviza-disvenda Kooperativo, ĉe kiu li kulturis malgrandan fruktĝardenon en ripozhoroj kaj plantis dekelkajn arbojn de oranĝoj, mandarinoj, vampioj kaj aliaj. Li diligente lernis la sciojn pri hortikulturo, legis kun granda intereso librojn kaj gazetojn pri tiuflankaj scienco kaj tekniko, kaj eltranĉis el ĵurnaloj tiurilatajn materialojn por legado. En aprilo de 1957, li trovis artikolon en la *Nanfanga Tagjurnalo* skribitan de profesoro Huang Ĉanghian, la dekanano de la hortikultura fakofakultato de Sudĉinia Agronomia Kolegio; al tiu li skribis leteron por informiĝi, ĉu en Hiadong ekzistas la naturaj kondiĉoj por grandskale kulturati oranĝarbojn.

Post nelonge li ricevis respondon, en kiu profesoro Huang diris, ke laŭ la latituda pozicio, klimato, geologia strukturo kaj ceteraj naturaj kondiĉoj de Hiadong, la kulturado de oranĝarboj certe



Vang Huajju observas la fruktarbojn en sia ĝardeno.

Foto de Huabaŭ

sukcesos, kaj ke la laboron oni devas fari laŭorde, eksperimenti en la komenco kaj disvolvi poste, paŝon post paŝo. Tiu nelonga respondo portis al li grandan kuraĝigon.

Poste li korespondis kun pluraj aliaj profesoroj kaj fakuloj por peti klarigojn pri multaj demandoj, kiujn li renkontis dum eksperimentado kaj ne trovis solvon en libroj. Ekzemple, kostis al li multe da cerbumado la malgranda problemo de grefta vakso, per kiu oni fermas la junton por malpliigi perdon de akvo de vaporiziĝo. Li dum tre longa tempo ne sukcesis en greftado per uzado de abel-vakso. Post multa klopodo li trovis iun hortikulturan teknikiston, dank' al kies helpo la problemo estis fine solvita.

\* 1 muo = 1/15 hektaro.

Ekde tiam, li starigis konstantan interrilaton kun multaj sciencistoj kaj fakuloj. Li petis de ili konsilojn por solvi demandojn kaj sendis al ili ankaŭ bonajn lokajn plantidojn de fruktarboj, kaj ofte ricevis returne la samon de famaj fruktarboj de siaj "instruantoj". Tiel li iom post iom akumulis sperton de hortikulturo. En la komenco de 1958, li revenis al Hiadong, kaj dank' al la subteno de la komunumo,

li tuj komencis konstrui la fruktĝardenon kune kun pli ol dudek kapablaj junuloj. Finfine, post trijara diligenta kaj malfacila laborado, la sterila flavtera monteto jam transformiĝis en freŝverdan fruktĝardenon. Pasintjare, pli ol 2000 oranĝarboj plantitaj en 1959 jam riĉe fruktis por rekompenci la laboremajn ĝardenistojn.

Vang Vejĝen:

## Ni Venis al Brazilo

— Korespondajo —

**L**A 29AN DE DECEMBRO, 1961, ni venis al la lando de granda brazila popolo trans la vasta Atlantika Oceano. Kvankam ni flugis trans duona terglobo, la vizaĝo de la naturo ĉi tie ne estas fremda por ni. Ĝi rememorigis al ni la brazilan ĵurnaliston S-ro Eĉeveri, kiu lastjare vizitis Pekinon, Hangĝoŭon, Ŝanhajon, k.a. lokojn kaj tiam li ofte levis siajn manojn kaj diris: "Aha! jen tiel similas la pejzaĝoj ĉi tie kiel tiuj en mia patrolando."

Efektive, preskaŭ ĉiuj floroj, herboj kaj fruktarboj, kiuj ordinare vidiĝas en Ĉinio, ne mankas ĉi tie. Kiam ni grimpis sur la monton Korkovado, rigardante malproksimen al la bela golfo Rio, la monto Dolĉa Pano, etendiĝanta en la maron, kaj la arĝente brilanta strando Kopakabana, ni rememoris nian vojaĝon iaman al Suĝoŭ, Hangĝoŭ kaj Kingdaŭ. La diferenco estas nur: kiam en la nordo de nia lando la vasta tero estas kovrita de glacio kaj ĉie ŝvebas neĝoflokoj, ĉi tie estas sezono en kiu pompas la fenikso-floroj (*Delonix regia*) kaj prosperas unu pli brile ol alia la diversaj floroj kaj herboj.

Kontraŭe al la norda duonsfero, la klimato tie ĉi estas malvarma en somero kaj varma en vintro. Kvankam somero estas tre longdaŭra, tamen, krom sekeco okazanta iutempe en la nordorienta parto, grandparte de la regiono estas favorata de la naturo per sufiĉa pluvo kaj mildaj ventoj. Brazilo estas neniam atakita de uraganoj, tio ja estas mirindaĵo, sed niaj brazilaj amikoj al ni certigis ke la fakto estas vere tia. Alia karakterizaĵo en la naturaj kondiĉoj estas tio, ke tre malofte okazas tertremo en Brazilo. La granda tertremo en Ĉilio lastjare kaŭzis terenfalegon, malofte okazintan en la moderna historio. La ondoj de la tertremo eĉ forte influis Japanion, kaj la maskaredo kaŭzis tragedian detruon. Sed la proksima najbaro Brazilo estis neniom influita. En Brazilo ne troviĝas dezerto, kaj ankaŭ tre malmultas kalvaj mont-suproj. Rigardante malsupren el la flugmaŝino, ni vidis ke ĉie etendiĝas blu-

verdajoj. Ne estas mirige ke la nacia standardo de Brazilo havas verdan fonon por simboli la fekundecan de la lando.

En la lando kun areo de pli ol 8,000,000 kvadrataj kilometroj loĝas ĉirkaŭ 70,000,000 popolanoj same laboremaj kiel ĉinoj. Ili konstruis tiel grandajn urbojn kun kelkaj milionoj da loĝantoj kiel Rio de Janeiro kaj Saŭ Paulo, kaj sennombrajn altajn domegojn. Ili provizas plejparton de la viv-materialoj bezonataj de sia popolo kaj materialojn por eksportado.

Brazila popolo havas ardantan koron kaj estas lerta en kanto kaj danco, kiuj estas tre popularaj ĉi tie. Dum festotagoj, la marbordoj, placoj kaj flankoj de stratoj ĉiam turniĝas en kunvenejoj por revuado de la popolaj dancoj kaj kantoj. Ni multe miris, kiam ni vidis ke ĉiuj vendistoj de iu trinkejo en Saŭ Paulo fariĝis kantistoj kaj dancistoj tuj post la fermo de la pordo vespere. Ilia tre altnivela prezentado de Samba-muziko altiris multnombrajn spektantojn. Kiam tiuj artistoj trovis ke ni estas ĉinoj, entuziasme invitis nin al spektado.

*Kafarba ĝardeno en Saŭ Paulo de Brazilo.*

*Foto de Hinhua*



Kiam ni alvenis al Rio de Janeiro, la loĝantoj ĝuste finis sian laborplenan jaron kaj preparis sin por bonvenigi la novan de 1962. La ferioj komenciĝis posttagmeze de la 29a. La geoficistoj de ĉiuj organizadoj kaj entreprenoj, antaŭ foriro el la oficejoj, dispecigis ĉiujn utiligeblajn paperojn kaj disŝutis ilin tra la fenestroj de la altaj domoj. Sur la stratoj fluis la homa rivero kaj sin movis aŭtoj kiel navedoj. En la aero flagris paperpecetoj kiel ŝvebantaj neĝeroj. Prezentiĝis ja neordinara vidaĵo. La nova jaro komenciĝis. Kion pensis la brazila popolo de ĉiuj socitavoloj? Kian bondeziron ili havis por la nova jaro? En la gazetaro aperis la novjaraj artikoloj, jarfina bondeziro de la prezidanto, novjaraj paroloj de la famuloj de la politikaj rondoj. Kvankam iliaj enhavoj estis malsamaj, tamen ili estis unuecaj en tiuj ĉi rilatoj: Brazilo devas anktaŭenmarŝi konkerante ĉiujn malfacilaĵojn. Brazilo bezonas progreson, prosperon, kaj aspirata estas mondpaco. Politikistoj en siaj paroloj ne silentis pri tio ke Brazilo alfrontas grandan malfacilaĵon. La nombro de ĝia ŝtata ŝuldo superis 3,500,000,000 dolarojn. El tiu ĉi sumo pli ol 2,200,000,000 dolaroj devos esti repagitaj antaŭ la fino de la jaro 1965. Kaj plejparto de la sumo estas ŝuldata al Usono. La malnova eksporta merkato estas dividita kun novaj konkurantoj kaj estas limigita, ĝi ne nur ne povas esti pligrandigita, sed male estas danĝero de plimalgrandigo. Malboniĝo de la elvendado de la ĉefa eksportaĵo kafo kaŭzas ke ĝi monte amasiĝis en la lando. En tiu ĉi

situacio brazilanoj de ĉiuj rondoj opinias, ke disvolviĝo de komerca rilato kun socialismaj landoj estas afero nepre necesa kaj tute natura por Brazilo.

En la unuaj semajnoj de nia restado en Brazilo, ni ricevis la intimajn aŭdiencojn ĉe la brazila Ministro de Fremdaj Aferoj Santiago Dantas, direktoro de Informa Departamento de la nomita ministrejo Kastro Alves kaj la estro de Ŝtata Novaj-Agentejo Gvimaraes. Ili ĉiuj esprimis ke ili donos al ĉinaj ĵurnalistoj la necesajn oportunojn kaj helpojn en ilia raportado de novaĵoj.

Brazilaj ĵurnalistaj rondoj entuziasme kaj amike rilatis kun siaj kolegoj el Ĉinio. Kiam ni vizitis la oficejojn de taggazetoj kaj novaj-agentejoj en Rio de Janeiro kaj Saõ Paulo, multaj redaktoroj kaj ĵurnalistoj, sciinte ke ni estas ĵurnalistoj el nova Ĉinio, ĉiuj ĉeestantoj alpaŝis por manpremi kaj amike interparoli kun ni kaj demandis nin detale pri aferoj de la ĵurnalistaro kaj konstruaj laboroj en nova Ĉinio.

Multaj el la brazilanoj jam vizitis Ĉinion. Post reveno al sia patrolando, ili verkis librojn, faris prelegojn, skribis artikolojn por diskonigi Ĉinion, ili ĉiuj faris grandan kontribuon al ĉiam pli intima amikeco inter Ĉinio kaj Brazilo. La libro *Asia Maior-o Planeta China* verkita de sinjorino Martin, estas tre vaste kaj rapide vendita ĉi tie. Ŝi diris al ni ke nun ŝi havas neniun ekzempleron ĉe si kaj estis en preparo la dua eldono.

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KUR

## Diversaj Skoloj en Artaj Lernejoj

En multaj artaj lernejoj en Pekino, oni emfazas samtempan lekciadon pri diversaj skoloj kaj stiloj de la arto por riĉigi la enhavon de la lernobjektoj. Ekzemple, la Pekina Belarta Instituto kaj Pekina Arta Instituto multe atentis nun en lernigo de pentrado de Floroj-Birdoj, Montoj-Akvoj (Pejzaĝo) de diversaj skoloj. Samtempe, oni atentis pri disvolvo de la specialaj maj-

strajoj de la profesoroj en la pentromanieroj *gongbi-a*, *ŝeji-a*,\* kontur-linia, denskolora ktp. En la kurso de voĉa muziko en la Centra Muzika Instituto, oni atentis en la studoj ne nur heredi kaj disvolvi la ĉinan tradician kantarton, sed enkonduki ankaŭ tiun de la landoj de Okcidenta Eŭropo. Pluraj institutoj kaj lernejoj okazigas de tempo al tempo individuajn ekspoziciojn kaj individuajn koncertojn de apartaj instruistoj, konigante al la publiko iliajn artajn specialajn majstrajojn kaj trajtojn.

## Elstaraj Filmoj en 1960 kaj 1961

La revuo *Amasa Kino* iniciatis en la fino de la lasta jaro amasan elektadon de la plej bonaj filmoj faritaj en la jaroj 1960 kaj 1961.

Ĝis aprilo nunjara, la revuo ricevis de la legantoj sume 117,939 voĉdonilojn. Rezulte la *Ruĝa Taktamento de Virinoj* akiris la premion de la plej bona rakontfilmo. La aliaj premiitoj estas Hia Jan kaj Ŝuj Hua (scenariistoj), Hie Gin (reĝisoro), Ĝu Higjuan (ĉefrolulo), Cuj Vej (ĉefrolulo), Ĉen Kiang (neĉefa rolulo), Vu Jinhian (fotisto), Ĝang Gingan kaj Oŭjang Kiansu (komponistoj), Ding Ĉen (belartisto). Kaj la premion de la plej bona longa dokumenta filmo akiris *La Decida Batalo inter Du Sortoj*, tiun de la mallonga *Ŝtormo en Azio*, tiun de fotado de dokumenta filmo *Konkero de la Plej Alta Montpinto*, tiun de eduka-scienca filmo *Bufo sen Avo Patrinflanka*, tiun de pentrita filmo *Ranidoj Serĉas Panjon* kaj la operfilmo *Generalinoj de Jang-familio*.

\* *Laŭ gongbi-a maniero, oni pentras detale per tre subtilaj kaj precizaj strekoj, dum laŭ la ŝeji-a, oni pentras maldetale per aŭdaca strekado, celante doni la spiriton kaj karakterizajn trajtojn de la objekto.*

# La Unuaj Tibetaj Geaktoroj de Modernaj Dramoj

**T**IBETLINGVAJ dialogoj ekaŭdiĝis unuafoje en la teatro de la Kultura Palaco de Nacioj en Pekino. Tio estis la prezentado de la dramo *Princino Venĉeng* per kiu debutis la junaj tibetaj geaktoroj ĵusdiplomitaj en la dramluda klaso de la Ŝanhaja Instituto de Dramartoj. La rigardantoj kun granda intereso sekvis la ludadon kun aŭdiloj sur la oreloj. Iuj simple preferis ĝui rekte la sonorajn kaj belajn voĉojn en la por ili nekomprenblaj tibetlingvaj dialogoj, demetinte la aŭdilon. Kiam sur la scenejo aperis la geedziĝa ceremonio de Princino Venĉeng kaj Reĝo Sunzamkampo kaj fine la kurteno malrapide falis, la tuta spektantaro ekstaris en varmaj aplaŭdoj, gratulante la sukcesan prezentadon kaj la naskiĝon de la unua generacio de tibetaj geaktoroj de modernaj dramoj.

En la komenciĝo de vintro antaŭ du jaroj, 29 tibetaj gejunuloj venis al Ŝanhajo post tre longa vojaĝo. Plejparte el ili estis sklavoj aŭ paŝtistoj en la pasinteco suferantaj sub la vipoj de la reakciaj nobeloj kaj feŭdaj kapuloj de Tibeto. Ili estis senditaj de la Prepara Komitato de la Tibeta Aŭtonoma Regiono por esti edukataj kiel dramartistoj. Tiuj ĉi gejunuloj povosciis tiam iom kanti kaj danci, sed multaj el ili estis analfabetoj. Alportinte valizojn en la dormejon de la Ŝanhaja Instituto de Dramartoj, ili ĝoje interflustris: "Jen ni fariĝis studentoj!"

Sed, nelonge post la komenco de la lecionoj, ili ekĉagreniĝis. Estis lingva baro inter la lektorojn kaj studentojn. Kvankam la lekcioj estis interpretataj resume de la kunlernantoj, kiuj povoscias la hantingvon, tamen ili ne povis klare kompreni la signifon de fakterminoj kaj kapti la ĝustajn konceptojn. La ekzemploj, kiujn la lektoroj prenis por figura ilustrado, estis tute fremdaj al ili; tiujn ili eĉ neniam antaŭe aŭdis aŭ vidis. Kiam ili iris lernocele al teatro aŭ kinejo, ili povis nur gapi, admirante alies perfektan arton de prezentado kaj bedaŭri kun ĝemoj, ke ili mem ne kapablas tian ekposedi. Iufoje, kune kun la instruistoj la gestudentoj iris al la antaŭurba popola komunumo por helpi kamparanojn en aŭtuna rikoltado, la bonega laboro de la gestudentoj el Tibeto estis multe laŭdata de la komunumanoj. Sed, antaŭ returneniĝo, unu studento nomata Vangdue subite petegis sian instruiston: "Lasu min labori ĉi tie; pri kamplaboroj mi estas plikompetenta." Surprizite, la lasta demandis pri la kialo, kaj Vangdue batis sian kapon kun ĉagreno, "Mi estas la plej malsaĝa homo, ellerni dramarton mi ne kapablas." La

instruisto ekkonis la malsimplecon de la problemo. Post detala enketo, li trovis ke la saman personon havas la plimulto de la tibetaj studentoj.

Foje, kiam la instruisto donis al ili taskon de ekzercado en drama ludo pri la temo "Kion nun faras viaj gepatroj", Vangdue fariĝis treege embarasita. Li eĉ larmis, starante apude. La pridemando malkovris, ke ĉi tiu junulo jam estis sklavo ekde la aĝo okjara kaj liaj gepatroj pereis tre frue sub la sovaĝa premado de la servuta sistemo. Li diris korpremite, "Kiel mi povos ludi dramon kiam mankas al mi eĉ sperto de komuna vivo de la ordinarnaj homoj?"

Sed malfacilaĵoj ne limiĝis en tio. Dum la ekzercado de korpteniĝo, la studentoj devas lerni baledajn movojn. Sed por Vangdue kaj liaj kunlernantoj, eĉ la pozo de rekta staro prezentis malfacilaĵojn. La longjara sklava vivo en la pasinteco deformis al ili la dorson kaj genuojn. Tiel post la leciono ili sentis jam doloron tra la tuta korpo. La tibetaj studentoj koleris kun malamo kontraŭ la pasinta servuta sistemo, kiu detruis ilian sanon kaj senigis ilin je la rajto de kleriĝo. En ilia penso ekaperis dolora dubo: "Ĉu prosperos al mi ellerni la dramarton kaj fariĝi aktoro, se mi jam fariĝis 'malsaĝulo'?"

La instruistoj faris ĉion eblan por restarigi al ili la memfidon aparte per monstro de la faktoj ke ili havas riĉan scion de produktado, ke ili lertas pri kanto kaj danco, ke ili povas vivece prezenti la

*La ĉefludantoj de "Princino Venĉeng" Ĝamba kaj Losangcering.*  
Foto de Hinhua





La ĉefdelegito kaj vicdelegito de la Tibeta Svata Delegacio.

Princinoj Venĉeng kaj Honghua.

La princino kaj paŝtistoj.

Skizoj de Je Ĉianju

aferojn, al ili familiarajn, kaj ke ili kapablas rapide ellerni la han-lingvon, kiuj pruvas, ke ili ja posedas la saman intelekton kaj talenton kiel la aliaj. Kaj krome estis montrita al ili la signifo, kiun havas ilia lernado por la tibeta popolo. Finfine, tiuj ĉi penadoj fariĝis movfortoj stimulantaj ilin al konkerado super la malfacilaj. La situacio ŝanĝiĝis, kaj en la klaso nun ekvigliĝis la studentoj. Anstataŭ silenta sidado en la pasinteco, nun ili senĝene faris demandojn dum lekcionoj, ili uzis en notado ĉiajn skriborimedojn por si disponeblajn: la hanlingvan kaj tibetlingvan skribojn, la fonetikajn literojn kaj eĉ bildojn kaj signojn. La instruistoj ankaŭ lernis la tibetan lingvon kaj adaptis siajn instru-metodojn al novaj kondiĉoj uzante dum lekcionoj diagramojn, desegnojn, ekzemplajn ludojn kaj tiel plu. Ili konstatis kun ĝojo ke la studentoj kreskadis tag-nokte kiel novaj plantidoj sin banantaj en sunlumo. Dum lernaj tagoj, kaj eĉ en dimanĉoj, la studentoj ofte kolektiĝis tri-aŭ kvinope en la koridoroj aŭ sur la herbejo, studante dramojn aŭ legante literaturajn verkojn. En la halo por provludo, aŭdiĝis de tempo al tempo laŭtaj dialogoj: en la danchalo ĉiam troviĝis studentoj farantaj ekzercojn en dancarto. Post diligenta praktikado, la tibetaj gejunuloj finfine korektis siajn fizikajn difektojn postlasitajn sur la korpo.

Por observi fenomenojn en la reala vivo kaj riĉigi la perceptajn sciojn, ili ofte prezentis mallongajn teatraĵojn, verkis drametojn, ludis pilkojn, spektis teatraĵojn kaj ĉiam enskribis en siajn notlibrojn ĉion viditan aŭ aŭditan kaj utilan al sia pro-

fesio. Post nelonge, ĉi tiu klaso fariĝis avangardo eminenta ĉu en lernado aŭ en pensmaniero, ĉu pri unuiĝo aŭ pri higieno en la kolektivo. La teatraĵoj de ili verkita kaj prezentita, kiel *Indigna Flamo de la Neĝmonto*, *Sinrakonto de servutulo* ktp. akiris unuaniman aplaŭdon de la laboristoj kaj kamparanoj dum prezentoj faritaj en fabrikoj aŭ kamparaj komunumoj. Kaj Vangdue, kiu iam mem nomis sin "malsaĝulo" distingiĝis per sia speciale rimarkinda progresado en lernado. En ludarto li estas la plej bona studento. Ludante la rolon de laborulo en mizero li ĉiam sukcesis emocii la rigardantaron ĝis larme, kaj en rolo de negativa tipo, li ĉiam elvokis indignon en la rigardejo.

En la lasta semestro, ili decidis ludi la dramon *Princino Venĉeng* kiel sian kursofinan prezentadon.

*Princino Venĉeng*, donante aŭdiencon al la Tibeta Svata Delegacio, pride-mandas al la ĉefdelegito (ludita de Vangdue) pri Tibeto. Foto de Hinhua





En la preparado ili aŭskultis prelegojn pri historio, rigardis historiajn dramojn, vizitis muzeojn, por ekoni la vivmanieron de la antikvuloj de antaŭ mil jaroj. Krome, sub gvido de la instruisto de klasika ĉina danco, ili lernis plenumon de la "ondmaniko", scenejan paŝadon, diversajn korpmovojn ktp.. La 18-jara fraŭlino Ĝamba, kiu ludis la rolon de Princino Venĉeng penegre ellernis rondiradon sur scenejo kaj recitadon de dialogoj kaj por ĉiu paŝo kaj ĉiu frazo ŝi enverŝis sian plenan energion. La kunlernantoj severe postulis de ŝi, ke ŝi ludu la rolon de Princino Venĉeng nepre plej perfekte. Sodnamrabdan, kiu ludis la rolon de Li Daŭĝong, korektis sian kutimon de rapida parolmaniero kaj ĉiam praktikis laŭtan kaj ritman deklamon de la dialogoj post fermitaj pordoj. Li volis enkorpigi en siaj tononuanco kaj korpmovoj la temperamenton kaj personecon de la saĝa kortegano de Tang-dinastio. Losangĉering kiu mizere vivis antaŭe en Lama-templo ekde sia infaneco, provis imiti la serenon, ĝojplenan ridegon de Reĝo Sunzankampo. Ĉiumatene kaj iam ajn post la lecionoj, li ĉiam ekzercis sin je ridego ie en liberaero. Unu tagon, kiam li trovis sian ridegon nature kaj agrable farita, li kuris ekscitite por



*Princino Venĉeng (ludita de Ĝamba) kaj Reĝo Sunzankampo (ludita de Losangĉering) renkontiĝas ĉe la bordo de Nu-rivero.*  
Foto de Hinhua

informi al siaj kunlernantoj, ke li nun povas jam ridi feliĉe.

*Princino Venĉeng* estis sukcese prezentita. Per la kristaliĝo de sia arta laboro la unua generacio de tibetaj geaktoroj de modernaj dramoj refoje pruvis konvinke la feliĉan vivon de la tibeta popolo liberiginta el sub la jugo de la servuta sistemo.

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KUR

## Filma Projekcio en Tibeto

Estas nun en Tibeto 120 kinaj unuoj kun pli ol 300 laborantoj; eĉ en la plej malproksimaj vilaĝoj de la Montosuda Regiono oni ankaŭ povas rigardi kinoprezentadon. Sed antaŭ 4 jaroj, en la tuta Tibeto troviĝis nur kelke da kinaj unuoj. Tiuj ĉi kinotrupoj tutjare faris prezentadojn por la tibetaj fratoj, kaj ĉiam devas vojaĝi trans montojn en tre maloportunaj trafikaj kondiĉoj. Komence post la Liberigo, la tibetaj kamparanoj ofte kunportis sekajn manĝaĵojn kaj rajde sekvis la kinotrupon unu-du cent liojn por rigardi filmojn du-tri-foje antaŭ ol ili kontente reiris hejmen.

## Libro-presado per Porcelana Kompostajo

Ĉinio inventis presarton ksilografian antaŭ ĉ. 1,300 jaroj. Poste en la jaro 1045, Bi Ŝeng eltrovis presarton per moveblaj karakteroj el argilo. En 1314, Vang Ĝen faris tiajn el ligno; kaj fine de la 15a jarcento, Hua Suj

komencis uzi kupron por fari moveblajn karakterojn. En 1718, Hju Ĝiding iniciatis uzadon de moveblaj karakteroj el porcelano. Plifacile renkonteblaj estas nun libroj presitaj per lignaj kaj kupraj karakteroj moveblaj, sed malofte oni vidis libron presitan per porcelanaj karakteroj. Antaŭ nelonge, la Ŝanhaja Vendejo de Antikvaj Libro trovis unu ekzempleron de la libro *Komentarioj de Goŭ Ji*, kiu estis presita per porcelanaj prestipoj kaj la tempo de elpenso de tiu presarto estas determinita per la antaŭparolo verkita de Hju Ĝiding por tiu ĉi libro.

## Kombina Kuracado por Ostorompo

La Oficejo de Higienaj Aferoj de Siĉuan-provinco organizis en la lasta jaro studgrupon pri ostopatiaj problemoj por studi, kolekti kaj disvastigi la sperton de la kombina kuracado de ostorompo per la ĉina tradicia kaj okcidenta medicinoj. Dum 10 monatoj, ili

aplikis la kombinitan kuracmetodon kaj kuracante la vundan parton ili bone priatentis la tutan korpon kaj tiel plene disvolvis la efikon de kuraciloj uzitaj. Gipsobandaĝo ne plu estas uzata por la ostorompitoj kiel antaŭe. Sed la parton de la rompita osto oni laŭeble fiksas per mallonga lignaj kunpremaj tabuloj. La paciento estas periode masaĝata kaj pri-versata per medicina vino, krom prenado de la ĉina tradicia ostopunkuniga medikamento kaj aliaj pocioj helpate de kuracisto kaj flegistino. Kaj laŭ la stato de la malsano oni konsilas kaj helpas la malsanulojn fari diversajn ekzercojn por ke la movo de aliaj artikoj ne estu malhelpata kaj ankaŭ la cirkulado de la sango estu pli malpli normala dum la ostorompa periodo. Tio bone efikas al resaniĝo kaj kuniĝo de la rompita osto. La grupo kuracis tiamaniere pli ol 300 pacientojn de kompare seriozaj kazoj, atingis bonan rezulton. El la akumulita sperto oni skribis 5 disertaĵojn.

# Vortoj de Knabo apud Lago

*La verkinto Vang Tongĝaŭ (1897-1958) naskiĝis en Ĝuĉeng, Ŝandong-provinco. Lia unua verko aperis en la jaro 1917. Li partoprenis patriotan kaj demokratian Maj-kvaran Movadon de kultura revolucio. En la jaro 1921, li fondis kune kun Ĝeng Ĝenduo, Ŝen Janbing k. a. la Literaturan Societon, kiu estis la plej influa literatura rondo en la komenca periodo de la moderna literaturo de Ĉinio.*

*Antaŭ la Kontraŭjapana Rezistmilto en 1937, li laboris kiel la ĉefredaktoro de la gazeto "Literaturo". Liaj verkoj antaŭ 1927 ĝenerale donis tro da emfazo pri la abstraktaj amo kaj belo, dum tiuj post 1927 ĉefe sin dediĉis por malkaŝi la maljustecon en la reala vivo. En 1937 li instruis en Ĝinan-universitato en Ŝanhajo. Post la Kontraŭjapana Rezistmilto li laboris kiel redaktoro de Kajmin-librejo en Ŝanhajo. Post la Liberiĝo, li servis kiel estro de la Kultura Buroo de Ŝandong-provinco kaj popola reprezentanto al la Tutlanda Popola Kongreso. Inter liaj romanoj troviĝas "Vespero", "Folio" kaj inter liaj novelaroj, "Pluva Nokto Printempa" kaj "Prujno-spuro".*

—La Red.

**L**A DELONGE renoma lago en mia hejma urbo estis plena de fragmitoj kaj sennombraj ŝalupoj, pro kio ĝi impresis per ĝena malvasteco, mallarĝeco kaj brupleneco. Kaŭze de tio, mi ne tre ŝatis ofte promeni tie. Kelkfoje mi remis sur la lago kun kelkaj amikoj. Je ĉiu fojo ĉe la vesperiĝo kune aŭdiĝis ĉiaspecaj sonoj malharmoniaj: tamtamado, tamburado, akra grincado de huĉin-o\*, malbela kantado, voluptaj kriaĉoj de viroj, koketaj ridoj de virinoj kun vizaĝo dike pudrita kaj hararo brile pomadita. . . . ĉio ĉi tio, miksitita kun krioj de kolportistoj sur boatoj, preskaŭ "boligis" la kvietan lagakvon. Tial, dum mia promenado sur la lago, mi povis nur enprofundiĝi en miaj pensoj pri personaj aferoj, nenion rigardante aŭ aŭskultante. Ĉe la subiro de la suno, kiam la lago spegulis la estingiĝantajn sunradiojn, mi tamen kutimis iri sola al trankvila angulo apud la lago por min refreŝigi en la malvarmeta aero. Promenante, mi aŭskultis la postpluvan kanton de la ranoj sin kaŝantaj inter herboj, rigardis la pepantajn birdojn, kiuj saltadis inter salikvergoj, kaj tio donis al mi certan intereson. Tia momento ĉiam turnis mian atenton al admiro pri la belaĵo de la naturo, sed aliflanke naskigis en mi senfinan kaj vagan meditadon.

Sur la digo de la lago, la postpluvaj salikoj freŝe verdis en la krepuska lumo, nigreruĝa kaj purpura. Oriente de iu templo, sin trovis lotuskreskejo, kie la lotusfolioj estis grandegaj kaj leviĝis preskaŭ pli alte ol homo. Sub la folioj, la lotusfloroj sin prezentis pure blankaj, kvazaŭ skulptitaj el jado. Kiam la tagmezo forpasis, ŝajnis, ke ili iom post iom komencas fermi siajn petalojn. Hazarde aperis unu

aŭ du abeloj, kiuj, ravitaj de la flora aromo, ankoraŭ flirtis tien kaj ĉi tien, ne volante iri tuj hejmen. Sur la verdega akvo, la vesperruĝo ore disradiis, kaj la brilo de la subiranta suno en la krepusko ankaŭ prenis mirindajn kolorojn. Flagris antaŭ mi tavoloj de lumo kaj de koloroj, ondantaj kaj puŝiĝantaj inter si. Ĉar post la hieraŭa pluvego, kiu daŭris ses ĝis sep horojn, hodiaŭ la vetero fariĝis ĝueble hela, mi promenis sola al la okcidenta lagbordo, por ĝui la postpluvan pejzaĝon ĉe la lago. La per ŝtonpecoj oblikve pavimita vojo estis kovrita de muskoj, kaj miaj ledŝuoj, tretinte sur ili, lasis klarajn paŝosignojn.

Sur la lago bruis tiam homaj krioj kaj intensaj kvereloj. Mi do direktis min malrapide al la alia flanko de la ŝtona vojo. Ĉe la akvo, dancis en la okcidenta vento la maldensaj salikvergoj kaj la ĵus ekflorintaj poligonatoj kiuj kreskis apud la tremantaj fragmitoj. Ĉi tie, oni povas diri, estis la loko plej kvieta kaj plej soleca en la tuta ĉirkaŭaĵo de la lago. Krom unu aŭ du hazardajn vojpasantojn, oni povis renkonti tie nur la birdetojn, kiuj, plendante pri la vesperiĝo, pepis sur arboj, akompanate de la intermitaj kvakoj de ranoj inter la sovaĝaj herboj.

En tiu momento, mi sentis min multe pli serena ol kutime. Sed al tia momento, kiu forpasas en pal-



\* Dukorda muzikilo ludata per arĉo.



Ilustrajoj de Hua Sanĉuan

pebruma daŭro, mi ne sentis fortan altiriĝon de la koro. Ĉar la momenta sereno rememorigis al mi la malnovajn versojn pri la subiranta suno kaj vesperigo\*, mi ja iom timis pripensi ĝian allogecon.

Meditante kun kapo klinita, mi eĉ ne emis levi kaj relevi la pezajn piedojn. Sur la ĉielo, la nigreruĝa kaj purpura krepuska lumo fariĝis ĉiam malpli hela. La sunaj radioj jam plejparte falis en la akvon kiu ilin resendis. Mi sciis, ke la nokta horo iom post iom alproksimiĝas, sed mi ne volis tuj reiri hejmen. Mi do elektis blankan ŝtonon apud la lago kaj sidiĝis sur ĝin. Aŭdante la fruaŭtunan vesperan ĉirpadon de la restantaj cikadoj, mi ekperceptis, ke al la lago, vualita de la vespera krepusko, la aŭtuno jam alvenas. Mi sidis sola sub salikoj kaj rigardis al la malforta krepusko, kiu disiĝis pli kaj pli foren kaj malhele. Malproksime flagretis kelke da lamplumoj. La vetero estis tre varma, kaj la tagfino donis freŝan malvarmeton. Samtempe, ŝajne pro tiu ĉi malvarmeto, mi tamen eksentis iom da malpleno kaj necerteco.

Kiam mi senkonscie lasis flui miajn pensojn, subite io susuris post la salikoj. Tio iom timigis min en la silento. Kelkan tempon poste, aŭdiĝis delikataj paŝoj, vagantaj en la fragmitejo kiu troviĝis tuj malantaŭe. Mi salte ekstaris kaj, ĉirkaŭirinte la salikojn, min turnis malsupren al la bordo post la fragmita kreskejo. Tiam la malheleco jam ne permesis vidi klare. Sed apud la fragmitoj konturiĝis malgranda homa silueto sur tera duneto.

“Kiu vi estas?” mi laŭte demandis.

La silueto tamen ne respondis al mi.

Ĉi tie estis angulo tre izola de homoj, kie neniu ŝatis resti, precipe en vespero. Krom tio, la mallumo envolvis ĉiam pli da spaco, kaj la interfrotado de la salikaj kaj fragmitaj folioj eligis de tempo al tempo susurojn. Ekregis min ioma teruro. Mi kriis ankoraŭfoje la tri vortojn “Kiu vi estas?”.

\* Aludo pri la versoj de Li Ŝangĵin el Tang-dinastio:  
Senlime belas la vespera suno,  
Sed venos tuj la horo de mallumo.

Apenaŭ mi returnis min, kiam la malgranda nigra figuro sur la tera duneto donis al mi la jenan respondon per melankolia kaj malforta voĉo:

“Mi estas Ŝunĉjo, . . . mi ĉi tie fiŝokas. . .”

La lastan vorton li forglutis treme. La voĉo certigis al mi, ke tio estas knabo dekunu- aŭ dekdujara. Sed mia dubo eĉ pli kreskis, kaj mi demandis lin:

“Estas jam malhele, ĉu ankoraŭ eblas fiŝon kapti el la akvo? Ĉu vi povas vidi?”

La figureto denove silentis.

“Kie vi loĝas?”

“Ĉe Matoŭ-strateto, apud Ŝunmen-strato. . .”

Tiuj vortoj rememorigis min, ke ŝajne mi ie aŭdis ĉi tiun malfortan voĉon. Mi faris unu paŝon pli antaŭen kaj demandis: “Ĉu vi loĝas delonge ĉe Matoŭ-strateto?”

“Ne,” la knabo rapide respondis, “antaŭe mi loĝis ĉe Janping-strato. . .”

Pasintajo tuj venis al mi en la kapon. “Oh! Ĉu vi ne estas knabo de la familio Ĉen? . . . Ĉu via patro ne estas ferajisto Ĉen Gju?”

Tiam la knabo jam tiris la fiŝstangon el la akvo, kun nudaj piedoj li kuris de sur la tera duneto kaj diris: “Jes, . . . mia paĉjo estis ferajisto. Kiu vi estas?”

Mi proksimiĝis al la knabo por vidi lian fizionomion, kiu estis ankoraŭ pli malpli distingebla. Sed li tute malsimilis al la aminda Ŝunĉjo de kvin aŭ ses jaroj! La vizaĝo, plene nigra, estis ŝmirita oni ne scias ĉu de koto aŭ de karba fulgo. Li portis ĉemizeton el blua katuno kaj havis krurojn plejparte nudajn. Lia korpo odoris je tero kaj ŝvito. Trovinte, ke mi scias lian familian nomon, li fiksis sian rigardon sur min, kvazaŭ ŝtoniĝinta. Vere, li ne sciis, kiu mi estas; vere li ne plu min memoris. Kiam Ŝunĉjo havis kvar aŭ kvin jarojn, mi ankoraŭ tre ŝatis ludi kun infanoj. Ofte kiam mi pasis preter la pordo de lia loĝejo, mi vidis, ke li ŝidas kun sia patrino sub la granda maljuna soforo, kiu etendigis sur la tero densan ombron. Ĉe la sino de la partrino, li kutimis kanti por mi la infanan-kanton pri koketo.

Nun pasis pli ol ses jaroj, kaj dum tiu tempo mi ofte forestis de mia hejmo. Poste mi aŭdis de mia familio, ke la familio de Ŝunĉjo, kiu loĝis ĉe la apuda strato, transloĝiĝis. Sed tion mi nur aŭdis, kaj ne sciis, kien ili transloĝiĝis. Ĉiam, kiam mi trapasis tiun straton kaj vidis la ŝanĝitan nompaperon gluitan sur la pordo de la malnova loĝejo de Ŝunĉjo, mi sentis bedaŭron, kvazaŭ mi perdus ion, kio min akompanadis. Estis do tute nature, ke min mirigis la neatendita renkontiĝo kun li en tiu malhela vespero kaj sur la soleca bordo de la lago. Pli mirige estis: kial la pasinttempa Ŝunĉjo kun pomaj vangoj kaj blankaj manetoj aspektas nun preskaŭ kiel strata almozuleto? Lia patro estas honesta ferajisto; li devas esti kapabla vivteni sian infanon. Oh!

Mi tuj kondukis lin al la blanka ŝtono, sur kiu mi estis sidinta, por detale konversacii kun li.

Unue mi rakontis al li, kiel mi ofte vidis lin kiam li estis kelkjara, kiel mi ofte amuze instigis lin kii kaj ridi. Tamen li nenion komprenis. Poste ni interparolis demandante kaj respondante.

“Kie estas nun via patro?”

“Hejme, oni povas diri, . . . .” respondis Ŝunĉjo heziteme. De lia senesprima rigardo mi vidis, ke li havas dubon pri mi, lia malnova amiko.

“Ĉu via patro ankoraŭ laboras?”

“Kio? . . . . Ĉiutage li estas ekstere, sed neniun fojon . . . . portas monon hejmen . . . . Laboras? . . . . mi ne scias.”

“Kaj via patrino?”

“Mortis!” respondis Ŝunĉjo simple kaj rapide.

Surprizo ekskuis min. Sed tio estis neevitebla por lia patrino, virineto maldika kaj malforta. Oni diris, ke dum dek tri jaroj post sia edziniĝo, ŝi naskis entute sep infanojn, sed fine nur Ŝunĉjo restas viva. Mi tamen ne atendis, ke la tempo homon forsendas tiel rapide!

“Kaj nun, kiun vi havas ankoraŭ en la hejmo?”

“Panjon, kiu poste alvenis. . . .”

“Oh! Ĉu via familio vivas pli malriĉe ol antaŭe? Jen via. . . .”

Efektive Ŝunĉjo estis knabo inteligenta ekde sia infanaĝo. Antaŭ mia senceremonia demando pri la “malriĉeco” de lia familio, li senmove rigardis al la nebula vualo kaj akvo en la malproksimo. Iom

poste, li klinis sian kapon kaj, post longa paŭzo, diris mallaŭte:

“Mi ofte havas nenion por manĝi! Paĉjo ne kutimas esti hejme. . . .”

“Kie li forestas?”

“Mi ne scias . . . . Nur post la matenmanĝo li hejmenvenas unu fojon . . . . Oni diras, ke li servas en fumejo de opio, . . . . sed mi ne scias kie.”

Tiujn vortojn li diris al mi mallaŭte kaj malrapide. Kaj mi jam sufiĉe komprenis, en kia situacio troviĝas nun lia familio. La momenta scivolemo puŝis min fari al li pliajn demandojn:

“Kiom aĝas via . . . . nuna patrino? Ĉu ŝi estas ne malbona?”

“Oni diras, ke mia patrino ne havas pli ol tridek jarojn. Ŝi devenas de la familio Niŭ, kiu loĝas interne de la Orienta Urbopordo. . . .” Kiam li tion diris, en lia mieno aperis iom da hezitemo kaj maltrankvilo.

“Ĉu via patrino batas vin?” mi aldonis.

“Ŝi? Ŝi ne havas tempon . . . .” li respondis kategorie.

Por ŝi, mi pensis, juna virino, kiu vivtenas la tutan familion en la nuna stato, estas nature, ke ŝi ne povas disponi multe da libera tempo.

“Kian laboron do ŝi havas? . . . .”

“Laboron? . . . . nenian. Sed ĉiutage ŝi komencas multe sin okupi ekde la posttagmezo. Pro tio mi ne estas permesata resti hejme. . . . Ĉiun vesperon, mi estas ĉe tiu ĉi fragmitejo, nur ĉi tie, . . . . ĉi tie!”

“Kio? . . . .”

Ŝunĉjo ankaŭ sciis imiti la manieron de la plenaĝuloj. Eliginte el siaj naztruetoj unu “hm!” li diris: “Mia hejmo estas ofte vizitata de gastoj! Ĉiunokte du aŭ tri, sed kelkfoje neniom. . . .”

Mi tremetis pro liaj vortoj. . . . Sed li daŭrigis:

“. . . . Panjo ankoraŭ havas monon por prepari manĝon. . . . Kiam la gastoj venas, ŝi elhejmigas min, kaj min ne revokas antaŭ la meznokto. Paĉjo tion bone scias. Li neniam venas hejmon en la nokto. . . .”

Tion aŭdinte, mi klare komprenis, en kia medio vivas Ŝunĉjo. Mi estis kvazaŭ leganta novelon, kiu rakontas: pala kaj maldika knabeto, kun okuloj enprofundiĝintaj kaj haroj dishirtigitaj, ĉiutage vagadas nudpiede en fragmita kreskejo. Kun stomako malsata, li aŭskultas la parolojn de la amikoj birdoj aŭ de la amikoj ranoj ĉe la akvorando. Kaj de tempo al tempo li aŭskultas la venton inter la fragmitoj — la muzikon de la naturo. Sed lia patro estas humila servisto, kiu servas kaŝajn fumantojn de opio. Kaj la patrino, nur duonpatrino; por la vivtenado ŝi devas sin dediĉi al la plej dolora okupo: vendi sian korpon. Nur en profunda nokto, kiam apenaŭ vidiĝas vojpasantoj, la knabeto iras hejmen, akompanate nur de la steloj. Kaj morgaŭ, sekvos la samo! Vere mi ne kredis, ke la aminda Ŝunĉjo, blanka kiel jado,



kiun mi frekventis dum mia junaĝo, povas fali en tian staton. Fine, mi faris al li ankoraŭ unu demandon:

“Kiaj estas tiuj, kiuj vespere vizitas vian hejmon?”

Ŝunĉjo respondis: “Mi ne povis ofte ilin vidi, kvankam foje mi tamen vidis. Iuj el ili vestiĝis en griza jako kaj oblikve portis militistan kepon sur la kapo. Aliaj tutkorpe odoris je petrolo kaj portis kun si dikajn arĝentajn ĉenojn. Kelkaj surhavis robon. Ĉiunokte venas tri aŭ kvar, . . . sed kelkfoje neniom.”

“Kial do?”

Mi bedaŭris, ke mi persekutas la knabon per demandoj, sed mi ne povis min deteni de demandado.

Ŝunĉjo diris al mi kun ridi: “Kial vi ne scias? Sur la stratetoj ĉe Matoŭ-strateto ĉiu domo ricevas vespere gastojn! . . .” Li denove ridis, ŝajne pro tio, ke mi scias tiom malmulte, kvankam mi estas intelektulo.

Mi havis nenion por lin demandi plu; mi ankaŭ ne volis turmenti tiun ĉi naivan knabon, rakontigante al li tian tragedian historion. Dume li rigardis absorbita al la steloj en la maldensa nebulo de la vespero, kvazaŭ li estus ion meditanta. Mi pensis: Se la propra patrino de Ŝunĉjo vivus nun, eble ŝin ne trafus la sama sorto. Sed tia vivo por virino! Estas certe, ke ankaŭ lia duonpatrino trenas sian ekzistadon en infero!

Ho, familio! La organizo de familio kaj la persekuto de la epoko! La subpremo de la vivtenado en la socio: Mi venis promeni, intencante profiti la postpluvan veteron por min distri apud la lago, sed nun granda nombro da ĝenaj kaj komplikaj problemoj denove bolis en mia kapo.

Mi prezentis al mi en la cerbo la knabon, malsatan kaj mizeran, kiu, post vesperiĝo, venis sola al la bordo de fragmitejo, por trapasi tie grandan parton de la nokto. Mi ankaŭ pensis pri lia patrino, kiu, por vivteni la tutan familion, suferis la plej teruran kaj longdaŭran malhonoron, tian nehoman vivon. Jen la neevitebla senelirejo por la malriĉuloj sub la nuna socia reĝimo! Tion pensante, mi estis tiom senĉese obsedata de sufokaj sentoj kaj ĉagreno, ke mi ne plu povis sidi trankvile. La klara kaj freŝa impresoj, kiun ĵus faris sur min la vespera pejzaĝo de la lago, jam antaŭlonge falis en la profundon de la lago kune kun la mallumo.

Mi sciis, ke ĉi-momente Ŝunĉjo ne kuraĝas iri hejmon. Sed mi ne volis foriri de tiu ĉi senakompana knabeto, lasante lin rigardi sola la noktajn stelojn ĉe



la lago. Pro tio, mi sentis hezitemon, krom triston. Mi do sidis kun li sub la salikoj. Turmenti lin plu per demandoj mi ja ne volis. Samtempe, mi silente pensis pri geknaboj vivantaj en diversaj medioj, . . . kaj mi tremis pro la sorto de Ŝunĉjo, kiu estis nun kun mi, kaj de aliaj geknaboj, kiuj troviĝis en la sama stato kiel Ŝunĉjo.

Ĝuste en tiu ĉi perpleksiga momento, subite aŭdiĝis de la kontraŭa direkto voĉo maltrankvila, kiu vokis: “Ŝunĉjo, . . . kie . . . vi estas?” Mi ekstaris surprizite. Ŝunĉjo estis tiel timigita, ke li, jetinte en la akvon la fiŝstangon kiun li tenadis en mano, kuris laŭ la flanka vojeto al la direkto, de kie venis la voĉo. En konfuziĝo, mi ne sciis, kio okazis neatendite. Nun, de la kontraŭa flanko de la fragmitaro alkuris figuro de mezaĝulo, kiu ektiris Ŝunĉjon kaj lin forkondukis. Irante li diris: “Hodiaŭ nokte, via patro estas . . . arestita de policanoj. . . en la fumejo de opio. Kaj en via hejmo . . . la granda sinjoro Vu estas nun tie; kiu kuraĝus do iri al ĝi? . . . Knabo! La okcidenta najbaro onklo Li min petis venigi vin al . . . li . . .”

Iliaj siluetoj ĉiam pli malproksimiĝis, vualitaj de la densa nebulo de la nokto, kaj la vortoj de la mezaĝa viro ankaŭ fariĝis malklare aŭdeblaj.

Paŝon post paŝo mi min trenis hejmen. En la nokta nebulo iris tre malmultaj voĵpasantoj. Mi sentis mian koron peze premata, kvazaŭ ĉi-nokte la aerpremo eksterordinare malaltiĝus. La steloj, kiuj kondukis min sur la vojo, ankaŭ aspektis palaj, ne tiel brilaj kiel ordinare.

Aŭgusto de 1922

# Pri Ĉina Silkajo

**L**AŬDIRE en la pratempe oni jam komencis en Ĉinio la utiligon de silko. La elfosado de arkeologoj liveris por tiu ĉi aserto certan pruvon. En la jaro 1926, en Hia-gubernio de Ŝanhi-provinco arkeologoj elfosis multajn postlasitaĵojn de neolitiko, inter kiuj oni trovis kokonon tranĉitan de homo, tio pruvas ke antaŭ 5,000—15,000 jaroj en neolitiko oni jam konscie utiligis kokonojn. En Ŝang-dinastio (1700 a. K.—1200 a. K.) jam multe disvolviĝis la teknikoj de kulturado de morusarboj, bredado de silkraŭpoj, elkokonigo kaj teksado de silko. Tiamaj homoj ne nur sciis teksti tre delikatan sendeseĝnan silkajon, sed ankaŭ povis teksti silkajon rombe kraditan. Laŭ la *Libro de Kantoj*, la plej antikva poemaro de Ĉinio, en Ĝoŭ-dinastio dum 11-a—8-a jarcentoj a.K. la specoj de silkajoj jam estis variaj, aperis krom *ĝjuan* (kruda silkajo) kaj *bo* aŭ *ĉoŭ* (ĝenerala nomo por silkajoj), jam ankaŭ altkvalitaj silkajoj, kiaj *ĝin* (brokato), *hu* aŭ *ĝoŭ* (krepa silkajo) k.a. Inter objektoj entombigitaj kune kun mortintoj el la tempo antaŭ la oka jarcento a.K., kiujn elfosis arkeologoj, oni ofte trovis postsignojn de desegnaĵoj de diversaj silkajoj uzitaj kiel envolvilo. Ankaŭ tio atestas la verecon de la priskriboj en la klasikaj verkoj. En la Muzeo de Malnova Palaco en Pekino estas konservata jada tranĉilo el Ĝoŭ-dinastio kun postsigno de desegno de silkajo, el kiu, detale observante, oni povas rimarki ke ties vefteroj estis pli dikaj ol la varperoj. La pli dikaj vefteroj ol la varperoj, ne nur elstarigas la desegnaĵon, sed ankaŭ ebligas plirapidan teksadon. Tamen por tion atingi, estas necese havi progresintan teknikon de elkokonigo de silko kiel bazon. Ĉar el ĉiu kokono oni povas eltiri kelkmil futojn da silko, estas malsamaj la dikecoj de la silko ĉe la meza kaj ekstremaj partoj de ĉiu kokono, estas ne facile fari la vefterojn ĉiam pli dikaj ol la varperoj. Krome, por teksti krepan silkajon, estas necese intense tordi la silkfadenon. La fakto, ke en Ĝoŭ-dinastio oni jam povis kontroli la dikecon de silko, fari al ĝi fortan tordon kaj teni ĝin en firmeco, kaj poste teksti el ĝi krepon, atestas la altgradan disvolviĝon de tiama tekniko de elkokonigo de silko.

En nia lando, la bredado de silkraŭpoj, kulturado de morusarboj, ŝpinado kaj teksado estis de antikveco la produktaj laboroj de virinoj, pluraj poemoj el la *Libro de Kantoj* priskribis, kiel tiamaj virinoj bredas silkraŭpojn, kolektas morusfoliojn, teksas kaj tinkturas silkajon, kaj fine estas deprenitaj de la regantoj iliaj laborfruktoj. Dum la tempo 300 a.K.—300 p.K., brede silkraŭpojn kaj teksti silkajon fariĝis ĉiutaga

laboro de ĉiuj popolaninoj; tio estas spegulita en multaj folkloraj verkoj.

De Ŝang-dinastio en nia lando jam troviĝis ŝtataj silkmetriejoj, en Ĝoŭ-dinastio (1200 a.K.—403 a.K.) la regantoj komisiis multajn specialajn oficistojn por administri silkteksadon. Laŭ la klasika libro *Goŭ Li*, en Ĝoŭ-dinastio la ŝtataj metiejoj dividiĝis en ses departementojn kun tridek specialaj fakoj, el kiuj kvin rilatis al silkteksado kaj tinkturado. En Han-dinastio (206 a.K.—220 p.K.), en la ĉefurbo Ĉang-an estis speciale establitaĵoj du teksejoj la “Orienta kaj Okcidenta” por la imperiestra familio, kaj en Henan, Ŝandong, Siĉuan kaj aliaj produktaj lokoj de silko troviĝis ŝtataj metiaj oficistoj kolektantaj silkajojn por la imperiestro. La vivo de la regantoj estis tre luksa, eĉ iliaj hundoj kaj ĉevaloj estis vestitaj per silkajo. Depost la sesa kaj sepa jarcentoj p.K. disvolviĝis en pli granda skalo la ŝtata silka produktado. Imperiestro Jang (regis dum 605-617 p.K.) de Suj-dinastio ordonis fosi kanalon, kaj vojaĝis al sudo per ŝipoj kun veloj faritaj el koloraj silkajoj; kaj lia ŝiparo sinsekvis en vico longa je kvin kilometroj. Dum la tempo de Imperiestro Hjuanzong (regis dum 712-756 p.K.) de Tang-dinastio, Imperiestra Konkubino Jang-gujfej sola jam havis por si pli ol sepcent teksistojn kaj brodistojn.

Depost Han-dinastio, ĉinaj silkajoj estis konstante grandkvante transportataj eksterlanden, kaj fariĝis mondfamaj produktajoj. En la komenco la silkajoj estis transportataj tra la manoj de persoj al la Roma Imperio. Tiam la eŭropanoj ne kredis ke silko estas elsputita el la buŝo de raŭpoj. Tiam la komunika linio laŭ kiu oni vojaĝis de Ĉinio al la Okcidento estis nomata de la eŭropanoj “Vojo de Silko”, ankaŭ Ĉinio estis nomata “Lando de Silko”.

Dum certa tempo, por konservi la sekreton de silkproduktado, la imperiestro de Ĉinio malpermesis transsendi eksterlanden silkraŭpajn ovojn. Poste, laŭ *Historio de Tang-dinastio*, la tekniko de silkraŭpa bredado estis komunikita de interna lando unue al Hotian (en la nuna Hingiangna Aŭtonoma Regiono de Ujguroj). Kaj longe post tio iom post iom ĝi estis plue komunikita al la Okcidento. Laŭ iu okcidenta historiisto, en la jaro 550 p.K. iu misiisto de la Orienta Romo, kiu loĝis en Ĉinio dum multaj jaroj kaj akiris ĉiujn sekretojn de silkraŭpa bredado, elkokonigo de silko kaj teksado de silkajo, revenis kun silkraŭpaj ovoj kaŝitaj en bambutubo; kaj de tio komenciĝis la produktado de silko en Eŭropo.

# Versimila, Viveca kaj Simpla

— Pri Neolitaj Plastikaj kaj Pentraĵoj —


ĈIUJ, kiuj vizitas la Banpo-an Muzeon\* en Hi-an, la ĉefurbo de Ŝenhi-provinco, estas senescepte allogitaj de la fajencoj elfositaj el la ruino de Jangŝaŭ-kulturo antaŭ ĉ. 4000 jaroj. La fiŝfiguraj desegnaĵoj sur la fajencoj, plejparte sur vazoj kiaj pelvoj, estas tre variaj en formoj. El tiuj fajencoj iuj estis kompletaj kaj la aliaj, kvankam nur postrestaj fragmentoj, ankoraŭ rekompoteblaj. Tiuj desegnoj de fiŝoj estis vivece kaj spiritredone faritaj. Iuj estas plenaj de dekoracia gusto aŭ eĉ formitaj el du aŭ tri fiŝoj kunaranĝitaj. La desegno-strekoj estas fortaj kaj fluaj, donantaj klare la karakterizajn trajtojn de la fiŝo.

En la lastaj jaroj, krom ĉe Banpo-vilaĝo, oni elfosis fajencojn kun desegno aŭ skulptaĵo de animaloj ankaŭ el la ruinoj de Jangŝaŭ-kulturo en Miaŭdigoŭ-vilaĝo, Ŝan-gubernio, Henan-provinco kaj en Hua-gubernio kaj urbo Baŭgi de Ŝenhi-provinco. Kvankam ili estas ne multaj, sed ĉiuj tre antikvece simplaj kaj vivecaj, bone prezentantaj la nivelon kaj karakteron de tiutempaj plastika kaj pentra artoj.

Krom figuroj de fiŝoj, troviĝas ankaŭ tiuj de ranoj, lacertoj, cervoj kaj birdoj sur la fajencoj.




En Miaŭdigoŭ-vilaĝo estis elfosita fajenca peco de ruĝa pelvo kun aperturo internen turnita, sur kies blanka fundo estas pentrita per nigra glazuro rano kiu havas mallongan kolon kaj dikan ventron, kun multaj rondaj makuloj sur la dorso; estas vive figurita mallertmove dika rano. Dume sur alia sableca kruda ruĝa fajencpeco estas vivece reliefita lacerto, kvankam en rampa pozo, sed plena je moveco kaj ĉiam impresas al la spektantoj kvazaŭ ĝi forkurus, forlasante sian voston tuj ĉe ektuŝo, kaj tiu lacerto



ĝuste estas bona kontrasto kun la mallerta rano.

Desegno pri mamuloj, kiun ni hodiaŭ povas vidi, estas tiu de cervidoj, elfosita ĉe Banpo-vilaĝo. Sur argila vazo estas pentritaj kvar cervidoj, la kompono estas tre simpla sed la linioj klaraj kaj spiritredonaj. Ĝi estas vere malofta artaĵo.

En Hua-gubernio kaj urbo Baŭgi en Ŝenhi-provinco oni elfosis fajencojn kun desegnoj de birdoj. Kaj en Miaŭdigoŭ-vilaĝo estis trovita ankaŭ peco de vaz-orelo en formo de birdo. En



Baŭgi oni elfosis fajencan botelon kun maldika kolo en formo tre originala; sur la ŝultro de la botelo troviĝas vivece pentrita birdo kun longaj beko kaj vosto. En Liuziĝen, Hua-gubernio, oni trovis fajencajn pecojn, sur kiuj estis pentritaj per nigra glazuro birdoj ekflugontaj. La linioj kaj formo estas simplaj sed plenaj de vivo. La plej elstaraj artaĵoj estas du modlaĵoj tie elfositaj: la unua estas la fajenca agloforma dingo\*\* 40 centimetrojn alta kun brile nigra surfaco. La aglo kun iom levita kapo, beko hokforma kaj okuloj akraj, estas karakterizata per krueleco kaj fortco de viraglo; la alia estas fajencpeco en formo de kapo de falko, kiu havas malgrandan akran bekon kaj grandajn, rondajn okulojn en ambaŭflankoj kun plumformaj strioj ĉirkaŭe, ĝia formo estas viveca, kun abunda dekoracia gusto.

Tre malmultaj estas artaĵoj kun animalaj figuroj inter la elfosaĵoj antaŭe trovitaj en Ĉinio, sed la supre menciitaj elfosaĵoj, trovitaj dum la lastaj jaroj, montras ke la tiamaj homoj estis tre riĉaj je imagpovo, kaj ili kapablis modli la artaĵojn spiritredonaj, vivecaj kaj antikvece simplaj, tiel ke la verkoj restas eminentaj eĉ hodiaŭ.

\* Vidu EPĈ N-ro 4/1958, p. 140.

\*\* Dingo: kaldrono kun tri piedoj el antikva tempo.

# La Tektonoj

—Popola Rakonto de Taj-nacio—

**S**UR LA MONTDEKLIVO de Hjuanvej-strato de la Urbo de Tagiĝo sin trovas du altaj tektonoj (*tectona grandis*) kvazaŭ du grandaj ombreloj etenditaj sur la tero kaj en la zefiro kvazaŭ paro da geamantoj gracie dancantaj sur la verda monteto.

Ekvidinte tiujn ĉi plej fortikajn arbojn, la knabinoj de taj-nacio distre remantaj sur Lancang-rivero povas tuj rememori la antikvan legendon kaj la naĝantaj boatoj kvazaŭ alportus ilin en la mitan mondon. Rigardu, sur la vizaĝoj de la knabinoj jen brilas tiel dolĉaj ridetoj, jen perliĝas larmgutoj. La legendo pri tiuj ĉi tektonoj tiel kortuŝas la ampasiajn knabinojn ke ili ĝojas pro la feliĉo de la geherooj kaj ploras pro ilia malfeliĉo.

En la antikva tempo vivis sur Hjuanvej-strato bela knabino Jugianhong. Oni diris ke ŝi estis gemo en la homan mondon falinta el la mano de dio. La vizaĝo de la knabino estis tiel brila kiel brulanta oro kaj tiel bela kiel floro. De sia infanaĝo ŝi iradis kulturi la montan teron kune kun siaj gepatroj. Vidinte la alvenon de la knabino, la blankaj birdoj aflugis kaj kantis al ŝi kaj la simioj desiris por ŝi



Ilustraĵo de Jang Junking

dolĉajn mangojn. La tagoj pasis unu post alia dum ekfloris kaj ekvelkis la floroj. Iutage, la ardeo alportis al ŝi arbidon, kiun la knabino plantis apud sia duetaĝa bambua domo. Ĉiun tagon ŝi ĉerpis la plej klaran akvon el Lancang-rivero por akvumi la arbidon, de kiu elkreskis dek ses verdaj folioj. Kiam la knabino fariĝis deksesjara, ŝi estis kvazaŭ marta kalendulo disŝvebiganta aromon en la arbaro. Kiel al aroma floro svarmiĝas abeloj, post nelonge, la junuloj el la cent dek ĉirkaŭaj meng-oj\* svarmis ĉi tien por sin svati al ŝi. Ĉiuvespere kolektiĝis sen nombraj junuloj ĉirkaŭ la subĉiela fajrujo apud kiu la knabino ŝpinis. Iliaj kantoj kaj ridoj similis al pluvgutoj falantaj sur la foliojn de pizangoj. Iun vesperon Princo Ĝaŭven de Mengĝanba kaj juna ĉasisto Janpan venis samtempe al la bambua domo, ambaŭ prezentante al la knabino orajn florojn kaj ĉasajojn. Rimarkinte ke la princo estas juna kaj eleganta dum la ĉasisto saĝa kaj kuraĝa, la knabino ne sciis al kiu ŝi donu sian manon. Dum tri tagoj kaj tri noktoj ŝi ne povis fari decidon. Dolore ŝi sin apogis sur la arbeton. De la folioj defalis rosgutoj kaj sur la vangojn de la knabino verŝiĝis larmoj. En la nokta mallumeto la knabino forlasis sian amatan arbeton kaj revenis al la balkono de la bambua domo. Subite lumis hele la luno. La arbedo ekkantis en la zefiro svingante la kapon. La knabino alproksimiĝis al la fajrujo kaj trovis ke la princo kun eltirita sabro kaj la ĉasisto kun arbalesto kaj levtenataj sagoj en la manoj estas maltrankvile atendantaj sin alporti al ili feliĉon. Ŝi sidiĝis inter la du junuloj. Ŝi akceptis la sabron de la princo kaj facilmove prenis la arbaleston kaj sagojn de la ĉasisto. Al ili ŝi diris: "Kiu sin svatas al mi, tiu petu la arbeton, kiun mi plantis, diri al mi kiu havas la plej sinceran amon. Petu la arbeton diri al mi kies parolo povos forviŝi la larmojn for de mia vizaĝo kaj kiu povos forŝvebigi la malĝojajn nubojn for de mia vizaĝo. Al tiu mi donos mian koron." La du junuloj alkuris al la arbedo. La princo desiris po unu grandan folion ĉiutage, gravuris sur ĝi amkanton kaj pafis ĝin al la balkono kie la knabino brodis. Ĉiun tagon la knabino prenis la folion kaj laŭtleĝis la amkanton, sed ŝi ĉiam kapneis kaj ĝin jetis en la kudrokorbeton. Forpasis dek ses tagoj, sed la vizaĝo de la knabino estis ankoraŭ kovrata de malĝojaj nuboj. Rimarkinte la princon forlasi Jugianhong malespere, la juna ĉasisto aliris al la arbedo. Subite ĝi falis antaŭ li. La juna ĉasisto ekprenis la arbeton



# Floroj kaj Birdoj

Pentraĵoj en Ĉina Stilo



Lilio.

de Ĉen Zifen

松鷹圖  
魚飲路堂製  
謝乃柳




謝乃柳作山鶴  
吾南茶花  
魚飲路堂記



Hibisko kaj Birdo.

de Hie Giliu



Pino kaj Aglo.



de Hie Ĝiliu

岩  
 巢  
 齊  
 寫  
 工  
 用  
 采  
 人  
 法  
 謝  
 和  
 柳  
 印  
 印



Mont-kukolo kaj Kamelio de Junnan-provinco.

de Hie Ĝiliu

丁酉冬

雪深知歲租寐

寒山望以向南

氣田名花照山水

丁酉冬日寫於

省都一程外

半丁老人

丁酉

冬



丁酉

Kamelio kaj Narciso.

de Ĉen Banding

kaj faris el ĝi kordmuzikilon. Li ludis la muzikilon malsupre de la dua etaĝo de la bambua domo kaj esprimis sian elkoran amon al la knabino per muziko. Aŭdinte la melodion, la knabino forviŝis la larmojn, ridetante malsupreniris kaj invitis la ĉasiston en sian ĉambron. Ekde tiam ili fariĝis amantaj geedzoj.

Apud Lancang-rivero ĉiam aŭdiĝis iliaj ridoj akompanataj de la melodioj de la kordmuzikilo reŝantantaj super la rivero kaj en ĝia akvo enstampiĝis la du intime interligitaj koroj. Iutage, kiam Jugianhong kaj Janpan estis trinkantaj fruktosukon ludante la muzikilon, subite Princo Ĝaŭven alrajdis de sur la monto por postĉasi forkurantajn orajn cervojn. Kiam li klinis la kapon, li ekvidis la inversan ombbron de la interapoganta paro rebrilantan en la rivero. Lia koro estis kvazaŭ vundita de sago. Haltiginte la ĉevalon, li staris gapanta sur la montdeklivo, nerimarkante la orajn cervojn forkurantajn unu post alia preter li. Kiam Jugianhong karese manĝigis areknukson\*\* per sia buŝo en tiun de Janpan, la

diablo Ĵaluzo tuj penetris en la koron de la princo. Li levis la arbaleston kaj per unu sago paffaligis la du interamantajn birdojn. Janpan kaj Jugianhong falis sur la riverbordon. Tuj turniĝis la ĉielo kaj ekstremis la tero. Grizaj nuboj kaŝis la sunon kaj ĉion englutis mallumo. Ĉirkaŭprenante Janpan, Jugianhong ruliĝis en sanglago. Unu sago trapikis la korpojn de ili ambaŭ. Subite reaperis sur la ĉielo brila suno kaj iliaj korpoj transformiĝis en du fortikajn tektonojn rekte starantajn sur la tero. La fortikaj tektonoj, kies branĉojn povas rompi neniu uragano kaj kies trunkon povas faligi neniu glavo!

Gastoj el foraj lokoj! Ni nur rigardu tiujn ĉi du altajn tektonojn kaj ni tuj rememoros la ventegon kiu blovis tra la arbaro en la pasintaj tagoj. Kiel ni deziras ke la fidela amo de la homoj estu tiel fortika kiel la tektonoj!

\* *Meng-o: Tribo de taj-nacio.*

\*\* *Areknukso: Nukso de areko (Areca Catechu).*

**Ĝang Ĉuo:**

## La Kultura Parko de Kantono

**K**VAZAŬ smeralda rubando ĉirkaŭiras Kantonon la Perlo-rivero. Kaj la Kultura Parko de Kantono alkroĉiĝis kvazaŭ glimbrila perlo ĉe ĝia flanko.

Antaŭ nelonge, eksterlanda gasto vizitis la Kulturparkon de Kantono. Enirinte la pordon, li demandis scivoleme al la administra oficisto, "Kial vi nomas ĉi tiun la Kultura Parko?" La demandito gvidis lin rondiri tra la diversaj amuzejoj en la parko, la gasto rimarkigis, "Ĝi estas certgrade simila al la 'Granda Mondo' de Ŝanhajo, kie oni prezentas ĉiujn specojn de teatraĵoj kaj ĉuji-oj\*." Tamen, vizitinte la pavilonojn de Marproduktadoj, de Higieno kaj de Vaksstatuoj kaj la diversajn ekspoziciojn tiam elmontratajn, la gasto korektis sian rimarkigon, "Ne, ĝi tamen ne estas kopio de la 'Granda Mondo'. Prefere nomu ĝin kombinaĵo de kelkaj muzeoj en Pekino." Pli poste, la gasto estis gvidata promeni tra aleoj, kaj viziti delikate konstruitajn kioskojn kaj galeriojn gustoplenajn, artefaritajn rok-montetojn kaj surakvajn kioskojn dotitajn per natura beleco. Li vidis krome teĝardenon, aranĝitan meze de arbaro laŭ antikva stilo, elegantan kaj simplan, kaj sennombrajn kuriozajn florojn kaj arbojn. Plenajn horojn la gasto plezure ĝuis en la parko kaj ĉe adiaŭo, li konstatis: "Ĉi tie oni povas ripozi kun plezuro kaj

sindistri per diversspecaj amuzadoj. Samtempe oni povas ricevi socialisman kaj komunisman edukadon. Vere ĝi estas Parko de Kulturo."

### *Parko plena de printempaj pejzaĝoj*

Enirinte la parkon oni estas frapita de la sudlandaj trajtoj, kiuj karakterizas ĉiun herbon kaj ĉiun arbon tie. Kiel tropikajn arbojn, oni vidas kaŭĉukajn arbojn, kokosarbojn, palmojn kaj multajn

*Panoramo de la Kultura Parko de Kantono.*

*Foto de Huabaŭ*





*Tie ĉi geknabojn ravas laŭsezonaĵoj Floroj.*

*Liverita de la parko*

aliajn. Kiel famajn fruktarbojn de suda Ĉinio, oni vidas tiujn de banano, liĉio, cidonio, ananaso, divers-specaj oranĝoj ktp. Kvankam la arboj verdas dum la tuta jaro en Kantono, tamen la alterno de la sezonoj estas rimarkeblaj laŭ la floroj sur la arboj. Kiam ridas la persikfloroj kaj prunfloroj, jam estas la bunta printempo; kiam brilas la floroj de la granatarbo kaj bombaksofloroj\*\* ruĝigas duonon de la ĉielo, tio heroldas la alvenon de somero; la ebriiga ĉarmo de la oleandroj kune kun la safranoj kaj lotusoj anoncas aŭtuno-komenciĝon; kaj kiam aromas la kalikantoĉ kaj la unuaj montoprunfloroj, venos baldaŭ alia printempo.

Ĉi tiu granda parko kun areo de 80 mil kv. metroj estas aranĝita laŭ tre sagaca plano: rigardate de altejo, ĝi prezentas regulforman desegnaĵon; sed en la parko mem, ĉie oni sentas naturecon. En la parko estas pli ol dudek konstruaĵoj, ĉiuj estas aranĝitaj en karaktere apartajn ripozdistriktojn laŭ siaj respektivaj malsamaj formoj. Ekz-e, la formo de la Pavilono de Marproduktaĵoj similas al granda fiŝkapti ŝipo, ĉirkaŭata de vasta arbetaro, tiel ke oni vidas ĝin de malproksime kvazaŭ ŝipo veturanta sur ondanta maro. La konstruaĵojn interligas vojoj ombritaj de densaj verdaj ĉe ambaŭ flankoj, harmonie kunigante ilin en unu tuton. En iuj partoj de la parko tumultas la printempeco, dum aliajn partojn regas komforta kvieto. En la okcidenta parto, situas delikate eleganta ĝardeneto aranĝita laŭ la tradicia maniero de ĝardeno arto de Guangdong-provinco. Tie troviĝas la orkidea ĉambro, en kiu estas montrataj la plej diversaj specoj de orkideoj kaj multaj koridoroj kaj galerioj, variaj en formo kaj strukturo: laŭmura, surakva, zigzaga kaj duobla. Tie troviĝas ankaŭ la fama kolekto de ŝtonoj de "Hinglinguang" kiu amasigis dum pli ol 500 jaroj

ŝtonojn de kuriozaj formoj, prezentantaj diversajn vidarojn de la naturo kaj estaĵoj.


## *Riĉaj amuziĝoj kaj sportoj*

Por ŝatantoj de gajaj kaj bruaj distroj, tie estas riĉaj kaj variaj kulturaj-amuzaj kaj sportaj aktivadoj. Sole teatroj nombriĝas ok. Tie regule ludas profesiaj teatraj trupoj. Estas prezentoj de multspecaj operoj, jongladoj, koncertoj, ĉuji-oj kaj filmoj. Amatoraj grupoj ankaŭ prezentas tie muzikon, dancon, gimnastikon ktp. En la subĉiela marioneta teatro, oni ofte vidas ke la spektantoj ne volas forlasi la spektiaklon eĉ dum pluvetado: patrinoj kun infanetoj en la sino, patroj kun bubo sur la ŝultroj, knaboj starantaj sur siaj piedpintoj en la amaso kun streĉita kolo, ĉiuj atente rigardas la ludon de *Ribelo en la Ĉiela Palaco* prezentata de la Marioneta Teatra Trupo de Vuĝou, iuj kun malfermitaj ombreloj, aliaj en pluvmanteloj aŭ nur kun naztuko sur la kapo. Sub la podio de rakontistoj ĉiuvespere troviĝas eĉ neniu libera seĝo.

Alian vidaron prezentas la sportejoj kaj ludamuzejoj, plenaj de ĝojkrioj kaj bruoj en la sud-okcidenta parto de la parko, kie estas la turnanta radego, karusejoj de lignaj ĉevaloj kaj de aeroplanoj, la pafbudo ktp., kien enirinte la infanoj ne volas plu foriri. La plenkreskuloj, akompanantaj la etulojn, sentas sin je jardekoj pli junaj post kelkaj rondiroj

*Vespere la konkurso de la ĉina ŝako allogas al si multajn ŝatantojn.*

*Foto de Huabaŭ*




sur karuselo aŭ post kelkaj konkuroj en pafado kun la knaboj. Kontraŭ la turnanta radego estas la glitejo, la paradizo por gejunuloj kaj geknaboj. Rigardu, jen juna pioniro, kun ruĝa koltuko, naive, tamen serioze, instruas al iu PLA-onklo†† la fundamentajn movojn en glitado. Petolema knabino devige trenas sian junan patriron en la glitejon kaj petas ŝin gliti kune.

Norde de la glitejo estas la salono por tablotenis. Tie okazas maĉoj ĉiutage. Kvankam troviĝas en ĝi nur kelkaj tabloj, tamen nemal multe da lertaj ludantoj tie elbakiĝis. Kelkaj ĉinaj tablotenisistoj kun mondfamo kiel Ĵong Guotuan, Hu Keming, Ĝuang Giafu k.a., antaŭe ofte partoprenis en ludo ĉi tie.

Tamen, la plej multe vizitata angulo de la parko estas la ŝakludejo. Kantono estas konata kiel "Urbo de Ŝako". Ĉina ŝako estas tre populara, kaj rigardantoj ĉiam estas en plej granda amaso. En iuj okazoj, dekelkaj ŝaktabulegoj estas dise pendigitaj, por montri samtempe la ludon al dekelkaj miloj da rigardantoj.

## Riĉenhavaj ekspozicioj

Oni ŝatas la Kulturan Parkon ankaŭ pro la kvar riĉenhavaj ekspoziciaj pavilonoj, kaj la 50 ĝis 60 varienhavaj ekspozicioj ĉiujare okazantaj. En la Marproduktaja Pavilono oni ofte renkontas profesorojn de la Biologia Fakultato de Sudĉinia Pedagogia Instituto aŭ aliaj universitatoj, kondukantaj siajn studentojn ĉi tien por instrui per la objektoj. Ankoraŭ pli ofte oni renkontas instruistojn de mezlernejoj kun siaj lernantoj. Tiu ĉi pavilono ne nur prezentas la marproduktajn riĉaĵojn de Guangdong, sed ankaŭ per abunda kolekto de vivaj marproduktaĵoj aŭ iliaj preparitaj specimenoj, konigas al rigardantoj pli profunde sciojn pri la estajoj de la maro. Ankaŭ la Higiena Pavilono akceptas senĉesan torenton de vizitantoj. Tie estas montrataj heredaĵoj de la ĉina tradicia medicino, ekspoziciaĵoj pri fundamentaj scioj de fiziologio kaj higieno, kaj preventaj rimedoj kontraŭ diversaj epidemioj. La Vaksstatua



*Flora aromo kaj birda pepado forlavis dumtagan laciĝon.*  
*Liverita de la parko*

Pavilono prezentas vaksstatuojn faritajn de Ĉeng Ĝenhia, maljuna majstro de tiu metio. Tie kun la vaksaj statuoj estas montrataj ankaŭ kostumoj de ĉinoj en diversaj historiaj epokoj, kiuj interesas precipe tiujn, kiuj amas studi pri historiaj aferoj. La Floropavilono havas en si ĉiujn famajn florojn de suda Ĉinio. La arto pri kultivado de pot-plantoj kaj pri aranĝado de floroj en vazoj kies kuriozaj produktaĵoj superas eĉ la naturon en beleco rikoltas aplaŭdojn de multaj vizitantoj.

La diversaj portempe okazantaj ekspozicioj altiras ankoraŭ pli grandajn amasojn, ekz-e, la Ekspozicio de Revoluciaj Objektoj de Jen-an akceptis pli ol kvarcent mil rigardantojn dum unu monato.

\* Ĉuji-o: komuna nomo por la ĉinaj diversaj folkloraj artaj prezentadoj per la voĉo kun akompano de muziko aŭ ne, ekz-e, rakontado, kantrakonto, humora dialogo, sonimitado, ktp.

\*\* Ceiba pentandra.

† Calycanthus praecox.

†† PLA = Popola Liberiga Arme(an)o.

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KUR

## Dokumentoj de Tajping-Ĉielregno

Tajping-Revolucio estis la kampanara ribelo plej longdaŭra kaj plej grandskala en la ĉina historio, okazinta meze de la deknaŭa jarcento. Ĝi ekleviĝis 1851 en Guanghi-provinco kaj ĝia regado dum 14 jaroj atingis 17 provincojn el la 24. Kaj en 1864, kaŭze de la interna malharmonio

ĝi estis venkita de la feŭda regantaro. La historiaj materialoj en tiu ĉi periodo estis ankaŭ pliparte detruitaj aŭ falsitaj de la tiamaj regantoj. Tio faris al la ĉinaj historiistoj multan malfacilon en ilia studado. Dum la lastaj jaroj, multaj tiutempaj materialoj kun historia valoro estas trovitaj unu post alia. Antaŭ nelonge, la Historia Muzeo

pri Tajping-Ĉielregno en Nankino, sub la direktado de la specialisto pri la historio de tiu revolucio s-ro Luo Ergang, jam finkompilis la libron *Dokumentoj de Tajping-Ĉielregno* en 4 volumoj. Tio estas la rezulto de la kolekto kaj ordigado de la koncernaj materialoj dum ĉ. 10 jaroj fare de la Muzeo kaj eldonita kiel referencaĵo por la historiistoj.

# Nova Fizionomio de la Ĉina Dancarto

**E**N LA LASTAJ jaroj, la ĉina dancarto faris grandan progreson. Ĝiaj ĉefaj trajtoj en la kreado kaj interpretado estas la varieco de specoj, formoj, stiloj kaj temoj, la montriĝo de pli lertaj esprimrimedoj kaj esprimtekniko, kaj la kapablo speguli la vivon kaj esprimi la ideologion kaj kvalitojn de la popolo de pli multaj flankoj, por altiri al si ĉiam pli grandan publikon.

## La Riĉa Nacia Baledo

El la specoj de la ĉina danco, la nacia baledo estas unue menciinda. Ĝi estas nova artformo, iom post iom elkreskinta lasttempe sur la profunda bazo de la tradiciaj kant- kaj danc-arto. En la pasintaj jaroj estis filmitaj kelke da elstaraj naciaj baledoj, inter kiuj troviĝas *Kvin Ruĝaj Nuboj*, kiu rakontas, kiel la popolo de li-nacio sur Hajnan-insulo batalis kontraŭ la regado de Kuomintango kaj kiel ĝi venkis dank' al ĝia renkontiĝo kun la Komunista Partio; *Magia Lanterno de Lotusfloro*, kun mita enhavo; kaj *Hiaŭ-daŭ-huj* aŭ *Societo de Malgranda Sabroj*, kiu temas pri la antiimperiisma batalado de la popolo ĉe la sudo de Jangzi-rivero, dum la periodo de Tajping-Ĉielregno. Tiu lasta filmiĝis nur antaŭ nelonge. Krome, estas filmata ankaŭ *Manluo*, baledo de nacimalplimulto. En la pasinta aŭtuno, la baleda ensemblo de la Centra Teatro de Opero kaj Baledo vizitis Sovetunion kaj Pollandon, kie ĝi prezentis *Magian Lanternon de Lotusfloro*, *Lejfeng-Pagodon*, *Hiaŭ-daŭ-huj* kaj aliajn naciajn baledojn, kiuj estis unuanime admirataj kaj varme aplaŭdataj de niaj eksterlandaj amikoj.

El la grandaj baledoj lastjare verkitaj kaj surscenigitaj, citindaj estas la *Partizana Taĉmento*

*sur Kinling-Montaro* de la Teatro de Kanto kaj Danco de Hi-an kaj la *Paŝtisto kaj Teksistino* de la Sudĉinia Ensemblo de Kanto kaj Danco. La unua estis prezentita pasintsomere en Pekino kaj altiris grandan atenton de la dancistaj rondoj de la ĉefurbo. La arta karakterizaĵo de tiu ĉi baledo estas tio, ke ĝi, surbaze de la klasikaj kaj popolaj dancoj, ensorbis en si elementojn de ĉina popola atletismo, kio havigis al ĝiaj esprimrimedoj fortecon kaj freŝecon, kaj ankaŭ nacian karakteron; ĝia muziko estas tinkturita de densa loka koloro de norda Ŝenhi-provinco kaj, kun multaj akompanoj de kantoj folklorstilaj, sukcesas pli precize esprimi ĝian enhavon. Tiu ĉi baledo, per sia enhavo kaj drama strukturo, tenas en streĉo la koron de la spektantaro; ĝi donas novan sperton en la kreado kaj prezentado por la nacia baledo. La *Paŝtisto kaj Teksistino* prezentita pasintvintre en Kantono de la Sudĉinia Ensemblo de Kanto kaj Danco ankaŭ estas alte taksita de la tieaj artistoj. Tiu ĉi baledo, kies temo estas de ĉiuj konata popola ilegendo, substrekas ties antifeŭdan faktoron kaj, pere de la mitrakonto, prikantas la laboraman popolon kaj ĝiajn aspirojn. Tiu ĉi baledo grandnombre aplikas popolajn dancojn de la regiono de Guangdong kaj la belan guangdong-an muzikon; en kelkaj unupersonaj kaj dupersonaj lirikaj dancoj, ĝi provas uzi iujn metodojn de la eŭropa baledo kaj provizas la nacian baledon per sperto el alia flanko.

## La Okcidenta Baledo en Ĉinio

Krom la juna nacia baledo, alia artformo—la okcidenta baledo—ankaŭ komencas rapide kreski en Ĉinio. Ĝis nun pasis nur sep jaroj de kiam Ĉinio fondis sian unuan danclernejon, sed inter la fino de

La korea danco "Ĝojo".



Ĉina baleto "la Societo de malgranda Sabro".



"Sur la Vojo al Atuŝi" (Ujgura danco).








*La Danco de Ĉevalpaŝtistoj Kompilita kaj prezentata de Gia Zoguang (Mongola danco).*

Fotoj de Hinhua

*La baleto "Giselle".*



1959 kaj la komenco de 1960, establiĝis jam la Eksperimenta Ensemblo de la Okcidenta Baledo, kiu, post persista penado dum du jaroj, konkeris al si tiun ĉi arton, prezentis sinsekve kvar famajn klasikajn eŭropajn baledojn — *La Pirato*, *Vana Skrupulo*, *Cigna Lago* kaj *Giselle* — kaj multajn belajn fragmentojn de aliaj okcidentaj baledoj, kaj krome kreis kaj surscenigis sian propran grandan baledon *La Bela Fiŝvirino*.

*La Bela Fiŝvirino*, kiu rakontas pri la enamiĝo de juna ĉasisto kun la fiŝa feino, estas utila eksperimento en la naciigo de la formo de eŭropa baleto, kaj ankaŭ signifoplena provo de ĉinaj dancistoj por krei de alia flanko la nacian baledon. Ĝi aplikas pli la esprimstilon kaj esprimrimedojn de la okcidenta baleto, sed samtempe asimilas iujn korpmovojn de la ĉina klasika danco kaj intermetas plurajn kolektivajn dancojn de han-nacio kaj de nacimalplimulto, kio konsistigas ĝian originalan stilon. Nun la Eksperimenta Ensemblo planas sinprepari por prezenti la famajn okcidentajn baledojn *Esmeralda* kaj *La Fontano de Baĥĉisaraĵ*, kaj faras energiajn klopodojn por plialtigi la artan nivelon de sia prezentado.

La Eksperimenta Ensemblo jam sukcese edukis grupon da elstaraj junaj geaktoroj. Liu Kingtang, kiu ludas la rolon de la princo en *Cigna Lago*, kaj Baj Ŝuhiang, kiu ludas la rolon de la blanka cigno kaj de la nigra cigno, estas bone konataj kaj ŝatataj de la baledamantoj tra la tuta Ĉinio. Liu Kingtang, filo de malriĉa kamparano, komencis lerni baledon nur en 1957, sed nun jam fariĝis elstara baleto solisto. Li havas bonan saltkapablon, grandan lertecon, plastikajn movojn, plaĉan kaj poezian temperamenton. Baj Ŝuhiang ankaŭ estas tre talenta baleto solistino. En la granda peco da lirika danco de adaĝo en la dua sceno de la unua akto de *Cigna Lago*, en kiu sceno Odette unuafoje renkontas la princon, Baj Ŝuhiang prezentas, per precizaj movoj kaj subtilaj esprimoj, la mildecon, bonkoron, puran kaj amindan animon de Odette. En la dua akto, kiam ŝi ludas la rolon de la nigra cigno Odelia, ŝi sukcese faras la fame konatajn tridek du sinsekvajn rapidajn turniĝojn, kio montras la majstrecon kaj la firman bazon de ekzerciteco de la aktorino.

## La Unupersonaj, Dupersonaj kaj Tripersonaj Dancoj

Krom la baleto, la kreado de aliaj dancspecoj ankaŭ prosperas en la tuta lando. Aperis precipe multe da elstaraj dancoj unupersonaj, dupersonaj kaj tripersonaj. Ekzemple, la tripersona danco *Liberiĝo*, kiu priskribas la bataladon de la tibeta popolo kontraŭ la persekuto de la sklavmastroj; la militista danco *Ruĝaj Ostaroj* (de ji-nacio) kaj lirika danco *Longtambura Danco* (de korea nacio), *Lampdanco* (de mongola nacio), *Kolektado de Vinberoj* (de ujugur-nacio en Hingiang), *Pavdanco* (de taj-nacio), kiuj spegulas la vivon de naciaj malplimulto; la klasika danco de han-nacio *Printempa Rivero en Luna Nokto*; la dancoj *Kapti Malamikon por Informiĝo* kaj *Ĉevalo-dresisto*, kiuj prezentas la vivon en la armeo; la dancoj *Maljunaj Geedzoj Konkuras inter Si en Laboro*, *Transportantoj de Minaĵoj*, *Ho-ruk-kanto de Ĵonktiristoj sur Han-rivero*, kiuj spegulas la industrian kaj agrikulturan produktadon; ktp. Tiuj dancoj, kiel en la temo, formo kaj stilo, tiel ankaŭ en la esprimarto, ĉiuj havas sian apartan proprecon. Estas popola diro: "Malfacile estas prezenti solrolulan dramon kaj danci unupersonan dancon". La apero de tiuj dancoj signas rimarkindan plialtiĝon de la nivelo de la ĉina dancarto.

## Kristaliĝo de Amikeco

Ankaŭ la dancoj de Sudorienta Azio, Afriko kaj Latina Ameriko ofte aperas sur diverslokaj scenejoj en Ĉinio. Antaŭ nelonge, okazis en Pekino interpreta kunveno de unupersonaj kaj dupersonaj dancoj, en kiu oni vidis i.a. la birman *Klasikan Dupersonan Dancon*, la indonezian *Maskdancon* kaj la hindan *Balon-dancon*, interpretitajn de ĉinaj dancistoj, kiuj ilin lernis de eksterlandaj dancistoj dum aktivado de kultura interŝanĝado. La prezentado de tiuj dancoj multe kontribuas al la pliprofundigo de la amikeco kaj reciproka kompreno inter la ĉina kaj alilandaj popoloj. Por plie disvolvi la kulturan kaj artan interŝanĝadon kun azia, afrika kaj latinamerika regionoj, lasttempe fondiĝis en Ĉinio Ensemblo de Orientaj Kantoj kaj Dancoj, kiu sin dediĉas ekskluzive al la interŝanĝado de kant- kaj danc-arto kun tiuj regionoj.

# Fidela Amo kaj Sanga Akuzo

— Pri la artfilmo “Ĉin Niangmej” laŭ dung-a<sup>1</sup> popola rakonto —

**E**STAS ravaj la pitoreskaj montoj kaj klaraj riveroj en la regiono de dung-oj ĉe la limoj de la provincoj Hunan, Gujĝoŭ kaj

1. La blankhara maljunulo kantarakontas al gejunuloj la okazintaj.



2. La patrinflanka onklo urĝigas Niangmej-n edzinigi al sia filo.



3. Niangmej kaj Ĝulang adiaŭas siajn geamikojn por fuĝi la malracian geedzecon.



Guanghi, kie susure balanciĝas verdaj salikoj, ĥore kantas diversspecaj birdoj, ĉie ridas buntaj floroj, kaj ŝvebas la ĉarmaj muzikoj de ŝeng-o kaj ĉiaŭ-o<sup>2</sup>. Tie montoj staras apud montoj kaj riveroj grandaj kaj malgrandaj interplektiĝas kvazaŭ smeraldaj rubandoj en la nigreverdaj montvaloj. Kaj tie, ĉe la bordoj de Duluiu-rivero estas populara cirkulata la kortuŝa popola eposo de dung-nacio Ĉin Niangmej.

De la lasta jarcento la ĉarma kaj kortuŝa rakonto pri Ĉin Niangmej disvastiĝas en la dung-a folkloro en formoj de eposo, rakonto, longa kanto, kant-rakonto, kaj, sur scenejo en dung-opero, dancado kaj kantado kun muzikila akompano. Kaj dum la tempo de la reakcia regado la heroino brilis kvazaŭ torĉo, kiu reale, vikle kaj klare respegulis la vivon kaj batalon, la idealon kaj esperon de la dung-oj. Pro tio, ĝis hodiaŭ Ĉin Niangmej restas ankoraŭ amata, admirata kaj prikantata de la dung-oj kaj konservas sian brilan vivon en la koroj de la popolo. Nun Ĉin Niangmej estas jam filmita, kaj la vivo de dung-oj estas surekranigita.

La historio de la scenaro de l' artfilmo Ĉin Niangmej okazis en la loko antaŭe nomata Sanbaŭ en Gujĝoŭ-provinco. Ĝi prikantas la fidelan amon inter dung-aj gejunuloj, Ĝulang kaj Niangmej,

kaj respegulis la bravan kaj obstinan bataladon de la dung-oj sub la feŭdisma reĝimo.


Sur la ekrano aperas unue granda dung-a brokato kun bildo de “ruĝa fenikso en saluto al la suno”, kaj tuj sekve la tipe dung-stilaj konstruaĵoj — flora ponto super serpentuma rivereto kaj alte staranta tamburturo . . . jen, ekaperas blankhara maljunulo kiu kantas la prologon ludante sian amatan malnovan pipa-on<sup>3</sup>, kaj ĉirkaŭ li sidas gejunuloj ravite aŭskultantaj en silento:

*Rave sonas muzikiloj akompane  
al dung-kanto;  
Pri la malnova river' ĝi kantas  
por la aŭskultantoj.  
Kontraŭvolan edzinigon fuĝis  
Niangmej siatempe;  
Restas pri ĉi la legendoj sur la  
lipoj tra la lando.*

En la malnova socio, la akvo de la rivero fluis orienten al la maro, forportante, neniu povas scii, kiom da sango kaj larmoj de dung-oj, kiom da ĝojindaj kaj dolorigaj okazintaĵoj, kiom da feliĉoj pereigitaj kaj de kiom da homoj la juneco estis enabismigita!

Ĉin Niangmej vivis en la lasta periodo de King-dinastio (fine de la 19-a jarcento), kiam la laboruloj vivis sub la multobla subpremado kaj ekspluatado de la reakcia indiĝena prefekto<sup>4</sup>, la

4. Niangmej lavas la hararon survoje dum la forfuĝo.



5. La geamantoj sin ĉirmas en rokkaverno dum pluvo.



## Samtempa Apliko de Rimedoj Rigida kaj Elasta

Kiel la bildo montras, la ruĝa Ĉe regas la poziciojn b4 kaj c5, tiel ke la nigra G ne povas sin movi, kaj ke la nigra matos, se la ruĝa S ĉe ĉ3 havos ŝancon ŝakigi per moviĝo al c3 aŭ ĉ4. Sekve, kvankam la nigra havas du Ĉa-jn, tamen unu ne povas lasi la linion 4 kaj la alia ne la linion c. Nun ambaŭ povas manipuli nur siajn S-n kaj P-n por rompi la stagnan situacion; kaj ĉar ambaŭ estas sagaca kaj sprita, la partio finiĝas per egaligo.

1, P g9 — g8 S e9 — d9. 2, P g8 — g7 S d9 — d8. 3, P g7 — g6. . .  
Kvankam la nigra P sin pre-

## Konsilo de Zoŭ Gi al la Reĝo

— Anekdoto el la 4-a Jarcento a. K. —

**E**N LA EPOKO de Militantaj Regnoj (403-221- a. K.), sub la reĝo Vejvang de Ki-regno estis ĉefministro nomata Zoŭ Gi, kiu estis altkreska kaj tre bela. Iumatene, li ellitiĝis, sin vestis, surmetis la ĉapelon kaj sin rigardante en la spegulo, ĝoje demandis la edzinon: “Kiu estas pli bela, laŭ via opinio, mi aŭ S-ro Hju de la norda urbo?” La edzino respondis: “Belega vi estas! Kiel S-ro Hju povas kompari kun vi!”

S-ro Hju estis konata kiel belulo en Ki-regno. Do la vorton de sia edzino Zoŭ Gi ankoraŭ ne povis kredi kaj li demandis la kromedzinon: “Kiu estas pli bela, ĉu mi aŭ S-ro Hju?” La kromedzino respondis: “S-ro Hju estas malpli bela ol vi.”

La sekvintan tagon alvenis gasto el alia loko. Dum la interparolado, demandis Zoŭ Gi: “Kiu el mi kaj S-ro Hju, laŭ via opinio, estas la pli bela?” Respondis la

gasto: “S-ro Hju certe ne estas tiel bela kiel vi!”

Ankoraŭ unu tagon poste, S-ro Hju faris viziton al Zoŭ Gi. Profitante la okazon, Zoŭ Gi rigardis kaj rigardis S-ro Hju tre detale kaj trovis ke li mem estas ne tiel bela kiel la lasta. Rigardante al la spegulo, li eĉ konstatis ke li estas fakte multe malpli bela ol S-ro Hju.

Vespere, kuŝante en la lito li meditadis kaj konkludis: “Kial la edzino diris ke mi estas bela? Ĉar ŝi havas korinklinon al mi. Kial la kromedzino diris la samon? Ĉar ŝi timas min. Kial ankaŭ la gasto tion diris? Ĉar li bezonas mian helpon.”

Tiel li trovis unu veron. Li iris en la palacon kaj rakontis al la reĝo Vejvang pri la komparado de lia beleco kun tiu de S-ro Hju, dirante: “Mi ja scias ke mi estas malpli bela ol S-ro Hju. Tamen, mia edzino havas korinklinon al mi, mia kromedzino ĉiam min

## La Ĉinaj Poŝtmarkoj

Laŭbo kun Memorŝtono ĉe la Kabano de Du Fu 1-305 4c.

Portreto de Du Fu 2-306 8.c



La 93-a serio de poŝtmarkoj emisiita (25-V-1962) de la Ĉina Poŝto por memorigi la 1250-an datrevenon de la naskiĝtago de la granda ĉina realisma poeto Du Fu.

timas, kaj la gasto bezonas mian helpon, tial ili ĉiuj diris ke mi superas S-ron Hju en beleco. Nun Ki-regno estas lando forta kaj granda kun teritorio de mil-lia diametro kaj 120 urboj. La geservantoj en la palaco estas obeemaj al vi, la korteganoj vin timas kaj la aliaj en nia lando ĉiuj aspiras vian favoron. Do viaj okuloj estas tre kovritaj kaj viaj oreloj tre ŝtopitaj!” “Prave!” diris reĝo Vejvang kaj ordonis: “Iu ajn el la oficistoj kaj popolanoj kiu povos montri al mi miajn mankojn vidalvide, ricevos altan premion. . . .”





## LA ĈINA ŜAKO

**I**NTER la verkoj pri la ĉina ŝakludo estas tre multe da etudoj sed tre malmulte da "problemoj", ĉe kiuj matigo okazas en limigitaj—ofte du aŭ tri—movoj. En la ĉina ŝakludo nur ĉe kazoj sufiĉe komplikaj, ke kelkaj dekoj da sinsekvaj ŝakigoj estas necesaj, la aŭtoro faras specialan indikon, ekzemple en la junia numero de 1961 de la monata gazeto *Ĉina Ŝako* estas publikigita problemo, je kiu 61 sinsekvaj ŝakigoj estas bezonataj por fine matigi la kontraŭan marŝalon. El la etudoj 70 procentoj estas partioj gajnotaj de la unua movanto (ne ĉiam finitaj per matigo) kaj 30 procentoj tiuj de egaliĝo. Tiaj preskaŭ unuflanken kliniĝaj partioj gajnotaj de la unua movanto, pri kiaj ni jam donis ekzemplon en nia antaŭlasta numero (N-ro 2), estis

Ĝang Ŝiongfej:

## Etudo de

# Akuzo


la rakonto —

tre popularaj dum la unua duono de la 17-a jarcento. De ĝia posta duono la aŭtoroj de ŝakludaj verkoj por ekvilibrigi fortojn de ambaŭ flankoj intence aranĝas tiel ke la ruĝa havu kontraŭatakajn fortojn, kaj tiel kreiĝis partioj de egaliĝo. Ĉe plej komplikaj kaj malfacilaj partioj, troviĝas serioj da ŝajnoj kaj komplikaj, pro kiuj ĉiu el ambaŭ flankoj atingos egaliĝon, nur se ĝi faras neniun eraran movon, alie ĉiu el ili povas perdi la partion pro mismovo je unu el tiuj multaj turnpunktoj.

En 1916 dana ŝakisto Charles Kliene kompilis libron pri la fama ŝak-etudo *La Sep Steloj* (*The Seven Stars*) en la angla lingvo, en kiu estas kolektitaj tri cent variaĵoj. El tio oni povas vidi kiom komplika kaj malfacila

kaj respegulis la bravan kaj obstinan bataladon de la *dung*-oj sub la feŭdisma reĝimo.

Sur la ekrano aperas unue granda *dung*-a brokato kun bildo de "ruĝa fenikso en saluto al la suno", kaj tuj sekve la tipe *dung*-stilaj konstruaĵoj—flora ponto super serpentuma rivereto kaj alte staranta tamburturo . . . jen, ekaperas blankhara maljunulo kiu kantas la prologon ludante sian amatan malnovan *ming-an* kaj



estas tiu antikva ĉina partio. Hodiaŭ ni elektis unu interesan sed ne tre komplikan partion de egaliĝo por eksplikado, nome:

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KUR

### Postlaboraj Kolegioj en Ŝanhajo

En la lastaj kelkaj jaroj postlaboraj kolegioj en Ŝanhajo eledukis jam pli ol 1000 inĝenierojn el laboristoj, teknikistoj kaj oficistoj. Kaj aliaj pli ol 1400 personoj lernantaj tie finos siajn studojn en la kuranta jaro. Laŭ statistiko, la nombro de gelaboristoj kaj geoficistoj en Ŝanhajo, kiuj partoprenis la postlaboran lernadon jam atingis ĉirkaŭ dudek mil. La kursoj de la kolegioj ampleksas pli ol cent studobjektojn, kaj krome, specialaj kursoj estas starigitaj por kontentigi la apartajn bezonojn de la lernantoj kiuj havas riĉan praktikan sperton.

### Nacia Turniro de Tabloteniso en 1962

La Tutlanda Tablotenisa Ĉampionec-turniro de Ĉinio nunjare okazis en aprilo en Nanĉang. Ĉampionecon de la vira kaj virina turniroj unuopulaj atingis respektive 25-jaraĝa Jang Ĵujhua el Ŝanhajo kaj 26-jara Kiu Ĝonghuj el Pekino. Aliajn tri ĉampionecon konkeris: Li Fujong kaj Vang Ĝiaŝeng por la vira duopula, Ĝeng Mingi kaj Lin Himeng por la virina duopula kaj Hu Daŭben (viro) kaj Liang Liĝen (virino) por la miksa duopula. Kiu Ĝonghuj jam la 4-an fojon gajnis la landan ĉampionan titolon de la unuopula ludo de virinoj. Ĉi-foje, la turniro estis rimarkinda pro tio, ke la monda ĉampiono de la

vira unuopulo en 1961, Ĝuang Zedong estis per 1:3 venkita de Vang Ĝiliang, la monda ĉampiono por la konsola turniro en 1961, kiu estas fama pro sia firma defendo per tranĉa rebato kun la batilo horizontale tenata, kaj la monda dua ĉampiono por la vira unuopula en 1961, Li Fujong estis ankaŭ venkita de Li Ŝusen, 19-jara sportisto el Hebej per 1:3. Kvankam li lastjare venkis la lastan per 2:0. La batalo, en kiu Kiu Ĝonghuj venkis Lin Hujking je hareto per 3:2, estis ankaŭ tre streĉa. En la antaŭaj 4 partioj, ili estis egalaj per 2:2, dum la kvina, ambaŭ luktis per sia tuta forto, la intensecon montris la registroj: 18:18, 20:19 kaj fine 21:19, en favoro de Kiu Ĝonghuj.

Kiel la bildo montras, la ruĝa Ĉe regas la poziciojn b4 kaj c5, tiel ke la nigra G ne povas sin movi, kaj ke la nigra matos, se la ruĝa S ĉe ĉ3 havos ŝancon ŝakigi per moviĝo al c3 aŭ ĉ4. Sekve, kvankam la nigra havas du Ĉa-jn, tamen unu ne povas lasi la linion 4 kaj la alia ne la linion c. Nun ambaŭ povas manipuli nur siajn S-n kaj P-n por rompi la stagnan situacion; kaj ĉar ambaŭ estas sagaca kaj sprita, la partio finiĝas per egaligo.

1, P g9 — g8 S e9 — d9. 2, P g8 — g7 S d9 — d8. 3, P g7 — g6. . .

Kvankam la nigra P sin prezentas kiel oferaĵon al la ruĝa Es, tamen la lasta ne kuraĝas ĝin elimini per la movo 3, . . . Es ĝ5 : g6; ĉar se ĝi forlasus la palaccentron, tiam 4, Ĉa d4 — h4 + Ma h5 — ĝ5. 5, Ĉa c2 — ĝ2 ×.

3. . . S d8 — d7. 4, P g6 — ĝ6 Mi g5 — e7!. 5, Ĉa d4 — e4! S d7 — d6!


Tiuj movoj estas tre trafaj. La celo de antaŭeniĝo de la nigra Ĉa estas antaŭkondiĉi la manovron 6, S ĝ6 : h6 Ma h5 : h6, tiam 7, Ĉa e4 — e6 +, por ke poste 8, Ĉa e6 : a6, eliminante la ruĝan Ĉe-n, per tio la nigra G ekhavas eblon libere movi sin. Tiuokaze la ruĝa certe malvenkos. Sed la ruĝa travidas la kombinaĵon, tial ĝi movas sian S por antaŭe ŝirmi la Ĉe-n.

6. Ĉa e4 — d4! . . .

La celo de la nigra restas la sama, t.e. elimini la malamikan Es-n ĉe la fundo per sia P, devigante la Ma-n elimini la P-n, por ke la Ĉa povu elimini la ruĝan S-n ĉe d6 kaj samtempe ŝakigi por poste elimini la ruĝan Ĉe-n.

6. . . S d6 — d5!

La ruĝa kalkulas ke la nigra Ĉa ne povas forlasi la linion 4 sen samtempa ŝakigo, tial ĝi kuraĝas alŝovi ofere sian S-n. Pro ne sufiĉa atentemo oni probable faras manovron: 6, . . . S d6 — ĉ6, pensante ke la Ĉe estas ankoraŭ ŝirmata kaj nenio estas timinda.



## Niaj Danko kaj Donaco al Amikoj por la Paco

okaze de la 5-jara datreveno de la reapero de EPĈ.

Karaj legantoj kaj amikoj!

Nia modesta gazeto tuj travivos sian kvinjaran periodon post la reapero en 1957. En la ne tre longa tempo de kvin jaroj, ni sukcesis ion kontribui al la interamikiĝo de la ĉina kaj alilandaj popoloj, al la paco kaj al la esperanta movado. La sukceso apartenas al ni kaj ankaŭ al vi, karaj legantoj kaj intimaj kunlaborantoj. Por danki al via helpado kaj subtenado, ĝoje celebri kun vi la sukceson kaj akceli nian komunan aferon per pligrandigo de la leganto-amikaro, ni decidis: (1) redakti multkoloran altnivelan artalbumon de famaj ĉinaj pentraĵoj k. a. belartaĵoj kaj ilin donaci al:

a) ĉiu, kiu sukcesis varbi kvin abonantojn al nia gazeto (pli kvino, pli ekz.);

b) ĉiu, kiu aĉetas niajn E-librojn por minimume 10 \$US en unu fojo;

c) ĉiu aktiva kunlaboranto, kiu ofte utiligas materialojn el nia gazeto aŭ kontribuas al ĝi;

ĉ) ĉiu peranto de niaj eldonajoj.

(Proponoj de diverslandaj E-organizoj kaj lokaj E-grupoj pri perado de niaj eldonajoj estas bonvenigataj. Krom grandprocentan rabaton, la akceptataj perantoj rajtas ricevi ankaŭ la belan donacon.)

(2) rajtigi al ĉiu, kiu sukcesis varbi por EPĈ minimume 2 jarabonantojn aŭ aĉetas de ni E-ajojn por minimume 5 \$US, senpage ricevi nian gazeton por unu plena jaro (se oni jam abonis al EPĈ por 1963, li rajtas ricevi la ĵarkolekton de 1964).

Ni devas vin atentigi, ke la eldonkvanto de la albumo estas limigita. Por certigi al vi la ricevon de ĝi, estas konsilinde eklabori tuj kaj anonci al ni vian sukceson ne malpli frue ol la ĵarfino de 1962.

### La Administracio de EL POPOLA ĈINIO

Sed ĉiokaze, 7, P ĝ6 — h6 Ma h5 : h6. 8, Ĉa d4 — d6 + Ma h6 — h5. 9, Ĉa d6 : ĉ6! Per tio la nigra Ĉa kaj atakas la ruĝan Ĉe-n kaj gardas la ruĝan S-n ĉe ĉ3 de la moviĝo al ĉ4 por ŝakigi. Tiam la ruĝa malvenkos nepre.

7, Ĉa d4 — f4 S d5 — d6.

La celo de la nigra estas la sama kiel ĉe 5, tial la ruĝa devas denove ŝirmi sian Ĉe-n.

8, Ĉa f4 — d4 S d6 — d7.

Moviĝinte unu paŝon maldekstren la ruĝa S povas ankoraŭ regi la pozicion d6, tiam la nigra P ne kuraĝos interŝanĝe elimini la malamikan Es-n ĉe la fundo, ĉar kiam la ruĝa Ma forlasos sian sidejon, la nigra Ĉa ne povos moviĝi al d6 por ŝakigi vertikale. Se ĝi tion farus, la S ĉe d7 povus ĝin elimini tute facile.

# *Ekkoninte Esperanton*

— Memore al la 75-a datreveno de la eldoniĝo de la Unua Libro de Esperanto —

Pasis for jam 75 jaroj post la publikiĝo de la *Unua Libro de Esperanto* de Zamenhof. La faktoj pruvas, ke ĝi estas granda kontribuo al la homaro. Ni vidas kun ĝojo, ke Esperanto jam akiris grandan disvolviĝon en la pasintaj 75 jaroj. Kaj ĝia historio montras al ni, ke la disvolviĝo ricevis certan malhelpon, kiam estis milito, kaj rimarkindan progreson povis ricevi dum paco. Esperanto estas ne apartigebla de paco, ĝi estas lingvo de paco, kaj mi tre tre amas ĝin!

Mi estas revoplenta ekde la infanaĝo. Kiam mi estis juna, mi legis la priskribon de niaj praavoj pri la antikva ideala mondo:

Kiam la alta ideo estos efektiviĝinta, la tuta mondo fariĝos unu grandioza komunumo, en kiu elektigos kiel funkciuloj la saĝaj kaj kapablaj kaj altan respekton ricevos la honesteco kaj frateco. Kaj ĉiuj amos ne nur siajn proprajn gepatrojn kaj gefilojn; la maljunaj ĝuos sian vivvesperon, la laborkapablaj povos kontribui sian servon, la infanoj havos siajn flegantojn, kaj la vidvaj, senfilaj, orfaj kaj kripliĝintaj estos prizorgataj. En paro vivos la viroj kaj virinoj. La riĉaĵoj ne kuŝos neutiligataj, nek detenataj por nur privata bono; la laborkapablo ne kaŝiĝos senfare, nek uziĝos nur por individua bono. Ĉesos ruzado kaj artifikado, malaperos ŝtelistoj, rabistoj kaj ribeluloj, kaj tiam estos nenecese rigli la kortopordon. Jen la monda granda komunumo.

La revo pri tia justa kaj feliĉa homa socio ekregis mian koron, kaj ekde tiam mi serĉadis kun granda fervoro la veron por efektiviĝi tian socion. Tial mi tuj ekamis Esperanton, kiam mi vidis, antaŭ pli ol 30 jaroj, lernolibron de Esperanto en iu librejo. Mi ekamis ĝin ne pro tio, ke ĝi mem povas efektiviĝi la idealon, sed pro tio, ke ĝi povas helpi al tio, ke ĝi povas pli bone interkomprenigi la batalantojn por la efektiviĝo de la ideala socio, ke ili amu unu alian kaj unuiĝu pli firme.

Tiutempe, Ĉinio suferis agresadon de la imperiismo de ekstere kaj ekspuatadon de la militaristoj de interne. Multnombraj militaristoj, okupantaj po peco da tero kaj havantaj ĉiu sian imperiisto-apoganton, interbataladis, glutis unu alian, kondukis enlandan militon dum dekoj da jaroj por akiri pli da potenco kaj profito. Kiel la popolo sopiris je paco! Estis multaj homoj bonkoraj kaj bravanimaj,

kiuj apeladis plenenergie por paco, alvokas por unuiĝo kaj nacisavo. Sed kian utilon tio havis! Ĉion superas la interesoj de la militaristoj kaj imperiistoj. En iliaj okuloj, nenian atenton indas la alvokoj de la popolo.

Nur post la Oktobra Revolucio de Sovetunio, la ĉina popolo trovis la vojon por sinsavo, kaj post batalado de pli ol 40 jaroj, ĝi venkis finfine la agreson de Japanio, faris finon al la suferado de agresado imperiisma dum pli ol cent jaroj kaj milito enlanda dum jardekoj, kaj denove realigis pacan unuiĝon de la lando dissplitiĝinta. La sanga historia leciono tiel instruis la ĉinan popolon, ke ĝi rigardas la nunan pacan unuiĝon de la tuta lando tre tre kara, ke ĝi senlime indigniĝas pro la kriado pri "reatako al la ĉeftero" de Ĉiang Kajŝek el Tajvan okupata de Usono. Tio estas afero tute mem komprenebla.

Fakte, ja nur same tion oni trovas, se oni faras rerigardon al la historio de la tuta homaro. Antaŭvespere de la Mondmilito en 1914, multaj homoj bonkoraj kaj bravanimaj alvokis por paco, ĉu ne? Ja mem Zamenhof laŭte kriis por paco kun fervoro de apostolo, ĉu ne? Sed la Mondmilito eksplodis finfine, kaj Zamenhof devis forlasi nian mondon kun sia idealo en malespero kaj tristo. Sed ĉu tiu terura leciono instruis al la homoj sufiĉan singardemon? Post la finiĝo de la Unua Mondmilito, oni ĵuris sekurigi la pacon, fondis la Ligon de Nacioj, sin ligis per multaj devoj interkonsentitaj kaj la grandaj potencoj multfoje intertraktis pri malarmigado; sed antaŭvespere de la Dua Mondmilito, kiu donis atenton al la alvokado de multaj kaj la averto de Litvinov en la Ligo de Nacioj?

Nun, 17 jaroj jam forpasis nerimarkite post la Dua Mondmilito, kaj verŝajne la homoj estas jam sufiĉe singardaj kontraŭ mondmilito nova. Anstataŭ la Ligo de Nacioj fondiĝis UNO, pli kaj pli vastiĝis la armeo de la alvokantoj por paco kaj ĉiam pli forte tondras ilia porpaca voĉo. Tio ĉi estas bona. Sed, se oni pririgardas la aktualan situacion, oni ne povas resti sen brula skrupulo. Kvankam sufiĉe laŭtas la kriado por malarmado, kaj okazis serioj da kunsidoj, la arm-ekspansio kaj militpreparado tamen fariĝas ĉiam pli frenezaj; la preteksto de kontraŭbatalo kontraŭ ne ekzistanta danĝero jam legitimis la intervenadon al alilandaj internaj aferoj kaj,


starigon de militbazoj sur alilandaj teritorioj; kaj pli kaj pli malpurigis la manoj de UNO mem, la organizo fondita por paco, pro sia agado en Koreio kaj Kongo. Multaj milit-kolportistoj, malamikoj de la paco, sin maskis pacamanto, nomas sin pacdefendanto kaj sub la bela nomo de "paco" faradas arm-ekspansion kaj militpreparon, ĉie en la mondo starigas militbazojn kaj intervenas alilandajn internajn aferojn. Multaj trompigis de ilia "paco"-masko kaj multaj aliaj ne kuraĝas malkaŝi ilian fiagon kaj distingi la pravan de la malprava, timante ilin kolerigi.

Ni, esperantistoj, kiuj ankoraŭ devas vizaĝi al tiaj kruelaj faktoj 75 jarojn post la publikiĝo de la

lingvo, ja sentas grandegan bedaŭron profunde en la koro! Mi firme kredas, ke ĉiuj esperantistoj estas sinceraj pacamantoj. Sed la solvo de la demando ne kuŝas en vana paclitanio, sed en tio kiel efike defendi la mondpacon, kion ni faru kontraŭ la malamikoj de paco, kiuj intrigas detruigi ĝin. Ĉu ni ripetu la malnovan ludon de s-ro N. Chamberlain kaj fari kompromison, aŭ mobilizu la pacamantojn kaj justan publikan opinion de la tuta mondo por ilin riproĉi, malkaŝi kaj senĉese kontraŭbatali? Alivorte: ĉu ni lernu la lecionon de la historio aŭ lasi ripetiĝi tiu historio? Jen estas la problemo, kiun ni esperantistoj, laŭ mia opinio, devas pripensi antaŭ ĉio por la paco kaj por la efektiviĝo de la idealo de Zamenhof.

## La Ĉinaj Poŝtmarkoj

La 48-a serio de poŝtmarkoj speciale emisiita (10-VI-1962) de la Ĉina Poŝto kun plurkoloraj presitaj bildoj de "Ruĝverta Gruo".



Ruĝverta gruo estas specio de rara birdo de Ĉinio. Dum la tempo de printempofino ĝis somerkomenco ĝi generas gruidojn en Nordorienta Ĉinio, kaj en aŭtuno ĝi translokiĝas al la malsupra valo de Jangze-rivero, Koreio, Japanio ktp. lokoj por travivi la vintron. Pro sia gracia figuro ĝi estas delonge ŝatata de la ĉina popolo kaj nomiĝas "Feo-gruo". Tiu ĉi serio de pm. desegnita de la konata ĉina pentristo Ĉen Zifu, eksvicestro de la Nankina Arta Instituto antaŭ sia forpaso.

Angi-ponto de Ĝaŭ-gubernio, He-pej-provinco. 1-252 4c.

La Ponto Trezora Zono de Suĝou, Ĝiangsu-provinco. 2-253 8c.

La 50-a serio de poŝtmarkoj speciale emisiita (15-V-1962) de la Ĉina poŝto kun bildoj de "Ĉina Antikva Konstruaĵo — Ponto".



La antikvaj pontoj de Ĉinio estas tre multaj, la stiloj kaj strukturoj ankaŭ estas diversspecaj. La pontoj en la unua kaj dua bildoj respektive konstruiĝis en la 7-a kaj 9-a jc. p. K., oni jam ne povas diri kiam konstruiĝis la 2 aliaj.

Ĝupu-ponto de Guan-gubernio, Siĉuan-provinco. 3-254 10c.

Ĉengjang-ponto de Sangiang-gubernio, Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono. 4-255 20c.

# Pri la Ortografio de Propraj Nomoj

Mi ne estas lingvisto, mi ne estas akademiano kaj mia scienca rango estas pure teknika. Mi estas nur malnova adepto de la Internacia Lingvo, kiu volas esprimi sian opinion pri unu problemo, kiu ŝajnas esti samtempe tre simpla (el vidpunkto de simplaj esperantistoj) kaj sufiĉe komplika (el vidpunkto de la okcidentaj esperantistoj-lingvistoj—ili pardonu min, se mi eraras . . .)

Legante sufiĉe multe da presaj artikoloj en Esperanto mi oftege renkontas tiajn vortojn, kiajn mi povas nek prononci, nek tralegi: tio ĉi estas la propraj nomoj . . . Ekzemple: kiel mi prononcu la nomon de Baghy Gyula? Ĉu Baghai Giula, ĉu alimaniere? . . . Kiel mi eldiru la nomojn de Kalocsay aŭ tiun de Marjorie Boulton? Ĉu Marjori, ĉu Merĝeri, Merjoraj, ĉu alie? Kiu estas la homo, kies nomon mia korespondanto skribis tiel: Krouschtchauff? . . . Aŭ Cholokoff?? . . . Nur el la kunteksto de la leteroj mi komprenis, ke li temis pri

kamaradoj Nikita Ĥruŝĉov kaj Soloĥov.

Nur post la persona vizito al Hungario mi sukcesis legi la nomon de la redaktoro de "Norda Prismo", kun kiu mi havis honoron iomete korespondi, Ferenc Szilagyi. Se samideano Szilagyi ekscius kiele mi antaŭe kripligis lian nomon, penante prononcadu ĝin, li certe suferus kor-infarkton! . . . Kaj tio ne estas la ŝerĉo, ĉar mi tute ne sciis, ke en hungara lingvo la litero "S" ne estas prononcata kiel sono "S", ke Gyula estas prononcata kiel Djula (Kara "paĉjo", pardonu min, sed konatiĝinte kun vi en Budapeŝto pasintan someron, mi eksciis, kiel oni nomu vin fonetike . . .)

Kara leganto de ĉi tiu artikolo, kiam vi vidas en iu ajn ESPERANTA teksto jenajn literojn Y, C, J ktp, ĉu vi scias, kiel vi devas prononci tiujn en propraj nomoj? Ekzemple: kiel vi prononcus literon "Y", ĉu mole—I, aŭ malmole I (ruse sono: bl) aŭ UAJ, aŭ J? . . . Se vi vidas tian

kutiman kaj "kvazaŭ Esperantan" literon "C", ĉu vi scias ĉu ĝi sonas kiel "C" aŭ "K" aŭ "S"? . . . Ĉu litero "J" estus prononcata "Ĵ", aŭ "Ĵ" aŭ "Ĥ"? . . .

Mi sendubas, ke multaj lingvistoj tute rezone diros al mi, ke "Ĉiu kultura homo devas scipovi legi kaj prononci nomojn, se tiuj estas prenitaj el la okcidentaj lingvoj!". Tamen kion mi faru, se mi ne konas hungaran lingvon, aŭ la svedan kaj norvegan? Kion mi faru, se mi estas ĉino aŭ vjetnamo, kiu ne konas okcidentajn lingvojn? . . . Sed se mi posedas la scion de 6-7 okcidentaj lingvoj, tiam mi NE BEZONOS la scion de Esperanto, ĉar la scio de tiom multe da lingvoj sufiĉos por ke la multaj homoj de diversaj nacioj komprenu min!

Ni devas ĈIAM MEMORI, ke Esperanto estas la egalrajta lingvo por ĈIUJ HOMOJ kap PRECIPE por tiuj homoj, KIUJ NE KONAS FREMDAJN LINGVOJN! Tion multaj okcidentaj esperantistoj-lingvistoj forgesas! Tiaj scienculoj enfalas en marĉon de la kreintoj de Occidental, Novial, Ido kaj aliaj "internaciaj lingvoj" por . . . lingvistoj! . . .

En kia stato estas NUN tiu problemo pri Esperanta ortografio de propraj nomoj? Ĉiuj esperantistoj scias, ke nun ekzistas DU MALSAMAJ REGULOJ por la SAMA problemo.

1) Por la latinalfabetanoj—SKRIBU PROPRAJN NOMOJN NEFONETIKE, SED TIEL KIEL ILI ESTAS SKRIBITAJ EN VIANACIA LINGVO. Tio signifas: "neglektu, ĉu alinacianoj sukcesos tralegi tiujn nomojn aŭ ne!" Por ekzemplo, kara leganto, tralegu nomon de fama esperantisto-tradukisto: L. Somlai kaj alian de Payson, ĉu "Pajson", ĉu "Pejson," eble "Pajzon" aŭ "Pej-

## Anstataŭ-letero al Niaj Kunlaborantoj

Ni sincere dankas al vi ĉiuj, kiuj ofte nin helpas per valoraj kontribuoj. Sed ni devas peti vian pardonon, ke ni ne povas, kvankam volas, aperigi ĉiujn ricevitajn manuskriptojn limigite de la spaco, kaj ankaŭ estas neeble por ni respondi al ĉiuj aparte aŭ resendi la nepublikigitajn precipe la amase ricevitajn poemojn. Krome ni devas averti al niaj kunlaborantoj, ke literaturaĵoj alinaciaj ĝenerale ne taŭgas por nia gazeto. Ni preferas artikolojn priesperantajn.

La Red.



son", eble la lasta sono "n" ne estu prononcata . . .

2) La alia (kaj TUTE MALA) regulo por la SAMA PROBLEMO en la INTERNACIA LINGVO (mi intence substrekas, ke la lingvo estas INTERNACIA, do TUTE EGALA por ĈIUJ NACIOJ!) estas por tiuj esperantistoj, kies nacia lingvo ne uzas latinan alfabeton. Por tiuj esperantistoj la regulo estas jena: SKRIBU VIAJN NACIAJN NOMOJN PLEJ EBLE FONETIKE! . . . Tio estas: skribu la proprajn nomojn tiel, ke ĈIU povu legi kaj prononci ilin!

Por solvi la problemon ni turnu nin al la opinio de D-ro Zamenhof mem pri la ortografio de propraj nomoj.

En "Esperantische Mitteilungen" (junio, 1904) kaj samjare en "Lingvo Internacia" sur la paĝo 216 estas respondo de la Kreinto de Esperanto (vidu ankaŭ "Lingvaj Respondoj" 3-a eldono p. 40) sub la sama titolo, kiun havas ĉi tiu artikoleto:

"Propran nomon oni povas nun skribi tiel, kiel ĝi estas skribita en la gepatra lingvo de ĝia posedanto, ĉar en **nuna tempo** la fonetika skribado de multaj nomoj kaŭzus tro grandan kriplajon de tiuj nomoj kaj diversajn malkomprenajojn. Sed tio ĉi estas NUR RIMEDO PROVIZORA; ni DEVAS celadi al tio, ke pli aŭ malpli FRUE en la lingvo internacia ĈIUJ NOMOJ ESTU SKRIBATAJ LAŬ FONETIKO INTERNACIA de tiu ĉi lingvo, por ke ĈIUJ NACIOJ povu legi ĜUSTE tiujn nomojn." (La substrekigo kaj majuskligo de la literoj estas faritaj de mi. V.G.)

Ĉi tiuj linioj estas skribitaj antaŭ 58 jaroj. Ĉu NUN tiu "pli aŭ malpli frue-a" tempo ankoraŭ ne alvenis? Ja nia lingvo jam maturiĝis kaj elkreskis el siaj vindotolajoj.

En la unua parto de la suprecitata "Lingva Respondo" D-ro Zamenhof tute prave avertis, ke

Ni profunde funebras la morton de nia amata japana k-do

## Ujaku AKITA

Ĝus ni ricevis informon kun kordoloro, ke la multe merita pionira esperantisto kaj fidela amiko de la ĉina popolo Ujaku AKITA mortis je la 20-a de majo en sia 78-jaraĝo pro maljuneco. Tio estas granda perdo de japana E-movado kaj la amikeco inter ĉina kaj japana popoloj. Ni esprimas profundan malĝojon kaj esperas ke ni esperantistoj daŭrigu la laboron postlasitan de li por la disvastigo de Esperanto kaj interamikiĝo inter la popoloj.

La Redakcio de EPĈ.

.. la fonetika skribado de multaj nomoj kaŭzus tro grandan kriplajon de tiuj nomoj kaj diversajn malkomprenajojn". Sed samtempe ni nepre devas konsideri, ke tiuj "kriplajoj" kaj "malkomprenajoj" estos rimarkeblaj nur por la latinalfabetanoj. Por tiuj, kiuj ne uzas latinan alfabeton, tiuj kriplajoj kaj malkomprenajoj ne estos rimarkitaj aŭ sentitaj! Tamen neniu rajtas neglekti la lingvosentojn de ambaŭ tendaroj. Sekve la solvo devas esti ie MEZE, sed la regulo por la ortografio de la propraj nomoj devas esti UNU por ĈIUJ NACIANOJ, kiuj uzas Esperanton! Konsiderante ĉi tion, mi proponas efektiviĝi jenan sistemon, kiu povos kontentigi ambaŭ "tendencojn": fonetikan kaj naciskriban.

Mi proponas ĈIAM kaj ĈIE en Esperanta teksto SKRIBI LA PROPRAJN NOMOJN FONETIKE. Sed kiam tiu propra nomo estas skribita (presita) unuan fojon oni NEPRE SKRIBU (PRESU) APUDE PARENTEZE la saman nomon NACILINGVE, sed tion oni faru nur por la UNUA fojo, kiam la nomo aperas en la teksto! Krome, se la akcento ne koincidas kun la Esperanta, tiam oni por la unua fojo akcentigu la fonetikan transskribadon en la

teksto. Por la titoloj de revuoj, gazetoj, jurnalaj ktp. oni nepre aldonu (ankaŭ nur por la unua fojo) Esperantan tradukon de la titolo. Se la propra nomo estas ĉina, japana, hinda, araba k.s., tiam oni parenteze skribas (presas) tiun nomon nacilingve, se oni povas tion fari (ekzemple, se en la presejo estas la bezonata ĉi-okaze tiparo).

Tiamaniere ni havos UNU REGULON por ĉiuj naciaj propraj nomoj kaj samtempe ni plenumos la testamenton de D-ro Zamenhof, ke "ni devas celadi al tio, ke pli aŭ malpli frue en la lingvo internacia ĉiuj nomoj estu skribitaj laŭ la fonetiko internacia, por ke ĉiuj nacioj povu legi ĝuste tiujn nomojn".

En nomo de la mildekoj da esperantistoj, kiuj ne uzas latinan alfabeton kaj ne scias fremdajn lingvojn, mi turnas al Esperanta Akademio por finfine solvi ĉi tiun problemon, tiel, kiel pri ĝi konsilis la Kreinto de Esperanto D-ro Zamenhof!

Mi petas ĉiujn legantojn de tiu ĉi artikoleto skribi sian opinion al Esperanta Akademio kaj al mi laŭ jena adreso: USSR. Rostov-Don 38. Prospekt Lenina 95, kv. 53, Docento Viktor Gruško.

V. Gruško



# Esperanto Marŝas

## Ekskurso de Pekinaj Gestudentoj E-lernantaj

Je la 5-a de majo kiam la printempo plene pompis, kelkaj el la gestudentoj E-lernantaj de la Pekina Fremdlingva Instituto k.a., akompanate de kelkaj malnovaj esp-istoj faris ekskurson al la Somera Palaco.

Estas du celoj por tiu ĉi ekskurso. 1-e plene ĝui la printempon ĉe la fino de ilia printempa libertempo kaj 2-e praktiki la lingvon internacian.

Paroladetoj, kantoj, ludoj kaj babiladoj ĉio estis en Esp-o. Kelkaj balbutis kaj iuj aliaj embarasiĝis ĉe la nekonataj vortoj. Tamen ili persistis sin esprimi en Esp-o.

## El Sovetunio

**Agado de E-Sekcio ĉe Centra Kulturdomo de Medicinistoj en Moskvo** — ĉe la fino de januaro en la vico da kunsidoj de la Esp-a Sekcio ĉe Centra Kulturdomo de Medicinistoj estis ellaborita vasta rezolucio de ĝenerala kunveno de la Sekcio. Estis notitaj ĉefaj gravaj momentoj de la granda laboro, farita dum la pasinta jaro kaj tuŝitaj multaj aktualaj problemoj de Esperanta movado kaj de Esp-aj organizaĵoj en Sovetunio. Samtempe en la rezolucio de la Sekcio estis pentrita per helaj koloroj la programo por nia plua por- kaj per-esperanta agado. (Rimarko: Plena teksto de la rezolucio en Esp-o estas havebla en la Esp-a Sekcio laŭ adreso: Moskvo, K-9, ul. Hercena, 19. Sovetunio).



\*1. II. 62. en apudmoskva (100 km.) urbo Kolomna renoviĝis esperanta movado, kie en Kulturpalaco de Lokomotivkonstrua Uzino je nomo de V. V. Kujbiŝev estis organizita publika lekcio pri Esperanto, kiun faris la loka inĝeniero k-do E. Zajdman, lian lecion ilustris per recito de Esperantaj poemoj aktoro k-do N. N. Rytjkov. Ĉeestis pli ol 200 personoj.

\*11. II. 62. okazis vespero en la Sekciejo, dediĉita al okazinta en Moskvo dum 4-16-XII-61., 5-a Tutmonda Kongreso de Sindikatoj. Sovetiaj gesamideanoj kun granda intereso atentis la kongreson. Detalan kaj riĉenhavan raporton pri la kongreso faris ĉeestantino — malnova kaj sperta esperantis-

tino N. D. Sulje (pli bone konata en juneco kiel Nina Norovatkina).

K-do Miropolskij, ankaŭ kiel gasto de la kongreso rakontis pri siaj fortaj impresoj dum la renkontoj en kongresejo kaj interparolo kun delegitoj el Brazilio kaj Kubo, kaj montris al ĉeestantoj la memorajojn, kiujn li ricevis de la kongresanoj.

Poste estis tralegita letero de S. P. Titov (patro de kosmonaŭto German Titov) al Pola Radio, kiu estis presita ruslingve en No 6 (4-10-II-62) de grava Moskva gazeto "Nedelja" (Semajno). 3 linioj de la letero estis presitaj en Esperanto kun posta traduko. La sama letero estis publikigita esperante en "Heroldo de Esperanto" No 2 de kuranta jaro.

K-do N. Rytjkov komunikis, ke en n-ro 11 por 1961 j. de rusa gazeto "Sovetunio" estis publikigitaj salutoj al kosmonaŭto G. Titov en multaj lingvoj, inter kiuj estis menciita Esperanto.

\* 14. II. 62. estis kunsido de la Sekcia estraro, kie k-do E. Salnikov proponis transdoni la presadon de ruslingva bulteno "Esperanto en Sovetlanda Gazetaro" — al societo por disvastigo de politikaj kaj sciencaj konoj, kaj ĝian redaktadon komisiis al speciala redakcia komitato.

\* 18. II. 62. oni aranĝis solenan vesperon, dediĉitan al klasikulo de rusa poezio A. S. Puŝkin. La vesperon malfermis per enkonduka vorto profesoro E. Bokarev. Vaste kaj detale raportis pri Puŝkin kaj Esperanto k-do N. F. Danovskij. En sia lerta, bela kaj elokventa parolo li brile rakontis pri granda signifo de Puŝkinaj poeziaĵoj en tutmonda kulturo kaj socia vivo. Nun estas tradukitaj esperanten ĉiuj la plej gravaj verkoj de Puŝkin; entute estas tradukitaj pli ol 100 diversaj poeziaĵoj kaj noveloj. Esp-a poeto K. A. Guŝev rakontis pri eterna memoro de Puŝkina poezio en tuta mondo.

En la dua parto de la vespero estis recititaj diversaj verkoj de Puŝkin en Esperanto: k-do Kulagin — "Mi amis vin" (trad. de A. Grabovskij); k-ino Ajdarova — fragmentoj el "Eŭgeno Onegin" en trad. de N. Nekrasov; la aktoro N. Rytjkov — filozofia funebra poemo en traduko de K. Kaloscaj "Sur stratoj de tumulto bruaj". K-ino Tonti — diversaj lirikaj poeziaĵoj. La vesperon ĉeestis pli ol 70 personoj.

\* 21. II. 62. estis organizita nova elementa kurso de Esperanto kun 10 enskribiĝintaj medicinistoj. Ĝin gvidas k-do I. N. Jermolajev.

\* 25. II. 62. okazis renkonto kun eksterlanda s-ano Walter Petzold el Nevschkaŭ i/Vogle (DDR). Li transdonis varman saluton de germanaj gesamideanoj kaj ra-

kontis pri prospero de esp-a laboro.

K-do Strajtmanis el Riga (Latvia SSR) — patro de 8-jara esperantistino Aija, konata al Moskvaj gesamideanoj laŭ pasintjara tendaro en Litovio, salutis ĉeestantojn je nomo de Latvaj gesamideanoj kaj montris kinofilmeton pri S. V. Sariĉev.

Prof. S. Ĉaĥotin rakontis pri la interesiĝo al Esperanto en sciencaj rondoj kaj pri granda amiko de Esperanto — akademiano Berg.

K-do Ŝumilov rakontis pri la klopodoj por oficialigo de SEU.

Poste okazis diskuto pri plibonigo de Esperanta laboro en la Sekcio.

\* 4. III. 62. estis junularkunveno de "Fajrero", ĉeestis 40 personoj. K-do A. Ĥarkovskij raportis pri taskoj de esp-a junularo, pri statuto de junulara esperanta organizaĵo, pri reciproka laboro kun plenaĝuloj, pri specifikaĵoj de junularo, kiu devas kanti, danci, amuziĝi ktp. La kunvenon partoprenis k-do M. A. Segal el Rostov s/D., salutinta la ĉeestantojn.

\* 11. II. 62. tage je la 14-a horo el Moskvo forveturis Sofion (Bulgario) per rekta trajno malnova bulgara samideano I. Iliev (baj-Ivan), kiu laboris en Moskvo. Por lin akompani al stacidomo venis kelkaj gesamideanoj. Prezidanto de Esperanta Sekcio k-do E. T. Salnikov enmanigis al k-do Iliev dankleteron pro lia aktiva partopreno en Moskva esperanta movado kaj kun saluto de Moskvanoj al Sofiaj gesamideanoj. Ĉiuj adiaŭantoj deziris bonan kaj feliĉan vojon al la forveturanto.

Vespere de la sama tago en Sekciejo okazis renkonto kun Pola samideano Tadeuŝ Jajembovskij — astronomo, kiu salutis Moskvajn gesamideanojn je nomo de polaj esperantistoj.

K-ino A. Ĝ. Gorbunova el Leningrad transdonis varman saluton al ĉeestantoj de Leningradanoj kaj rakontis pri eldono

de rusa-esperanta vortaro rotacioprinte, prezo 31 kop. kaj pri aktiva esp-a agado de Taŝkentaj (Uzbeka SSR) esperantistoj-fervojistoj.

K-do B. V. Tokarev informis la ĉeestantojn pri la kreo de komisiono en Sovetunio por preparado de materialoj al unua internacia konferenco esperanta de sciencistoj, kiu okazos dum 47-a U. K. en Kopenhago kaj pri kiu komunikis en n-ro 1 de revuo internacia "Esperanto" s-ro Paul Neergaard. La sovetia komisiono konsistas el:

Prezidanto — D-ro de geografio D. L. Armand

Sekretario — Kandidato de kemio B. V. Tokarev

anoj de la komisiono: prof. de biologio S. S. Ĉaĥotin, kand. de medicino E. T. Salnikov, kand. de fiz.-mat. V. V. Kulikov (Omsk), kand. de filologio V. P. Grigorjev, inĝeniero N. F. Danovskij.

La vespero finiĝis per utilaj konsiloj pri la ĝusta esperanta prononco de k-do N. Rytjkov.

\* 14. III. 62. okazis kunsido de la Sekcia estraro, en kiu estis preparolitaj multaj kurantaj aferoj: pri plano kaj programo por la 2-a kvaronjaro, pri metodikaj materialoj kaj lernaj planoj, pri organizado de nunjara tendaro en Cesis (Latvia SSR), pri statuto de Esperanta Sekcio, pri bulteno de Esp-o en Soveta gazetaro, pri organizo de renkonto inter esperantistoj, medicinistoj kaj ĵurnalistoj.

(Teodoro Kulagin, Moskvo)

### Inaŭguro de Junulara Klubo "Amikeco" —

La 25-an de marto, 1962 en Krasnodara Pionirpalaco estis inaŭgurita klubo junulara "Amikeco" (Druĵba). En la vastaj haloj de la Pionirpalaco estis aranĝita ekspozicio de diversaj aĵoj: moneroj, filatelajoj, alumetetikedoj. Maljuna esp-isto V. Najdin eksponis bildkartojn, fotojn kaj esperantajn revuojn,

ricevitajn el pli ol 40 landoj de la mondo. La ekspozicio de esperantaĵoj altiris atenton de centoj da gejunuloj. La klubon vizitis ne nur Krasnodara junularo, sed ankaŭ gejunuloj el aliaj urboj: Armavir, Stavropol, Ĥoĝent k.c.

(B. Najdin, Krasnodar.)

### Esperantisto-Sciencisto Honorata

— En lasta marto k-do N. N. Baranskij membro-korespondanto de la Scienca Akademio de USSR, ricevis de la Sovetunia Registaro honoran titolon: *Heroo de socialisma laboro* je la 80-jara datreveno de lia naskiĝtago pro liaj elstaraj meritoj en la kampo de teoria esploro de la problemo de ekonomi-geografia scienco kaj fruktodona scienc-pedagogia agado.

Profesoro N. N. Baranskij estas malnova esperantisto-sciencisto, aktiva partoprenanto de la Esperanto-movado. En sia scienca laboro li aplikas la Internacian Lingvon tenante kontakton kun alilandaj esperantistoj-sciencistoj.

(Laŭ A. Kof, Lvov)

### Parolas Varsovio

Ekde aprilo ĝis oktobro la esperanta disaŭdigo de la Pola Radio alprenas novajn ondlongojn kiel jene:

25,28 m (11865 kc/s)

25,42 m (11800 kc/s)

31,01 m (9675 kc/s)

31,45 m (9540 kc/s)

31,50 m (9525 kc/s)

41,18 m (7285 kc/s)

42,11 m (7125 kc/s)

kaj sur la meza 259 m (1205 kc/s).

La disaŭdigo okazas ĉiutage de la horo 16,30 ĝis la 17,00 laŭ la mezeŭropa tempo.

Ĉiutage ĝi havas konstantajn elsendojn kun variaj temoj. Krom la Pac-Konkuro jam okazinta ĝi

aranĝas ankaŭ konstantan Konkurskurso-Enketon por la eksterlandaj aŭskultantoj. Inter la partoprenantoj de la konkurso, dufoje en jaro, estos lotumitaj interesaj premioj. Detalojn oni petu de la Radio (adr: **Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Varsovio, Pollando**)

### Sciencaj, Teknikaj kaj Ceteraj Fakvortaroj en Esperanto

Sub la supra titolo aperis en *Scienca Revuo* (I-II-1962) ampleksa studo de la problemo. La enhavon oni povas imagi al si tra jenaj subtitoloj:

I. Ĝeneralajoj pri fakvortaroj

II. La terminologia laboro sur nacia kaj internacia niveloj

III. La solvo de la problemo de internaciaj fakvortaroj per enkonduko de pontlingvo

IV. La avantaĝo kiun alportas la uzado de la Internacia Lingvo.

V. La terminologia laboro de la esperantistoj kaj la jam ekzistantaj fakvortaroj esp-lingvaj.

Eble plej interesa por esperantistoj estas la V-a parto, en kiu la verkinto resumis la faritajn laborojn koncernantajn la problemon, kaj anoncis la efektiviĝon de la unuiĝo de la Sekcio por Teknikaj Vortaroj de la Akademio de Esperanto kaj la Terminologia Sekcio de ISAE sub nova nomo *Terminologia Centro* (TC) gvidata de dipl. ing. R. Haferkorn. Nun la TC sukcese laboras kaj regule dissendas informojn kaj direktivojn al koncernatoj. Plurajn laborojn ĝi jam iniciatis, kaj nun ĝi petas viglajn kunlaborojn de ĉiuj esperantistaj fak-asocioj kaj iliaj unuopaj membroj.

Konekse kun tiu ĉi studo aperis *Indekso de la Sciencaj, Teknikaj kaj Ceteraj Fakvortaroj en Esperanto* (ĝis 1961 aperintaj). Estas registritaj en la indekso entute 117 titoloj. Esperanto do posedas

jam riĉan heredajon de fakaj terminaroj. Sed tre bedaŭrinde grandparto de ĝi estas jam netrovebla, kaj ankaŭ la progreso de Scienco kaj teknikoj en nuntempo postulas necesan riĉigon kaj revizadon. Espereble la laborado de TC bone sukcesos kaj baldaŭ ni havos jam vere kompetentajn necesajn fak-terminarojn.

### 18-a Internacia Junular-Kongreso de TEJO

Estas decidite ke la 18-a Internacia Junular-Kongreso de TEJO okazos en Ystad, Svedlando, dum la semajno post la Universala Kongreso en Kopenhago, do 11-18-a de aŭgusto, 1962. Ystad estas urbo kun proksimume 13,000 loĝantoj en la orienta parto de la plej suda sveda provinco Skåne (Skanio). En la programo de la Kongreso estos la kutimaj eroj kiel ekz. ekskursoj, interamikiĝa vespero, diservo, kongresa balo, jarkunveno de TEJO, prelegoj, oratora konkurso kaj sportaj konkursoj.

(Laŭ S-ro Börje Andersson, Svedlando)

### "Esperanto en Komercio"

Laŭ informo de E-Rondo Crailsheim en Okcidenta Germanio baldaŭ aperos libro kvinlingva (inkluzive Esperanton) kun la supra titolo. En ĝi troviĝas 80 raportoj de firmaoj el la tuta mondo pri uzo de Esperanto en iliaj komercaj rilatoj.



# Sur Nia Librobreto

*Voĉoj de Paco*. — broŝuro eldonita de “Voĉoj de Virinoj”, por-paca organizo de kanadaj virinoj. 40-paĝa. Prezroj por eksterlandoj: 3 steloj por 1 ekz., 20 steloj por 10 ekz. kaj 150 steloj por 100 ekz.. Mendebila ĉe “Voĉo de Virinoj”, Esperanta fako, P. O. Box 344, Oakville, Ontario, Kanado.

Paco fariĝas jam tasko urĝa kaj aktuala por ĉiuj popolanoj (kompreneble ne por la agresantoj, koloniistoj k.s.) de la tuta mondo,

kiel la emancipo de la subpremaj kaj koloniigitaj popoloj. Ĝi estas tasko por popolanoj ĉu junaj ĉu maljunaj, ĉu viraj ĉu virinaj. Do por la paco, voĉoj de virinoj estas nepre necesa parto. Nun en tiu ĉi broŝuro mi aŭdas tiujn ĉi voĉojn. Kredeble inter la virinoj troviĝas diversaj opinioj pri la paco kaj pri agad-manieroj por la paco. Tamen la kunigita forto de la duono de la homaro sendube multe kontribuos al la afero. Oni povas nur aplaŭdi al tiu ĉi nova armeo sur la pacfronto.

En la broŝuro troviĝas Deklaracio de V.d.V., kiu montras la konvinkon, agad-principon, proponojn kaj planojn estontajn por la paco de la organizo. Estas enmetitaj en tiu ĉi broŝuro ankaŭ elektitaj materialoj el ĝiaj informiloj — *Novaĵleteroj*. Ĝi estas lerte redaktita por ke oni plene komprenu la organizon.

Tamen en la kolektitaj materialoj mi trovis kelkajn punktojn pri nia lando bazitajn sur misinformoj evidente de la usona pro-



## GRAVA PETO



### al ĉiuj niaj amikoj

Kredeble ĉiuj niaj amikoj kaj kunlaborantoj memoras, ke nia gazeto tuj travivos plenajn kvin jarojn de sia dua periodo. Ĝia ĉiam pli sana kreskado multe ŝuldas al ĉiuj viaj fervoraj helpoj kaj kunlaboroj. La pli kaj pli vasta aplikado de nia kara internacia lingvo — Esperanto en Ĉinio donas grandan promeson por nia espero. Tamen por atingi plenan sukceson, ni devas ankoraŭ multe klopodi por konvinki la vastan publikon ankoraŭ indiferentan, ke nia lingvo havas vere grandan utilon por interkompreno inter la popoloj kaj por batalo de la paco, ke nia lingvo fariĝas jam vere internacia kaj povas atingi ĉiujn angulojn de la mondo, ke niaj laboroj ne estas dronitaj seneĥe sed male ricevas varmajn akceptojn kaj diskonigojn de la legantoj. Tial ni intencas aranĝi imponan Esperantan Ekspozicion en la

kuranta jaro. La ĉefajn materialojn ni atendas de vi, ĉiuj niaj legantoj, amikoj kaj kunlaborantoj. Dezirataj estas diversaj materialoj pri utiligoj de *El Popola Ĉinio* kaj aliaj niaj eldonadoj, ekz-e, gazetoj, ĵurnaloj sur kiuj aperis viaj tradukoj aŭ represitaj tekstoj el niaj eldonadoj aŭ recenzoj pri ili, fotoj montrantaj legadojn, ekspoziciojn aŭ prelegon pri aŭ laŭ materialoj de niaj gazeto kaj libroj. Eĉ simplaj informoj tiaj multe helpas al la celo. Al ĉiuj, kiuj sendos al ni la deziratajn materialojn ni donacos belan memorajon. Ni esperas, ke ĉiuj niaj amikoj ne avaros siajn helpajn manojn kaj laŭeble kaj diversmaniere akiros por ni la bezonatajn materialojn. Ĉio por la ekspozicio adresu al nia Redakcio (P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio) kaj notu sur la koverto “Por ekspozicio”.



La Redakcio de EL POPOLA ĈINIO



pagando. Pri tio mi rekomendas al la legantoj legi la artikolon *Ĉinio kaj Mondpaco* en PACO (novembra n-ro, 1961), kaj ĉi tie mi volas speciale rimarki pri la jenaj:

(A) La ĉina popolo ege amas pacon. Nur kiam ili estis ekspluatataj kaj sklavigataj de la imperiistoj kaj iliaj lakeoj enlandaj ĝis la ekstremo, ke plu vivi ili jam ne povis, tiam ili ekstaris por sin defendi kaj forpeli la imperiistojn el sia patrolando por ke ili vivu pace. Tion pruvas la historio de Ĉinio en lasta jarcento ekde la Opi-milito en 1840. Tial la liberiginta ĉina popolo konsideras la pacon plej valora kaj deziras pacon al ĉiuj popoloj. Por tio nia registaro iniciatis en 1954 kune kun Hindio, kaj proponis en 1955 al Bandung-konferenco kiel ĝeneralajn principojn inter la nacioj la *kvin principojn de paca kunekzistado inter diversaj landoj*, t.e.: (1) *respekti reciproke la teritorian suverenecon*; (2) *ne agresi unu la alian*; (3) *ne interveni unu al la alia en la internaj aferoj*; (4) *ĉio en egaleco kaj reciproka profito kaj* (5) *paca kunekzistado*.

La kvin principoj konkrete montras la pacan politikon de nia lando. Ili, laŭ mi, ja estas nepreza premo por la mondopaco.

(B) El sia propra sperto en la naciliberiga batalo, la ĉina popolo plene komprenas, ke se oni volas sin liberigi el la perforto de la imperiistoj, oni ne povas sukcesi sinapogite sur ne-rezistismo. Tamen la ĉina popolo, sekve la nuna ĉina registaro, kiun direktis la popolo mem, ĉiam insistas pacan rimedon por solvi internaciajn disputojn kaj aktive subtenas la proponojn pri malarmado faritajn de Sovetunio. Ĉar nur kiam la imperiistoj retiros siajn armeojn okupantajn alilandajn teritoriojn, forlasos la t. n. eksterlandajn militbazojn, rezignos la privilegiojn super la koloniigitaj popoloj kaj ĉesigos la subprem-

adon al ili, tiam la kvin principoj de paca kunekzistado povos esti efektivigitaj kaj la longdaŭra mondopaco povos esti atingita.

(C) Por rapide forskui la malriĉecon, postrestecon kaj sklavigitecon postlasitajn de la historio ni, ĉina popolo, en la konstruado de sia patrolando, elektis vojon socialisman. Tamen tio neniel malhelpas nian subtenadon al paca kunekzistado kun kapitalismaj landoj surbaze de la kvin principoj. Ĉar elektado al kia ajn socia sistemo estas afero propra de la popolo mem de tiu lando, kaj en tia afero aliaj landoj rajtas ilin nek helpi nek interveni.

**Honfan**

Theodor Kilian: **CVIĈEBNICE ESPERANTA** — nova lernolibro de Esperanto en ĉeĥa lingvo, 14 × 20 cm., 276 p., bindita, eldonita de la Ŝtata Pedagogia Eldonejo de Ĉeĥoslovakio. La tuta eldono, 3000 ekzempleroj, elvendiĝis dum unu tago.

La enhavo konsistas el kvin partoj: "Ekzercaro" el 20 lecionoj, "Konkluda Ripeto", "Ŝlosiloj al Ekzercoj", "Legolibro" kaj "Vortareto Esperanta-Ĉeĥa kaj Ĉeĥa-Esperanta".

La lecionoj ne estas izolitaj, kiel oni vidas en la plimulto de lingvaj lernolibroj. Ili estas interligitaj per la komuna temo "La Familio de s-ro J. Ĉeĥ". Per tiu ĉi aranĝo la aŭtoro povas vekti la scivolon kaj intereson de la lernanto kvazaŭ per daŭrigoj de rakonto. La unuopaj lecionoj respregulas la simplan, ĉiutagan vivon de normala familio, kiu ebligas uzadon de facile lernebla, bone memorebla, ĉiutaga simpla lingvo.

Ĉiu leciono konsistas ĉefe el teksto, novaj vortoj, gramatiko kaj ekzercoj. Ĉe la fino de la lecionoj ofte troviĝas libertempa ŝerco, anekdoto aŭ proverbo. Krome, troviĝas interesaj ilustraj bildoj por la ki-vortoj, la pre-

pozicioj, la horoj kaj la participoj. Troviĝas ankaŭ du kantoj.

La teksto de plejparto de la lecionoj estas interparoloj. Troviĝas ankaŭ leteroj, telegramoj kaj citaĵoj el verkoj de Zamenhof. Mi konstatas, kvankam ne povosciante la ĉeĥan lingvon, ke la aŭtoro, precipe en la gramatika parto de la lecionoj, multe atentis pri komparo inter la du lingvoj Esperanta kaj ĉeĥa por helpi la lernadon.

La legolibro konsistas el tri partoj: "El Tempoj Antikvaj", "Nia Respubliko kaj Popolo" kaj "El Esperantaj Gazetoj kaj Libroj".

Unuvorte, la lernolibro estas interesa, praktika, lingve facile lernebla kaj enhave riĉa kaj instrua.

**Venlo**

## **AMUZO PER SCIENCO**

Trad. el la angla D. R. Duncan. Eldonita de Daily Mail. Formato 19 × 25 cm. 96 p. Prezo: 7 s. 6 p.

Jen estas riĉe ilustrita libro amuza kaj instrua por la geknaboj. Ĝi prezentas pli ol 70 facile efektivigeblajn mistifikadojn, kiuj montras kaj komprenigas diversajn naturajn fenomenojn. Ĝi instruas al geknaboj memfari varmturbinon, periskopon, elektran motoron, simplan tridimensian vidilon, termometron ktp. kaj trovi la centron de gravito, montri la potencon de aerpremo, hirtigi harojn, ŝanĝi kolorojn al blanko ktp. La lingvo de la traduko estas simpla kaj flua. Preseraroj, malmultaj. Oni devus aldoni klarigojn pri la neologismoj "komputi, kondukti, konvekta, liki, bumerango, detergajo, suspendi k. a." kaj esperantigi la vorton "Plasticine" kaj la nomojn Christine, Barry kaj Stephen. Anstataŭ "la . . . truo elŝprucos. . ." oni devus diri "la . . . truo elŝprucigos . . ." kaj anstataŭ "Kiom da truoj oni faros en la fundo . . . , vi povos tamen devigi al ĝi enteni akvon . . ." oni devus diri "Kiom ajn da truoj . . .".

**V. K.**



unu el la kvar vicprezidantoj. Kiel anoncote, la Instituto baldaŭ eldonos gazeton kaj starigos stud-esploran kontaktiĝon kun la landoj en Azio kaj Afriko.

### **Sekreto de Strangaj Geografiaj Fenomenoj en Tibeto**

Sur la ebena tero de Tibeto, iafoje en aŭtuno aŭ vintro, subite leviĝas glacia monteto alta dekojn da futoj aŭ elmergiĝas el fluejo giganta glacia konuso kristale travidebla; kiam varmiĝas la klimato ĝi subite malaperas kaj estiĝas tie ondetanta lago. Sur la altebenaĵo, estas ankaŭ multaj lagetoj kun diametro de malpli ol 5 ĝis pli ol 20 metroj, dise brilas kvazaŭ akvoperloj sur lotusfolio. Kaj enkaviĝintaj akvejoj iafoje enfalas post pluvo kaj turniĝas en lagetojn. En la lastaj jaroj, oni trovis, ke unu malgranda kaldronejo malleviĝis malrapide jaron post jaro. La sekreton de tiuj strangaj fenomenoj nun malkaŝis antaŭ nelonge iu scienc-esplora trupo, kiu konstatis, ke unu-du metrojn sub la tersurfaco estas frostita tero, dika je pli ol 100 metroj, ie kuniĝinta en seninterrompa granda peco, ie dislokiĝas izole kvazaŭ insuloj. Tie kaj tie, sur la frostita tero sin trovas granda glacia tavolo dika je 1.5—5 metroj. La trupo nun daŭrigas sian esploron por ekkoni la detalojn.

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ

## Libroi Eldonitaj de ĈEL.

### *Verkoj de Maŭ Zedong*


	P.	Formato- cm.		Rb.	£
<b>Praktiko</b>	24	13.2×18.7	bd.	0.18	0- 1-5
			br.	0.09	0- 0-8
<b>Pri Popoldemokratia Diktaturo</b>	24	13.2×18.7	bd.	0.18	0- 1-5
			br.	0.08	0- 0-8
<b>Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong</b>	18	13.2×18.7	bd.	0.18	0- 1-3
			br.	0.08	0- 0-6
<b>Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio</b>	30	13.2×18.7	bd.	0.18	0- 1-5
			br.	0.07	0- 0-7
<b>Komentarioj pri la Blanka Libro</b>	56	13.2×18.7	bd.	0.20	0- 1-7
			br.	0.13	0- 1-0
<b>Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an</b>	48	13.2×18.7	br.	0.09	0- 0-9

### *Literaturaj Verkoj kaj Aliaj*

<b>Ĉina Antologio (1949-1959)</b>	412	23×15.5	bd.	1.20	0-10-0
<b>Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Res- publiko</b>	88	19×25.3	bd.	0.60	0- 8-6
<b>Vivu Leninismo</b>	102	14×20.5	br.	0.16	0- 2-0
<b>Floroj kaj Birdoj (8 kolorpresitaj pk.)</b>			br.	0.08	0- 1-0
<b>Rakontoj pri Fantom-spitantoj</b>	98	12.3×19	br.	0.33	0- 2-7
<b>Laŭdezira Kalkulo de Kennedy</b>	25	13.2×18.7	br.	0.07	0- 0-7
<b>La Okcidenta Ĉambro (bildrakonto)</b>	88	13×18	br.	0.19	0- 1-6
<b>Mi Volis Viziti Lernejon (bildrakonto)</b>	76	13×18	br.	0.08	0- 1-0
<b>Karpetoj Transsaltis la Drakpordon (kolorpresita bildrakonto)</b>	30	18.2×20.5	br.	0.16	0- 1-3
<b>Knabino kaj Garolo (kolorpresita bildrakonto)</b>	38	17.2×25.3	br.	0.38	0- 3-0
<b>La Kultura Vivo de la Ĉinaj Labo- ristoj kaj Oficistoj (kun 90 fotoj)</b>	72	16.5×18.5	br.	0.25	0- 2-0
<b>Pejzaĝoj de Ĉinio (albumo kun 48 fotoj, el ili 13 kolorpresitaj)</b>	50	24×26.5	br.	0.63	0- 5-0
<b>Pitoreskajoj de Pekino (12 kolorpre- sitaj pk.)</b>			br.	0.13	0- 1-0
<b>Sinjoro Dongguo (bildrakonto adaptita laŭ antikva fablo)</b>					
<b>Kiel Lu Ban Majstriĝis (bildrakonto)</b>					

Mendu ĉe niaj perantoj aŭ nia Administracio:

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



## Korespondi Deziras

\* 20-jara studento kun multflanka intereso (politiko, ekonomio, literaturo, geografio, pac-movado, ktp). Detlev Blanke, Rostock, Thierfelder 14/2, DDR.

\* 200 kanadaj pacamantinoj, membroj de "Voĉo de Virinoj", nun lernas Esp. por kor. kun vi. Skribu viajn aĝon, profesion kaj interesojn al Vilma Eichholz, Esperanto, Oakville, Ontario, Kanado.

\* Estinta Esp-Sekcio ĉe la Kulturdomo de Koopero ne plu funkcias. Ĝin nun anstataŭas la Esp-ista Klubo ĉe Kulturpalaco de Klariglaboristoj. Kunveno ĉiulunde kun varia programo k ĉiuvendrede funkcias klubsekcioj k studrondeto. Poŝta adreso: Poŝtkesto 360, Leningrado, D-28, USSR.

\* Berthold Guttmann em. inĝ. Dubi 2 u Teplic, Ĉeĥoslovakio, kor. kĉl., pkil. pm. let. fotoj, certe respondos.

\* Alois Vajgert, fotisto, Americka 2263, Teplice, Ĉeĥoslovakio, kor. kĉl., pkil. fotoj, let. alum-etike-toj, certe respondos.

\* Manuel L. Sousa Pinto, caixa postal 1082, Lourenco Marques, Mozambiko, dez. interŝ. kompletajn seriojn de neuzitaj pm. (faŭna k sporta temoj).

\* Dez. interŝ. pk. kun ĉinaj amikoj. F. Alferi, R. Siria 193, Salta, Argentino.

\* Infanoj en preĝejo unitariana dez. kor. kun infanoj en aliaj landoj. Aĝ-limo: 13 jaroj. Meadville Unitarian Church, Internacia Infana Korespondado, 346 Chestnut Street, MEADVILLE, Pensilvanio, Usono. Sendu nur bk. unuafoje!

\* Hans Jahn, Schillerstraße 25, Saalfeld (Saale), Germanio-DDR., kun ĉl. pri ĉt. Ĉiu ricevos respondon.

\* Salvador Morales, Jordana 24-20, ZARAGOZA, Hispanio, dez. kor. kun ĉl. (ne okc. eŭropaj). Afranku bele, nepre respondos.

\* 21-jara studento de pola filologio dez. interŝ. bk. alum-etiketojn, pm. Kazimierz Zurawski, ul. Ostrolecka 1, Przemysl, Pollando.

\* S-ano Z. Dvorak kaj aliaj 14 geesp-istoj dez. kor. kun ĉl. pri ĉt. Zvzv Liberec-Vesec, uzina esp-ista rondeto, Ĉeĥoslovakio.

\* Krasnodara Pionirpalaco kolektas k interŝ. kaŭkazajn ludilojn, pupojn por alilandaj ludiloj, pupoj k artaĵoj. USSR. Krasnodar, Palaco de Pioniroj.

\* Juna instruisto 24-jara, kun ĉl. Van-tan, Lernejo Muonglang, Phuyen, Thai-meo, Vietnamio.

\* Francisco Guimaraes, Mozambiko, R. Diocleciano, Das Neves - 16, Lourenco Marques, kun Ĉinaj esp-istoj k interŝ. pm.

\* Rondo de esp-istaj gestudentoj 16-19 jaraj, de ŝtata mezgrada lernejo, dez. kor. precipe kun orientaj landoj (Ĉinio, Japanio) pri moderna vivo, arto, literaturo, folkloro, ktp. k interŝ. il. pk. F-ino L. Dijsserinc, Euerardstraat 41, EEKLO, Belgio.

\* Jan Hornik, Bedrichov, Posumavska 9, p. Jihlava, Ĉeĥoslovakio, dez. interŝ. pm. pk. fotojn kun ĉl.

\* Kun ĉl. gejunuloj dez. kor. membroj de Studenta Klubo de "Konkordo" Esperanto-Grupo, Budapest II. Keleti Karoly u. 22. Hungario.

\* Elizabeta Biro, studentino 16-jara, Budapest, IV. uĵpest, Brŭszeli u. 17, Hungario, kun ĉl. kaj interŝ. bk.

Al mi mankas "El Popola Ĉinio" n-roj 1-2, 1958. Sendinto rekompencota per bulgaraj esp-aĵoj. I. Krestanov, Sofia, ul. 6 Septemvri 2, Bulgario.

pozicioj, la horoj kaj la participoj. Troviĝas ankaŭ du kantoj.

La teksto de plejparto de la lecionoj estas interparoloj. Troviĝas ankaŭ leteroj, telegramoj kaj citaĵoj el verkoj de Zamenhof. Mi konstatas, kvankam ne povosciante la ĉeĥan lingvon, ke la aŭtoro, precipe en la gramatika parto de la lecionoj, multe atentigas pri komparo inter la du lingvoj Esperanta kaj ĉeĥa por helpi la lernadon.

La legolibro konsistas el tri partoj: "El Tempoj Antikvaj", "Nia Respubliko kaj Popolo" kaj "El Esperantaj Gazetoj kaj Libroj".

## Enhavo de N-ro 4 (75) 1962

Bildo sur kovrilo — Kamelio kaj Blankkapa Birdo (Ĉinstila pentraĵo de Kju Ĝen)

**Du Fu, la Nacia Poeto de Ĉinio**  
**Elektitaj Poemoj de Du Fu**  
**La Kemia Industrio de Ŝanhajo**  
**Vang Huajju kaj Lia Fruktĝardeno**

**Ni Venis al Brazilo**  
**La Unuaj Tibetaj Geaktoroj de Modernaj Dramoj**

**Vortoj de Knabo apud Lago**  
**Pri Ĉina Ŝilko**

**Versimila, Viveca kaj Simpla**  
**La Tektonoj**

**La Kultura Parko de Kantono Nova Fizionomio de la Ĉina Dancarto**

**Fidela Amo kaj Sanga Akuzo**  
**Pri la Rakontoj de Afanti**  
**Rakontoj pri Afanti**

**Konsilo de Zou Ĝi al la Reĝo**  
**Etudo de Egaligo**

**Niaj Danko kaj Donaco al Amikoj por la Paco**

**Ekkoninte Esperanton**  
**Ĉinaj Poŝtmarkoj**

**Pri la Ortografio de Propraj Nomoj**

**Esperanto Marŝas**  
**Sur Nia Librobreto**

**Grava Peto al Ĉiuj Niaj Amikoj**  
**Korespondi Deziras**





La kaverno de Pavo-reĝo ĉe Fovan estas kune konstituita de la fame konataj skulptistoj Joŭ Juangjun kaj lia filo Dajneng. La Pavo-reĝo sidas sur pavo, kiu alte etendas la kapon kaj la voston supren, tiel kiel ĉi lasta subtenas la plafonon kiel kolono. Sur ambaŭflankaj muroj estis ĉizitaj 1000 budaoj.



Dum la Suda Song-dinastio (1127-1279 p. K.), Baŭding-monto estis fame konata loko de budaismo. Ĉi tie la ŝtonskulptaĵoj plejparte prezentas budaismajn rakontojn.

## La Ŝtonaj Skulptaĵoj de Dazu-gubernio

*Fotoj de Hinhua*

Unu el la plej belaj stonoj ĉe Fovan, Norda Monto.

La okcidenta muro de Juangjue-kaverno ĉe Dafovan, Baŭding-monto, montras tri bodisatvojn, kies vestaĵoj kaj la mur-ornamantoj estas tre belaj.





公輝田世光寫玉蘭金剛鸚鵡於柳浪亭上

Nagnolio kaj Papago.

de Tian Siguang